

Kien la Poezio?

Brendon Clark

**KIEN
LA POEZIO?**

de

BRENDON CLARK

1957

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO

30.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Copyright

©

The Esperanto Publishing Co. Ltd.

October 1957

Made and printed in Great Britain

La potenco de la antikvaj Grekoj kaj Romanoj jam delonge forpasis, kaj iliaj grandaj konstruaĵoj el ŝtono kaj marmoro kadukiĝis; sed la poezio de tiuj popoloj restas ankoraŭ freŝa kaj bela, inter la trezoroj de la homa kulturo. Ĝio sin ligas al eternaj veroj neniam mortos.

Tial decas, ke iuj el ni dediĉu sin al la poezio de Esperanto, por ke Esperanto subtenu la veron, kaj la vero subtenu Esperanton; por ke la cetera mondo vidu en Esperanto ne nur lingvon por la ĉiutagaj aferoj, sed ankaŭ trezorejon por la eternajoj. Per la poezio oni montras fidon, ke la lingvo daŭros.

Tamen por multaj la ĝisnuna poezio en Esperanto ne estas tute kontentiga. Sur la sekvontaj paĝoj mi serĉas la kaŭzon de tio, kaj mi esperas, ke la poemoj en ĉi tiu libro pravigas miajn konkludojn.

La Aŭtoro.

ENHAVO

	PAĜO
ANTAŬPAROLO	11
DANKESPRIMOJ	16
PRINCIPOJ:	
Pri la poezio	18
Pri la ideoj	18
Pri la lingvo	21
Pri la elizio	22
Pri la tradukado	23
Pri la ritmo	24
Pri la metriko	32
Pri la rimoj	39
Pri lingva beleco	42
Pri la sento	49
Resumo	50
ORIGINALAJ POEMOJ:	
Du manoj	54
Venas la vento	55
Kontrasto	56
Reciproke	57
Vojaĝo de la Maorioj	58
La paco	63
Montris nur la fajro	63
La bildkarto	64
Al la mortintoj	64
Vortmankoj	65
Perfido	65
Ombroj	65
Eksperimentaj spondeinoj	66
Pala luno	66

	PAĜO
Simpatio	67
Soneto III	67
Memore de Zamenhof	68
Singultante	69
Alfabeto	70
Rondoludo	71
Rimludo	71
Kalkula ludo	71
Nokta papilio	72
Pro amiko	72
Sunsubiro	73
La vento	73
Renkonto	74
Al S.H.N.	74
Malnova pipo	75
Mallumo	76
La aero	77
Realo	78
Eterna maro	78
La maljunulino	80
Homo mirinda, homa mizera	84
Averto post kverelo	85
Donu al mi tempon	86
Antaŭa amatino	86
Sendependaj manoj	87
Nuda vero	88
La Pioniroj	89

MALNOVAJ LAMPOJ:

I. Tradukonte (v. de Robert Herrick)	92
II. Tradukante (v. de E. B. Browning)	96
III. Tradukinte (v. de Thomas Gray)	102

	PAĜO
TRADUKITAJ POEMOJ:	
Kantoj de l' patrino	106
Somera enlitiĝo (R. L. Stevenson)	106
Mia ombro (R. L. Stevenson)	107
Pluvo (R. L. Stevenson)	107
Morto de Arturo (Tennyson)	108
Infanaĝo de Hiavata (Longfellow)	116
Aŭtuno (Keats)	121
Dianemo (Herrick).. .. .	122
Soneto LXIV (Shakespeare)	122
Soneto LXV (Shakespeare)	123
Soneto CXXXII (Shakespeare)	123
La aglo (Tennyson)	124
Lucasta (Lovelace).. .. .	124
La luno (Shelley)	124
Ne komprenate (T. Bracken, Nov-Zelando)	125
Kiam belulino (Goldsmith)	126
Kanto de Ariel (Shakespeare)	126
Min ne amu (Anonima poeto)	127
La pardonemo (Shakespeare)	127
Signoj de la senmorteco (Wordsworth)	128
Arthur kaj Hubert (Shakespeare)	130
KVAZAŬ-SINONIMOJ	135

ANTAŬPAROLO

Esperanto estas bela lingvo, facile komprenebla kaj esprimoriĉa. La prozo de la lingvo fluas nature, kaj sperta Esperantisto rapide forgesas, ke tio ne estas lia gepatra lingvo.

Sed kiam tiu Esperantisto sin turnas al Esperanta poezio li troviĝas en alia mondo, kie ofte oni parolas alian lingvon, kie la frazoj ne plu facile fluas, kaj kie oni ne povas tuj kompreni la signifon de la esprimoj. La lingvo ĉesas sekvi la stilon de la ĉiutaga konversacio kaj literaturo. Oni renkontas ideojn tiel kripligitajn, ke la senco ne estas tuj evidenta.

En la nacia lingvo—almenaŭ en la angla—tiu rimarkinda diferenco inter la proza kaj poezia formoj ne okazas. Unu formo spegulas la alian, kaj ĉiu persono povas kompreni. Kompreneble oni povas verki poemojn en nacia lingvo, kiuj devigas iom da kapogratado—sed la lingvo de la poemo ne aspektas kvazaŭ buĉisto detranĉis superflujajn pecojn kaj fiere prezentas la malbelan kadavron por ĝenerala admirado.

Malgraŭ ke mi estas Esperantisto jam de 37 jaroj, mi devas konfesi, ke mi ne povas legi kun favora sento kaj kompreno tiajn versojn de eĉ niaj plej kapablaj vortoĵonglistoj. La elizio tute mortigas por mi la intereson. Kutime kiam mi renkontas Esperantan poemon mi ĵetas rigardon al la substantivoj. Se montriĝas, ke vandalaĵoj manoj jam faris sian hontindan krimon, mi ne plu malŝparas mian tempon.

Ofte la Esperanta poezio konsistas el parado de kripligitaj vortoveteranoj, kiuj rigide marŝas sur piedostumpoj. Oni miras pri ilia gimnastika kapablo, sed ne komprenas plene kaj facile la spiriton de la parado. La gramatikaj elementoj lamas. La lingvo de la versoj ne estas la lingvo de la buŝo, tiu ĉiutaga Esperanto, kiu rapide kaj vikle saltas sur la langon.

Brendon Clark en ĉi tiu libro klare montras al niaj poetoj, ke ne estas necese fariĝi literatura barbaro, ke ankaŭ la Esperanta prozo bone adaptiĝas al la poezio. Necese estas kompreni la spiriton de la literatura lingvo kaj transmeti ĝin kun ĝia originala belo kaj esenco en poezian veston. "Poetoj" kiuj insistas, ke necese estas meti strofojn sur operacian tablon kaj sekci la viktimon por ke ĝi konformiĝu al nacia tipo, sukcesas liveri miaopinie nur senvivan korpon.

Dum la unua mondmilito, kiam mi estis juna Esperantisto kaj ne plaĉis al mi la tiutempa poezio, mi dediĉis liberajn momentojn en la tranĉeoj de Francujo kaj Belgujo al la problemo de la Esperanta poezio. Post multa eksperimentado rilate originalan kaj tradukan verkadon mi atingis la saman rezulton kiel Brendon Clark, kies majstraj klarigoj kaj ekzemploj plenigas la paĝojn de ĉi tiu libro, kaj brile lumigas la vojon por ĉiu, kiu venas sub influon de la poezia muzo. Tiutempe miaj ekzemploj aperis en *The Esperanto Monthly*, kaj ricevis plenan subtenon de William Page (redaktoro) kaj Montagu C. Butler. Sed verŝajne estis necese atendi la alvenon de Brendon Clark por ricevi la principojn de bona versfarado.

Kiu estas Brendon Clark, kiu kapable montras, ke la proza kaj poezia stiloj povas esti la samaj, kaj ke Esperanta poezio povas esti tiel alloga kiel la Esperanta prozo? Kelkaj biografiaj detaloj pri li certe interesos la legantojn.

Brendon Clark unuafoje ekvidis la lumon de la mondo en Auckland, Nov-Zelando, kaj interesiĝis pri Esperanto kiam li estis dekkvinjara. Vidinte Esperantan libron en montrufenestro de librovendisto, li aĉetis ĝin kaj lernis la lingvon sola. Kvankam li estis ankoraŭ lernejojnabo li komencis internacian korespondadon. Poste, pro studado ĉe porinstruista seminario kaj universitato, li devis kun bedaŭro flankenmeti sian amatan ĉevaleton por serioze studi frue kaj malfrue prepare al ekzamenoj. Tiutempe li profunde studis la literaturojn anglan kaj francan kaj "senprofite tuŝis la latinan."

Allogis lin la poezio kaj li akiris reputacion inter siaj kunstudentoj pri siaj poemoj. Efektive li venkis en poeziaj konkursoj, kaj versaroj kiuj fontis el lia plumo aperis en Nov-Zelandaj gazetoj.

En 1943 inter siaj malnovaj libroj li tute hazarde renkontis malnovan amikon, la Esperantan lernolibron. En la daŭro de tri semajnoj li reakiris ĉion, kion li antaŭe lernis. Li diris: "Surprizis min, ke mi rememoris tiel multe—ĉiun gramatikan regulon, eĉ la participojn kaj multe da vortoj, kvankam mi neniam pensis pri ili en la intertempo."

Lia entuziasmo por Esperanto kaj la idealoj de la movado estis senlimaj. Sciante nenion pri la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio kaj la kluboj en la lando, li sukcesis per reklamoj interrilatiĝi kun kelke da izolaj Esperantistoj. La milito malebligis internacian korespondadon, kaj li starigis la Nov-Zelandan Korespondan Rondon por instigi la interŝanĝon de leteroj inter lokaj samideanoj. Kiam finiĝis la milito tiuj korespondemuloj nombris 83. Baldaŭ post la starigo de la Rondo li aŭdis pri la organizita movado kaj tuj fariĝis agema partoprenanto de la N.Z.E.A.

En 1944 li veturis per fervojo 473 mejlojn de Makarau ĝis Wellington kaj renkontis laŭ aranĝo Esperantistojn sur staciaj kajoj, neforgesebla sperto kiu forte impresis lin. Ĉirkaŭ la fino de la jaro li akiris kun honoro la diplomon de la Brita Esperantista Asocio. Li fariĝis fervora subtenanto de Esperanto ĉe la gazetaro, kaj enkondukis Esperanton kiel nedevidigan temon en la lernejon ĉe Makarau, kie li tiutempe instruis.

Brendon Clark komencis verki artikolojn por Esperantaj gazetoj, kaj en Julio 1945 gajnis per poŝto la John Buchanan premion de la Universitato Liverpool (Anglujo), kaj estis la unua en Nov-Zelando tion akiri.

Lia unua presita poemo en Esperanto estis "Vojaĝo de la Maorioj," kiu aperis en *Esperanto Internacia* (Julio 1945). La multaj laŭdoj, kiujn li ricevis de diversaj nacioj instigis lin daŭrigi la verkadon de Esperanta poezio. Distingis tiun tre longan poemon la tuta manko de

substantiva elizio. Tiu punkto elvokis tiel altan ŝaton, ke li evitis en pliaj poemoj elizion de la substantiva finaĵo. Brendon Clark konfesas, ke elizio povas esti necesa rilate kantojn adaptitajn al naciaj arioj, kaj ankaŭ ĉe maloftaj okazoj povas esti ke elizio faras surprizan efekton. Post la apero de tiu poemo regule aperis en *Esperanto Internacia* kaj *Esperanto* versaroj super la nomo Brendon Clark, Nov-Zelando.

Poste li dediĉis multe da tempo kaj pensado, aplikante la principojn de poezio, kiujn li intime konis, al Esperanta poezio. Liajn konkludojn li publikigis en *Esperanto Internacia* en Aŭgusto 1946 sub la titolo "Kelkaj Teorioj pri Verstradukado." Mallonge, li proponis la tutan eviton de la substantiva elizio kaj nenormalaĵoj, la tradukadon de viraj ritmoj per inaj, naturaj en Esperanto, ekzemple, la jamboj per trokeoj, la plilongigon de la Esperanta metriko, kiam tio estas necesa, por esprimi la pensenhavon de la originalo kaj por egaligi la "verstempon" de la du lingvoj. Li asertas ke "en Esperanto pli da spaco estas necesa." En la monatoj kiuj sekvis, Brendon Clark ricevis spontaneajn esprimojn de ŝato el landoj tiel diversaj kiel Britujo, Francujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Brazilo, Urugvajo, Argentino, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Ĉinujo kaj aliaj. Tiuj leteroj konvinkis lin, ke estas konsilinde konservi la spiriton de normala Esperanto.

De tempo al tempo originalaj kaj tradukitaj poemoj aperis en la ĉefaj Esperantaj gazetoj el la flua plumo de Brendon Clark.

Li estas mezaĝulo kun edzino, du filinoj kaj unu filo, kaj ne nur servis la movadon sur la kampo de poezia literaturo, sed estis energia ĉefdelegito de I.E.L. (nun U.E.A.), kiun postenon li ankoraŭ entuziasme okupas, kaj helpas al N.Z.E.A. en ĝia agado. Ĉe Makarau kaj Leigh li starigis Esperantoklubojn ne nur por plenaĝuloj sed ankaŭ por lernejoj, disvastigante en tiuj lokoj intereson por Esperanto kaj montrante al la edukaj aŭtoritatoj la praktikan valoron de Esperanto.

El la supra interesa biografio la leganto klare rimarkos ke Brendon Clark estas ne nur revemulo sed fervora praktikulo, kiu dediĉas multe da eksterofica tempo al la antaŭenigo de la Esperanta movado.

Liaj opinioj kaj ekzemploj pri la principoj de Esperanta versfarado vekos grandan atenton kaj formos elstaran vojmontrilon, kiu helpas multajn verkemulojn sin orienti en la regiono de Esperanta poezio.

BERTRAM POTTS, J.P., F.B.E.A.,

*Hon. Dumviva Prezidanto de la
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.*

Okt. 1949.

NI FUNEBRAS

Hodiaŭ, dum mia prelegvojaĝo tra Eŭropo, atingis min la malĝojiga informo, ke Brendon Clark mortis en Dargaville, Nov-Zelando, la 9-an de Novembro 1956; katastrofa novaĵo, ĉar nia amiko staris en nia movado sur la sojlo de brila literatura estonteco. Feliĉe li postlasis ĉi tiun valoran kaj instruan verkon, fonton de inspiro.

Bertram Potts.

Munkeno, Germanujo.

La 3-an de Decembro 1956.

DANKESPRIMOJ

La plejmulto de la antaŭe presitaj poemoj en ĉi tiu libro aperis en la gazetoj *Esperanto Internacia* kaj *Esperanto*, post la komenco de la jaro 1945, kaj la aŭtoro esprimas dankon pro permeso ilin represi.

Li volas danki ankaŭ al la redakcio de *Heroldo de Esperanto* pro la permeso represi la poemojn "Singultante" kaj "Ne Komprenate"; kaj al la redakcio de *Literatura Mondo* pro la permeso represi la poemon "Malnovaj Lampoj."

**PRINCIPOJ KIUJ GVIDAS MIN
ĈE LA POEZIO**

PRI LA POEZIO

Se oni petus, ke mi difinu la poezion, mi respondus, ke ĝi estas la kontentiga esprimo per mezurita lingvo de pripensinda ideo; kaj ke la poeto estas homo pli ol ordinare sentema por la ĉirkaŭanta vivo, aŭ por iu parto de tiu vivo. Ĉar li estas sentema ankaŭ por la povo kaj belo de vortoj, li esprimas siajn sentojn per vortoj, kiel pentristo esprimas siajn sentojn per koloroj, kaj muzikisto per melodio. La poeto verkas laŭ la tuŝoj de la vivo, kaj la monda poezio spegulas la mondan animon.

La sentemulo estas ankaŭ imagemulo, kaj regata imago-povo kondukas ofte al analizo: oni ne povas analizi se oni ne povas imagi alian staton. Sekve la poeto ne nur sentas kaj esprimas, li ankaŭ imagas kaj analizas. El lia imagado naskiĝas similaĵoj, metaforoj, kaj figuritaj cirkonstancoj; el liaj analizoj naskiĝas la vero.

Sento, imago, analizo—tiuj estas la fundamentoj de la poezia penso; kaj ĉar ili devas kunekzisti samtempe ili postulas apartan formon de esprimo, formon kiu konservas iliajn unuecon kaj fulman brilon. Nur malofte oni povas esprimi per egale trafa prozo la tutan enhavon de poemo. Por fari ĝeneralan diferencigon: la celo de la prozo estas sciigi; la celo de la poezio estas sentigi. La prozo traktas pri faktoj kiuj naskas ideojn kaj pensintereson; la poezio traktas pri ideoj kiuj naskas sentojn kaj pensemocion.

Kiam la limigoj de la poezia formo estas tiaj, ke la lingvo kripliĝas, la ideoj fariĝas malklaraj, kaj ĝuste pro tio la pensemocio perdas sian forton. Tio foje okazis ĉe nia Esperanta poezio.

PRI LA IDEOJ

Mallongaj poemoj, ĝenerale, dediĉas sian tutan povon al la esprimo de unu centra ideo. Vidu ekzemple la poemon *Al Dianemo*. Longaj poemoj, ĝenerale, traktas pri rakonta temo, heroa okazaĵo, aŭ profunda filozofio; kaj se ili estas

en la plej alta rango de la poezio, preskaŭ ĉiu verso aŭ versgrupo kontribuas al atendinda penso, bildo, figuro aŭ esprimaĵo. La suma efekto estas tio, kion mi nomis pensemocio.

En *Morto de Arturo* multaj versoj montras tre klaran bildan ideon, ekzemple:

Li elpaŝis en lunlumon sur tombejo,
Kie kuŝas ostoj de antikvaj homoj.

Supre, vintra luno, heligante jupon
De la longa nubo, montris sin kaj brilis
Akra pro la frosto, sur la glavtenilon,
Kies tuta longo ardis kaj trembrilis . . . *k.t.p.*

Kiel lumrubando de mateno norda,
Vidita kie moviĝantaj glacimasoj
Interfrapas nokte en la norda maro.

El la sama poemo mi citas kiel ekzemplojn de *filozofiaj* ideoj:

La antaŭa moro cedas al la nova,
Kaj la celon Dio trafas multavoje.

Pli da celoj plenumiĝas per la preĝo
Ol la mondo eĉ imagas.

Ĉar la homo ne superas al la stulta ŝafo
Kiu nutras blindan vivon en la cerbo,
Se, konante Dion, li ne levas manojn . . .

Kaj jen estas *analiza* bildo el *Hiavata*

Nek branĉeton lia faro movis,
Nek folio flirtis aŭ susuris,
Sed la vigla kapreolo aŭdis,
Batis per la kvar piedoj kune,
Levis unu hufon kaj aŭskultis . . .

En alia loko mi jam citis la noblan version de la germana poeto Schiller, kiu nomis la grandan sonorilon:

Ŝvebanta najbarulo de la tondro.

Mi citas kelkajn *ideojn* kiujn mi ĉerpis el diversaj poemoj por pli klarigi la temon:

Nur ĉe via ĉerko
ĉiuj ombroj cedas.

(Elsa Nyberg en *La Kruda Leĝo*).

Kaj kiam venos vi, hirundoj gajaj,
en vilaĝojn niajn bruligitajn, detruitajn,
viajn nestojn ankaŭ vi ne povas trovi.

(Vitez-Demetroviĉ en *Interparoloj kun birdoj*).

Mortu sen espero,
Teda ĝen-letero! (pri ĉen-leteroj).

(R. Rossetti en *La Leganto Parolas*).

Multan ombron faras la malgranda lampo.
(*Ombroj*).

Portos aliaj la tolan ĉemizon,
mi la linon sarkas.

(El *La Linsarkistino*, tr. Vilho Setälä).

Mi uzas la vorton 'ideo' laŭ tre larĝa senco. Ĉe priskribaj aŭ rakontaj versoj la 'ideo' ofte konsistas nur el trafa elekto de detaloj, sed tiuj detaloj devas allogi atenton per siaj taŭgeco kaj vero. Ili devas krei tutan bildon aŭ karakteron per kelkaj vortoj. La detalo *levis unu hufon* en la citaĵo el *Hiavata* bone ekzemplas tiun punkton. Tia ideo povas rezulti nur el observado kaj analizo.

Sen ideoj, poemo neniom valoras. Ĝi eble havas plaĉan ritmon kaj belajn rimojn, tamen sen ideoj ĝi estas nura vortludo. La drama poezio de Shakespeare estas preskaŭ senrima; ĝi vivas pro siaj ideoj kaj trafa lingvo. La pseŭdopoetoj ofte kaŝas sian ideomankon per sonoraj rimoj. Tio ne diras ke rimata poemo estas necese senidea.

Tute kontraŭe. Ĉe mallonga poemo, kiam la ideo estas pli-malpli ununura, la rimo fariĝas akompananta muziko.

Ĉe longa poemo la afero estas alia. Ĝuste kiel la rimoj povas logi la atenton for de la ideomanko, tiel same ili povas logi ĝin for de la ideoriĉo.

Vera poeto verkas longan poemon nur pro tio, ke li havas pli multe da ideoj ol li povas esprimi per mallonga poemo. Tiukaze li ofte preferas ne dividi la ŝaton de la leganto inter tiuj ideoj kaj nura rimsono.

Verdire, la senrima poezio estas la plej malfacile verkebla. Sen ideoj ĝi estas nenio. La poeto ne povas kaŝi la vantecon per belsonaj rimoj. Ĉiu verso, de la komenco ĝis la fino, devas kontribui al la perfekta esprimo de esenca ideo. Per unu vorto, ĝi devas esti pura poezio.

PRI LA LINGVO

Ĉe la Esperanta poezio la lingvo devus esti tute natura, la konata lingvo de la prozo ĉe ties plej alta nivelo. Por ke ĝi estu ĝenerale ŝatata ĝi ne fariĝu kvazaŭdialekto propra nur al la poezio. Tio postulas ke oni kutimu eviti la elizion ĉe substantivoj, la nebezonatajn neologismojn, la ritmojn kiuj ne naskiĝis el la lingvo mem, ĉiuspecajn neregulaĵojn, nenaturan vortordon, kaj la troan kunpremon de vortoj aŭ pensoj. Tio estas malfacile farebla, sed tia estu la idealo. Ni serĉas internacian legantaron.

La argumento, ke la neologismoj en Esperanto estas analogaj al la 'poeziaj vortoj' de la naciaj lingvoj estas disputebla. Plejparte tiuj poeziaj vortoj estas postvivantoj el iu antaŭa formo de la sama lingvo; ili ne estas la nekonataj antaŭirantoj de ia estonta formo. Ŝajnas al mi pli prudente ne uzi neologismon antaŭ ol ĝi estas sufiĉe konata de la samideanaro pere de la prozo. Kiam taŭga vorto tute ne ekzistas tio estas alia afero.

Neregulaĵoj, precipe rilate al la ritmo, povas kaŭzi konfuzon. En miaj fruaj verkoj mi foje uzis neregulan silabon ĉe la komenco de iuj versoj, sed tiuj malplaĉis al iuj legantoj, kiuj trovis ilin pli pezaj ol mi supozis. Kiam

oni dubas—ne faru! De tiam mi tute evitas la kromsilabon: ĝi ne estas ĝenerale akceptebla, do ĝi estas evitinda. La leganto trovos ekzemplojn en mia *Morto de Arturo* kaj en aliaj poemoj de proksima dato.

PRI LA ELIZIO

Kiam Zamenhof starigis la 16an regulon, li verŝajne jam konstatis iujn malfacilaĵojn rilate al la poezio en Esperanto, sed li certe ne antaŭpensis la eventualan rezulton de tiu regulo ĉe la trouzantoj. Li mem uzis ĝin tre ŝpareme, kaj en sia plej amata verko, nome *La Espero*, nur dufoje. Per tio li montris, ke la elizio ja estas evitebla, kaj la prefero al tiuj versoj flanke de la samideanaro, montras iugrade, ke ili preferas poemojn kiuj ne havas elizion.

Ne estas devige, ke ni posteuloj uzu elizion se ni trovas ĝin malbona, kaj mi mem preskaŭ tute evitas ĝin. Mi ne diras, ke oni neniam uzu ĝin, sed ke oni pli prudente rezervu ĝin nur por iu aparta efekto, kaj por kantoj kun nacia muziko. Kun escepto de la mokema *Singultante*, mi eĉ ne unu fojon en ĉiuj miaj ĝisnunaj verkoj eliziis ĉe -o. Ju pli malofte oni elizias, des pli forta estos la efekto. Sed multaj uzas elizion nur pro tio, ke ili ne scias kiel eviti ĝin, aŭ ĉar ili volas imiti la jamban ritmon de iu nacia lingvo.

Ni memoru, ke la vokalaj finaĵoj de Esperantaj vortoj klare disigas iliajn radikojn, kaj faciligas la komprenon ĉe la parolata lingvo. La poezio ĉiam estas la plej malfacila flanko de kiu ajn lingvo; kial do ni pliigu tiun malfacilon per elizio? Ĉe la poezio antaŭ ĉio alia, ni devus strebi al la plej konata kaj plej komprenebla lingvo. La elizio aspektas malbele, sonas kiel singulto, kaj kondukas al kvazaŭdialekto. Oni elizias -o nek en la prozo nek en la parolado, kaj tiuj ampleksas proksimume 99% de nia Esperanta praktiko. Sekve en la poezio ĝi fariĝas io fremda kaj malloga. Ellasi la apostrofojn nenial helpas. Tio povas esti eĉ pli konfuza, kaj nur konfesas, ke oni malamas la elizion sed ne scias kiel forigi ĝin.

Plej ofte oni evitas elizion ŝanĝante la vorton aŭ la vortordon; sed oni devas tiel agi de la komenco. Verki per jamba ritmo kaj poste trokeigi ĝin ĝenerale ne sukcesas.

Iuj samideanoj rifuzas legi eliziitan poemon ĉar ili trovas elizion neperfektaĵo, sed neniu rifuzas legi poemon nur pro tio, ke ĝi estas *sen* elizio! La verkanto per elizio tial perdas iom da legantoj.

Oni penas defendi elizion per la argumento, ke oni uzas ĝin en la prozo ĉe la kunmetitaj vortoj, ekzemple *ĉielarko*, *vaporŝipo*, *mondpaco*. Sed tiaj kunmetitaj vortoj jam ekzistas kune en la menso, ofte ili estas unuvortaĵoj en la naciaj lingvoj, kaj la kunmeto plifaciligas la penson. Ankoraŭ restas la fina -o.

Elizio ĉe *la* trovas sin en alia kategorio. *La* estas ununura vorto, kaj la formo *l'* estas jam konata en pluraj lingvoj. Ĝi estas inter la plej oftaj vortoj en Esperanto, kaj en sia eliziita formo ĝi ofte servas por disigi similajn sonojn, ekzemple, *tra l' arbaro*. Ĝi estas evitinda kiam la rezultaĵo povas esti dusenca, ekzemple: *de l' ardo*, *de lardo*. Sed eĉ tiuokaze, mi opinias, ke *l'* emas kuniĝi kun la antaŭa prepozicio pli ofte ol kun la posta substantivo.

PRI LA TRADUKADO

Ideo estas internacie komprenebla, lingvo nur nacie; sekve la tradukanto devus antaŭ ĉio ĝuste traduki la ideojn. La lingvon, metrikon kaj ritmon de la originalo li devus imiti laŭeble, sed nur ĝis tiu grado kiun ebligas la ecoj de la nova idiomo.

Ĉe tradukita poemo la Esperanto devus esti same simpla, flua kaj klara, kiel ĉe originala poemo. Oni tradukas por la samideano, ne por la samlingvano. Tiu povas legi la originalon, sed la Esperantisto ne povas. La teknika formo de la originalo ne multe interesas lin; eĉ ĝi povas esti por li nekomprenebla. Sed li rajtas insisti pri bela kaj klara lingvo en la Esperanta traduko.

Ĉio, kio malhelpas aŭ konfuzas la komprenon estas malbona. Per iom pli da peno ol kutime, kaj per ioma

rezigno rilate la eksteran formon de la originalo, niaj poetoj certe povus eviti ĉiun malbonaĵon. Ili nepre sukcesus, se niaj redaktoroj insistus. La reguloj de la tradukado devus helpi al la legonto, ne al la tradukanto.

Kiam nacia poeto tradukas el fremda lingvo, li ne tordas aŭ aliigas la propran lingvon por konformigi ĝin al la fremda tekniko, sed li aliigas la fremdan teknikon por konformigi ĝin al la propra lingvo. Ankaŭ ni Esperantistoj tiel rajtas.

Nia situacio estas neordinara. Plej ofte ni estas komence nacioj kaj nur poste Esperantistoj. Sed kiam ni tradukas en Esperanton, ni devus verki kvazaŭ ni estus dekomence Esperantistoj por kiuj ĉiu alia lingvo estas fremda kaj sen influo sur nian Esperanton.

Mi volas menci tiel ankoraŭ unu punkton. Kvankam la tradukanto respondas pri la ĝusteco kaj klareco de sia traduko, li ne respondas pri la malklareco flanke de la aŭtoro, kaj li ne rajtas korekti ties erarojn pri faktoj. Li povus ellasi tion, kio estas superflua aŭ jam dirita, sed li ne rajtas aldoni penson kiu ne troviĝas en la originalo. Li estas por la aŭtoro alia voĉo, sed ne alia menso.

PRI LA RITMO

Difinoj

Ritmo: regula alternado de akcentataj kaj senakcentataj silaboj. (Mi montras la akcentatajn silabojn per majuskloj).

Takto: la unuo de ritmo, t.e., la grupetoj de akcentata kaj senakcenta(j) silaboj, kiu regule ripetiĝas. 'Verspiedo.'

'*Viraj*' aŭ '*Fortaj*' *Taktoj*: Taktoj kiuj finiĝas per akcentata silabo, ekzemple:

Jambo: - - / ekz.: po DEK/ por VI/ po DEK/ por MI/.

Anapesto: - - - / ekz.: la duOBL/o de DU,/ la duON/o de OK.

'*Inaj*' aŭ '*Malfortaj*' *Taktoj*: Taktoj kiuj finiĝas per senakcenta silabo, ekzemple:

Trokeo: - / ekz.: TRA la/ LANDo/ IRas/ FORTa/
VOKo/.

Amfibrako: - - - / ekz.: la LANDo/ de MIaj/ gePATRoJ/.

Daktilo: - - - / ekz.: LANDo de/ MIaj ge/ PATRoJ -/ (neperfekta).

‘*Jambina*’ aŭ ‘*Neŭtrala*’ *Ritmo*: - - | . . . | - - | - ekz.: ĉu PER/eANT/a EST/as NUN/ la MOND/o (Justesen).

Aliaj Taktoj.

‘*Anapestino*’: - - - - / ekz.: Kia VORTo/ povas VIBRI/ al la STELa/ labirINTo/.

‘*Spondeino*’: - - - / ekz.: MORTPALaj/ HOMoj kaj/ VELKFLAVaj/ PAĜoj/.

Ĉar en Esperanto la akcento ĉiam okazas ĉe la antaŭlasta silabo, tio nepre kaŭzas ke ĉiuj vortoj kiuj havas egalan nombron da silaboj havas ankaŭ saman ritmon, ekzemple:

BELa/ BONa/ GRANDa/ (trokeoj)

malBELa/ bonEGa/ poEMo/ (amfibrakoj)

MALfac/ILa/ LACig/ANTa/ (trokeoj)

Oni povas ŝanĝi la ritmon uzante unusilabojn, ekzemple: la BONa/ kaj BELa/ (amfibrakoj el trokeaj vortoj).

LA mal/BONa/ KAJ mal/BELa/ (trokeoj el amfibrakaj vortoj).

Tamen pro la regulo kiu permesas elizion de la fina -o ĉe substantivoj, oni povas krei *kontraŭ-naturan* jamban takton:

la VENT'/ murMUR/as EN/ la VAL'/ anstataŭ, ekzemple:

EN la/ VALo/ PLORas/ VENTo/ aŭ simile.

Esperanto estas ‘ina’ lingvo. Tio diras, ke ĉiu vorto kiu havas pli ol unu silabon finiĝas per senakcenta silabo. En Esperanto troviĝas eĉ ne unu jamba vorto, kaj la lingvo ne posedas sufiĉe da unusilaboj por fari el ili daŭran jamban ritmon. Kiam oni skandas Esperantan version per jamboj tio disrompas ĉiun dusilaban vorton; kiam oni skandas per trokeoj la vortoj restas nerompitaj:

Ho VID/u MIN/ kaj KRESK/os VI/a AM'/ (jamboj)

VIDu/ MIN kaj/ KRESKos/ VIa/ AMo/ (trokeoj)

Mi ne diskutas ĉi tie, ĉu la efekto de la du ritmoj estas sama; mi volas montri, ke nur la inaj ritmoj estas konformaj al la ecoj de Esperanto, kaj ke la jamba ritmo perfortas al tiuj ecoj.

La trokea kaj amfibraka ritmoj estas tute naturaj en Esperanto. La daktila ritmo ne povas esti perfekta en Esperanto pro tio, ke mankas la fina silabo en ĉiu verso; verdire, ĝi malsimilas al la amfibraka nur en tio, ke ĉiu verso komenciĝas per akcentata silabo.

La ritmon kiu komenciĝas kaj finiĝas per senakcenta silabo oni povas skandi egale kiel jamban aŭ kiel trokean, laŭ tio, ĉu oni ignoras la komencan aŭ la finan silabon:

ĉu PER/eANT/a EST/as NUN/ la MOND/o (jamboj)
ĉu/PERe/ANTa/ ESTas/ NUN la/ MONDo/ (trokeoj)

Pro tio mi nomas ĝin 'Neŭtrala' ritmo, manke de pli bona nomo. Kiam la ceteraj versoj de la poemo estas plejparte jambaj (pro elizio aŭ aliaj kaŭzoj), mi nomas la ritmon 'jambina.'

Tiu ritmo estas tre bona, tre utila, tre ofta, kaj tute natura en Esperanto. El nur unu vidpunkto oni povas kritiki ĝin, sed tiun mi mencias sub *Metriko*.

Kiam la unua kaj alternaj akcentoj en trokea verso estas kompare malfortaj, la rezulto estas pli rapida ritmo, kiun mi nomas 'anapestina'. (Vidu la poemojn *Vortmankoj* kaj *Pro Amiko*). Ĉar la ritmo estas verdire nur aparta formo de la trokea ritmo, ankaŭ ĝi estas natura en Esperanto. La rapida fluo de la anapestino dependas de la multeco de unusilaboj kaj negravaj dusilaboj kiujn oni emas ne akcenti.

La ritmo kiun mi nomas 'spondeino' similas al la daktilo, sed ĝi estas pli peza kaj pli malrapida ol la daktilo. Ĝi dependas de la kunmeto de fortaj radikoj, prefere kun multe da konsonantoj en ĉiu, tiel ke oni emas akcenti ambaŭ sinsekve, kiel ĉe FULMTONDRO. Oni rimarkas, ke la spondeino estas pli ĝuste ritma figuro, aŭ ornamo, ol konsekvenca ritmo; por verki tute spondeinan poemon oni devus eviti ĉiun malfortan unusilabon. Tio estus preskaŭ

neebla, kaj ĉiukaze la rezulto estus multe tro peza. Teorie oni povas skandi la spondeinojn kiel daktilojn aŭ amfibrakojn.

Do, la trokea, amfibraka, neŭtrala, daktila, anapestina kaj spondeina ritmoj estas la ritmoj kiuj estas naturaj por homo kiu naskiĝis Esperantisto kaj kiu neniam lernis alian lingvon. Anstataŭ imiti la fortajn ritmojn (jamban kaj anapestan) kiam oni tradukas en Esperanton, oni devus *traduki ankaŭ la ritmon* per la plej simila ritmo en la nova idiomo. Ekzemple, oni plej prudente tradukas jambojn per trokeoj aŭ jambinoj, kaj anapestojn per amfibrakoj aŭ anapestinoj. Se tion farante oni perdas iun ritman efekton de la originalo, oni devas rezigni pri tio. Ĉe ĉiu lingvo ties propra belo.

Oni pli klare komprenas la similecon inter trokeoj kaj jamboj kiam oni skribas sinsekve plurajn versojn en la sama ritmo, ĉar tiuokaze, se oni ignoras la senakcentan silabon ĉe la komenco, aŭ fino, la interna ritmo estas identa por ambaŭ ritmoj:

(SUB) la SANKT^oa SIGN^o DE L' esPER^o KOLEkt-
IG^oas PAC^oaj BAT^oalANT^ooj, KAJ rapID^oe KRESK^oas LA
aFER^o(o).

Zamenhof atentigas pri tio, ke la gramatikaj finaĵoj en Esperanto estas efektive apartaj vortoj, alligitaj al la radikoj nur pro la oportuneco por la okcidentanoj. Sekve ni *povus* skribi jene la suprajn trokeojn:

o SUB/ la SANKT/a SIGN/o DE L'/ esPER/
o KOL/ektIG/as PAC/aj BAT/alANT/
oj KAJ/ rapID/e KRESK/as LA/ aFER/.

Tiumaniere ni ŝanĝus trokeojn por jamboj sen elizio kaj sen ia ŝanĝo ĉe vortordo. Sed denove ni konstatas, ke la trokea aranĝo estas multe pli natura.

Mi ne volas diri, ke la jamba kaj la trokea ritmoj *sonas* same. Kiam ekzemple ni anstataŭigas

Ho VID/u MIN/ kaj KRESK/os VI/a AM'/, per
VIDu/ MIN kaj/ KRESKos/ VIa/ AMo,

la trokea formo, kvankam ĝi havas la saman nombron da

silaboj, sonas malsame. Mi ne povas indiki ĝuste kiamaniere ĝi estas malsama. Kalocsay diras, ke ĉe la jamboj la moviĝo de la ritmo estas ĉiam en la direkto al la akcentata silabo, ke ĝi 'kvazaŭ senpacience antaŭpuŝas la verson'. Tiel povas esti. Tamen mi ne trovas korolarie, kiel li, ke la trokeo estas malpli rapida, aŭ pli trankvila, ol la jambo. Tute kontraŭe, en Esperanto, kies vortoj estas nature trokeaj, la trokea ritmo fluas pli rapide. Pro tio ĝi eble perdas iom de la drama forto de la jamba ritmo, sed ĝi regajnas tiun forton kiam oni aldonas al ĝi kelkajn silabojn. Komparu ekzemple:

- (1) Ho VID/u MIN/ kaj KRESK/os VI/a AM'/ (5 jamboj).
- (2) VIDu/ MIN kaj/ KRESKos/ VIa/ AMo/ (5 trokeoj).
- (3) HO nur/ VIDu/ MIN kaj/ KRESKos/ VIa/ AMo/ (6 trokeoj).

La tria formo, kun la kroma takto, ŝajnas al mi egala al la unua, rilate la dramatan forton, kaj ĝi havas avantaĝon en tio, ke ĝi estas pli natura kaj pli konvena al nia lingvo.

Ĝi similas al la unua pro tio, ke la senakcenta 'nur' efikas sur la sekvontajn vortojn same kiel la senakcenta 'ho' en la unua formo. La antaŭiranta 'HO' kaj la fina '-o' en la tria formo, neniel ŝanĝas la internajn akcentadon kaj moviĝon de la unua formo. Ili nur plilongigas la verson. Komparu ankaŭ la jambinon:

- (4) Ho VID/u MIN/ kaj KRESK/os VI/a AM/o.

La diferenco inter tiu kaj la unua estas nekonsiderinda. La jamba efekto de la eliziita AM' montriĝas iom iluzia. Se necesus konsideri nur la 'dramatan forton' de la ritmoj, mi opinius, ke la jambino ĉiam sufiĉus por traduki jambojn. Sed ni poste konstatos ke la drama forto de la ritmoj ne estas la sola pripensinda punkto.

El ĉi tio mi konkludas, ke en Esperanto oni povas traduki jambojn per trokeoj egale trafe kiel per jambinoj aŭ kvazaŭjamboj, kondiĉe ke oni aldonu minimume unu

trokean verspiedon; el tiu kroma takto, la senakcenta silabo efikas sur la sekvontajn vortojn kiel ĉe jambino, kaj la akcentata silabo starigas la trokean formon kaj kunligas la versojn sen la salteto kiu okazas inter sinsekvaj jambinoj.

La tradukantoj inter la naciaj lingvoj ofte ŝanĝas la originalan ritmon por ritmo pli konvena al la propra lingvo (ekzemple ĉe la Rubajaro de Omar Khayyam), kaj ni Esperantistoj same rajtas.

Ĉe kelkaj poemoj oni alternigas malsamajn ritmojn tra sinsekvaj versoj, ekzemple:

malSATa/ homARo	(amfibrakoj)
KUN a/VIDa/ LIPo	(trokeoj)
riGARDas/ al MARo	
ĈU al/VENas/ ŜIPo	
kun PANo,/ viANDo,	
EL pli/ RIĈa/ LANDo.	

Povas esti, ke en iuj naciaj lingvoj tiu kutimo estas tre konata, kaj la ritma interŝanĝo plaĉas. Tamen ĉe iuj aliaj lingvoj oni neniam ŝanĝas ritmon en la sama strofo. Sekve por la samideanoj kiuj ne alkutimiĝis al ĝi, la ritmoŝanĝo povas esti tre konfuza. Oni preferas ĝui la ritmon ne konsciante pri ĝi. Jen estas alia ekzemplo pri miksitaj ritmoj:

mi SCias/	(amfibrako)
aŭd/IGos/ LA mal/NOVa/ MELo/DIo/	(neŭtrala)
vi KANTos/ kaj KANTos/	(amfibrakoj)
KVAZaŭ o/KAZis nen/Io	(daktiloj)

(Vitez-Demetrović).

Tamen en tiu lasta ekzemplo la ritma nereguleco ne ĝenas la leganton, ĉar la vortoj mem, per siaj neeviteblaj akcentoj, *devigas* ke la leganto legu la versojn laŭ la elektitaj ritmoj, kaj la tuta efiko estas natura, preskaŭ proza, kadenco. Ĉe la antaŭa ekzemplo la vortelekto, aŭ eble la vortordo, estas tia, ke oni devas relegi eksperimente por trovi la ĝustan ritmon, precipe ĉe la fina verso. Do, pri la ritmo mi starigas por mi klaran principon:

Prefere eviti ĉian ritman neregulaĵon: sed, kiam oni ja uzas neregulan ritmon, tiel ordigi la vortojn, ke la leganto ne povas misakcenti ilin.

Ŝtopiloj

Kiam mankas en verso unu senakcenta silabo, oni foje sentas inklinon enmeti iun el la malprecizaj unusilaboj nur por kompletigi la ritmon. Tiajn vortetojn mi nomas 'ŝtopiloj.' Ekzemple:

SUR la/PINTo/ DO de/ TIu/ MONTo/.

Tre evidente la vorto 'do' estas nur ŝtopilo, uzata ĉar 'sur la pinto de tiu monto' estas nebona ritmo. Aliaj ŝtopiloj estas 'jen,' 'nu,' 'ja.' Ideale, oni devus uzi ilin nur kiam oni simile uzus ilin en proza formo de tiu verso. Tamen, ne ĉiam ni sukcesas forigi ilin; niaj ritmaj problemoj estas tro severaj! Ni memoru nur tion, ke la ŝtopiloj ne tro ofte trudu sin en niajn verkojn. Ni uzu ilin nur kiam ili ja esprimas kion ni volas esprimi. En la supra ekzemplo 'jen' estus pli taŭga vorto ('Sur la pinto jen de tiu monto'), sed nur kondiĉe ke oni povu imagi iun homon, kiu *montras* la monton. Alie, oni devus forigi ritmorompon per alia rimedo:

Sur la pinto de l' vidata monto.

Sur de tiu monto la supraĵo (ne bona).

Sur la pinto de ĉi tiu monto (iuokaze).

Sur la pinto de la monto tie.

Tie sur la pinto de la monto.

Sur la malproksima montopinto . . . k.t.p.

Ŝanĝita vortordo solvas multe da problemoj en la poezio. Cetere, oni ofte provizas la bezonatan silabon per taŭga afikso:

Tia estas nia—sopiro.

Tia estas nia sopirado.

Sed ankaŭ la afiksoj povas fariĝi ŝtopiloj!

Vortoj per Mal-

La vortoj, kiuj en Esperanto komenciĝas per *mal-* estas preskaŭ senescepte pli longaj ol en la naciaj lingvoj, kaj tio ofte starigas apartan problemon por la tradukanto. La plej taŭga solvo troviĝas, ne en la neologismoj, sed en la 'Kvazaŭ-sinonimoj' kiujn mi listigas ĉe la fino de la libro. En apartaj tekstoj tiuj vortoj povas funkcii kiel sinonimoj. Ekzemple, anstataŭ '*malfermu* la fenestron' oni foje povas skribi '*levu* la fenestron'; anstataŭ '*malrapida* parolmaniero' oni foje povas uzi *lakona*, *laca*, k.t.p. Alivorte, oni anstataŭigas negativan vorton per pozitiva vorto, kiu konvenas al la cirkonstancoj. Tiu rimedo ankaŭ respondas la plendon de Kalocsay kaj aliaj, ke la *mal-*vortoj enkondukas malkonvenan penson. Ekzemple, *malfermi* pensigas pri *fermi*, *malforta* pri *forta*, k.t.p.

La

Oni foje trovas, ke neeliziebla *la* rompas la ritmon, kaj iu korespondanto demandis de mi, ĉu tiuokaze oni prave ellasas ĝin? Tion la verkanto mem devas decidi. Foje *la* estas malforta sinonimo por *mia* aŭ *tiu*: *la libro* signifas *iu konata libro*. Kiam *la* havas tiun sencon, estas pli konsilinde ne ellasi ĝin. Kiam *la* havas ĝeneralan sencon, ekzemple, *la amo*, miaopinie oni povas ellasi ĝin—kvankam eĉ tiuokaze oni verkus pli bonan Esperanton konservante ĝin. Ni memoru ankaŭ la konsilon de Zamenhof, ke tiu, kiu ne komprenas la uzon de *la* povas ellasi ĝin.

Kelkfoje oni povas solvi la problemon ŝanĝante la vortojn aŭ la vortordon:

- (1) Mi rapidu, aŭ (la) firmeco (de)falos
El (la) okuloj, per inecaj larmoj.

Mi rapidu, aŭ defalos la firmeco
el okuloj miaj, per inecaj larmoj.

- (2) Venis (la) varma kaj sunbrila (so)mero.
Venis la somero, varma kaj sunbrila.

- (3) Venis (la) varmaj kaj sunbrilaj tagoj de somero.
 Venis la sunbrile varmaj tagoj de somero.
 Venis la someraj tagoj, varmaj kaj sunbrilaj.
 Venis la sunbrilaj tagoj kaj somera varmo.

- (4) Ĉu vi scias (la) nomon de la urbo?
 Ĉu de l' urbo vi la nomon scias?

Oni pli prudente ne misloku *la*, kiel ekzemple en la verso:
 Mi por vi la sentas amon.

Tio postulas nur ŝanĝitan vortordon:
 Sentas mi por vi la amon.

Ĉu mi estas malprava kiam mi trovas pli bona:
 Tiras ĝi la homan familion, anstataŭ
 Ĝi la homan tiras familion?

Korelativoj

Ĉar la plimulto de la korelativoj (*kiu, tiam, k.t.p.*) estas trokeaj vortoj, ili foje malkonvenas al amfibraka ritmo. Ekzemple:

la DOMo/ (-) KIe/ mi LOĜas/

Foje oni povas meti prepozicion antaŭ la korelativo, aŭ antaŭ alia korelativo:

la DOMo/ en KIu/ mi LOĜas/

Alia rimedo estas la partecipo:

la DOMo/ de MI en/loĜATa/.

Ke

Kiam oni volas ellasi la vorton *ke*, oni faras tion uzante interpunktojn:

Kio pli bela:

pensi: se venkos neniam libero,

mediti: se estingiĝos lumero. . .

(Eino Leino—V. Setälä).

PRI LA METRIKO

Difino: La longo de ĉiu verso, kalkulante per taktoj. Sekve la metrikoj havas du elementojn: ritmon kaj akcentonombbron. Per tiuj du elementoj oni nomas la metrikon.

Ekzemple:

FINGRoj/ DANCas/
SUR klav/ARo/,
FEoj/ KANTas/
EN arb/ARo/.

Adamson-'Rec.

Du trokeaj taktoj en ĉiu verso, do, *trokea dutakta metriko*, aŭ malpli longe, *trokea dutakto*. (Iuj poezikonantoj eble preferus la nomon *trokea dimetro*; sed la signifoj de *dimetro*, *trimetro*, k.t.p. ŝajne ne estas tute internaciaj. S-ro Bergman, ekzemple, atentigas pri tio, ke la sveda *pentametro* estas pli longa ol la angla *pentametro*).

Trokea tritakto (trimetro):

Sekaj/ lipoj/ flustras/
Kara/ kara/ kara/,
Ĉiam/ freŝa/ floro/
Sur tomb/ŝtono/ via.

Silverstolpe—D. Person.

Trokea kvartakto (tetrametro):

Ne ekz/istas/ vivo/ tuta/
Nek la/ morto/ abso/luta/.
Ĉies/ morto/ nur laŭ/ tio/
kia/ estas/ lia/ menso/.

Eino Leino—V. Setälä.

Amfibraka kvartakto:

Pli BONE/ plenUMi/ aPUDan/ komPLEZon/
Ol kuri/ tri mejlojn/ por swingi/ incenson/. (JoE).

Jamba kvintakto (pentametro):

Ho VID/u MIN/ kaj KRESK/os VI/a AM'/
Al ti/u, ki/u bald/aŭ pas/os jam. (Kalocsay).

Neŭtrala (jambina) kvintakto:

Vi/ vidas/ en mi/ tagon/, kiu/ palas/
Post sun/subir/o en/ la ok/cident/o (Kalocsay).

Po/poloj elsangintaj, ĉu vi hav/as
 An/koraŭ forton por kuniĝo frat/a,
 Dum/ vin nun kiel skurĝo senkompat/a
 La/ frosto kaj la senpaneco traf/as? (Kalocsay).

Pri la tre ofta *neŭtrala* metriko mi volas diri nur jene: inter du sinsekvaj neŭtralaj versoj okazas speco de salteto, aŭ paŭzeto. Tial, por eviti malagrablan efekton, estas konsilinde, ke la verkanto finu ĉiun penson en ĉiu verso, aŭ tiel ordigi la esprimadon, ke natura paŭzo troviĝu ĉe la versfino.

En mallonga poemo, kiel en la sonetoj de Kalocsay, la saltetoj povas esti tre efektaj, sed en longa poemo oni riskas, ke ili iom tedos la leganton.

Oni uzas ankaŭ sestaktajn, septaktajn kaj oktaktajn versojn; ĝenerale, tamen, la sestakto konsistas el du tritaktoj, la septakto el kvartakto plus tritakto, kaj la oktakto el du kvartaktoj. Inter la du partoj de ĉiu verso okazas paŭzo kiun oni nomas *cezuro*. Skandante, oni montras la cezuron per du vertikalaj aŭ oblikvaj strekoj: // . La cezuro povas okazi en kia ajn metriko, kaj ĝia loko (kiu, tre ĝenerale, moviĝas en senrimaj versoj, sed restas fiksita en rimataj versoj) efikas sur la sonon kaj efekton de la poemo.

Amfibraka sestakto:

Tro ofte/ la nova/ espero// fariĝas/ malnova/ ĉagreno/,
 Tro ofte/ la sonĝon/ de l'nokto// frakasis/ inkuba/
 mateno. (Vojaĝo de la Maorioj).

Trokea septakto:

El la/ faŭko/ de l' tun/elo// venas/ longa/ krio/,
 Kaj vid/iĝas/ ĉe la/ vosto// fume/ nigra/ strio/.

Rimarku la diferencon, kiam oni translokas la cezuron:

De l' tun/elo// venas/ longa/ krio/ el la/ faŭko/;
 Ĉe la/ vosto// fume/ nigra/ strio/ nun vid/iĝas/.

Duonversoj:

Kiam oni trovas kroman silabon meze de verso, oni suspektu la *duonversion*, kiu konsistas el du neŭtralaj versoj skribitaj sinsekve kaj samverse, ekzemple:

Li/beron/ al la/ Homo// ke/ NE plu/aĵoj/ blindaj
di/rektu/ lin, sed/ tiujn// li/ regu/ per rac/io (Kalocsay)

Ĉe/ LA but/iko/ pendas// vin/beroj/ bluaj/, oraj/.

Sur/ LA vil/aĝa/ strato// po/pola/ maso/ estas/.

(Lucien Thévenin).

La duonverso povas tre konfuzi al leganto kiu ne rekonas ĝin; sekve en Esperanto la poeto kiu volas uzi duonversojn devus certiĝi pri tio, ke la ĝusta akcentado estu deviga, senalternativa; precipe ĉe la unuaj versoj.

Variantaj Metrikoj

Ofte oni alternigas metrikojn de sama ritmo, sed malsamaj longoj:

- (a) sed la/ statu/oj 2 taktoj
plu dorm/as kaj/ plu mut/as 3 taktoj
kaj nur/ la hor/oj 2 taktoj
sin pret/er il/i ŝut/as 3 taktoj

(Karolo Piĉ).

- (b) Ne min/ juĝu,/ kara,/ tro sev/era/, .. 5 taktoj
Se de/ viaj/ revmed/ito/, 4 taktoj
Ĉasta/ brusto,/ menso/ senkol/era/, .. 5 taktoj
Mi for/iros/ al mil/ito/ 4 taktoj

(Al Lucasta).

Eĉ pli ofte, oni variigas la longon de la metriko tute laŭplaĉe, sen ia reguleco, sed tio okazas nur en longaj poemoj, ekzemple en *Nordo* de Ludoviko Tárkony.

Kiam la verslongo varias en la unua strofo (versaro) de poemo, plej ofte oni ripetas la saman variadon en la sekvantaj strofoj. Vidu ekzemple *Reciproke*. En mia poemo *Pala Luno*, la metriko regule progresas kaj malprogresas laŭ longo, en spegula maniero, por imiti la lunlumon sur akvo.

Ni bezonas pli da spaco

Nun ni alvenas al tiu parto de 'miaj' principoj, kiun oni eble sentos inklinon pridisputi . . . Sed ĉiu mem decidiĝos ĉu mi estas prava. Oni foje nomis min 'leĝdonanto.' Tia mi certe ne estas. Tamen mi ja penas esti *leĝtrovanto*, kaj mi serĉas la leĝojn de la Esperanta poezio en la ecoj de la Esperanta lingvo, kaj *ne* en la ecoj de tiu aŭ alia nacia lingvo. Ankaŭ la Esperanta poezio kiu jam ekzistas ne estas ĉiam fidinda modelo, ĉar miaopinie ĝi tro ignoras la spiriton de nia lingvo, kaj tro montras la influon de nacilingvaj kutimoj. Efektive mi kredas, ke en Esperanto ni bezonas pli da spaco ol en la aliaj lingvoj; kaj tio, kion mi nun proponos, estas rimedo kiun mi povas logike subteni, kaj kiun la leganto trovos almenaŭ pripensinda.

Verstempo

La plimulto de la naciaj lingvoj posedas en granda nombro unusilabojn, kiuj en la poezio servas kiel senakcentaj silaboj. Ĉe la angla lingvo, ekzemple, povas tiel okazi, ke en iu verso ĉiu silabo estas memstara vorto. Tre ofte tiuj vortoj komenciĝas per konsonanto, kaj tio iom malrapidigas la 'verstempon,' t.e. la tempon kiun oni bezonas por deklami la version. Tamen ĉe Esperanto la senakcentaj silaboj plejofte estas vortfinaĵoj, kiuj komenciĝas per vokalo, kaj tio iom pli rapidigas la verstempon.

Plue, kiam oni komparas ekzemple la kvar versojn:

Staris sur la strato novaj domoj
 Kiujn registaro elkonstruis;
 Sed la vento, justa pli ol homoj,
 Ilin aliloke distribuis!

oni konscias, ke *la longaj vortoj fluas pli rapide ol la mallongaj vortoj*, aŭ tiel ŝajnas.

Komparu ankaŭ, laŭtlege:

Vi kaj mi do
 dolorado.

Por kontroli mian kredon, ke multsilabaj vortoj fluas pli rapide ol unusilabaj, mi ripetis sinsekve, sen paŭzo, kaj kiel eble plej rapide, la dek silabojn:

Do se vi kun mi kaj li kaj ŝi kaj.

Mi sukcesis ripeti ilin 25 fojojn en la daŭro de unu minuto. Poste mi ripetis sinsekve kaj sen paŭzo, kaj kiel eble plej rapide, la dek silabojn:

Trovos ĝin almenaŭ pripensinda.

Mi sukcesis ripeti ilin 35 fojojn en la daŭro de unu minuto. Tio sufiĉe indikas (kvankam ĝi ne pruvas) ĝeneralan leĝon:

Ju pli longaj la vortoj, des pli rapida la verstempo.

Ĝenerale la vortoj en Esperanto estas almenaŭ dusilaboj. Sekve, kiam oni tradukas verson da unusilaboj el nacia lingvo per egala nombro da silaboj, sed per *pli longaj vortoj* en Esperanto, la rezulto estas tia, ke la Esperanta verso sonas kaj aspektas malpli longa ol la originalo. Pro tio mi kredas, ke oni povas plilongigi la metrikon en Esperanto per unu, eĉ du taktoj, kaj ne tro multe ŝanĝi la entutan verstempon de la originalo. Sed kompreneble, tiu argumento validas nur kiam la origina lingvo havas multe da unusilaboj.

Kaj kiam la versoj estas tre mallongaj oni devas des pli atente pripensi, ĉu oni plilongigu la tradukan metrikon, ĉar en mallongaj versoj ia aldonajo estos pli aŭdebla ol en la longaj versoj.

La verstempo estas pli rapida ankaŭ kiam la unua silabo de trokea metriko estas malforta vorto (*en, la, de*):

Multaj homoj ne obeas

La de ni konatajn leĝojn.

Nature legate, la dua verso sonas preskaŭ kiel tritakto. Ankaŭ la vortordo, tio estas, la lokigo de la cezuro, efikas sur la verstempon. Komparu ekzemple:

Tiel vi ankoraŭ kaŭzon trovos . . .

Tiel kaŭzon vi ankoraŭ trovos . . .

La dua ekzemplo fluas pli glate, do pli rapide, ĉar la cezuro okazas post 'kaŭzon' anstataŭ post 'ankoraŭ.'

Pensenhavo

Alia efiko de la senakcentaj silaboj en naciaj lingvoj troviĝas en tio, ke ĉiu el ili, kiel aparta vorto, aldonas ion al la pensenhavo de la verso. Ĉe Esperanto la senakcenta silabo estas vortfino, kiu helpas la komprenon, sed aldonas nenion al la pensenhavo. Sekve, oni ĝenerale ne sukcesas traduki la pensenhavon de la naciaj unusilaboj per la sama nombro da silaboj en Esperanto. Tio estas plua argumento kial oni plilongigu la Esperantan metrikon.

Trian argumenton ni jam trovis en tio, ke trokea metriko egalas la jamba laŭ drama efiko nur kiam ĝi estas pli longa. Tial, per pli longa verso oni solvas tri problemojn samtempe.

La tradukanto devus elekti en Esperanto tiun verslongon kiu ebligas, ke li sufiĉe redonu la pensenhavon de la originalaj versoj, kondiĉe nur ke la entuta efiko ne tro malsimilu al la originalo.

En sia traduko de *Hamlet*, Zamenhof tre evidente suferis pro la limigoj de la kvintaktoj per kiuj li tradukis en Esperanton la kvintaktojn de Shakespeare. Li penis solvi la problemon aldonante kromajn versojn. Tio kompreneble ne estus ebla ĉe rimataj versoj; kaj ĉiuokaze, ĝi ne solvas la diferencon ĉe verstempoj inter la du lingvoj.

Miaopinie, oni povus sen maltrafa efiko traduki eĉ per trokeaj septaktoj la terure pensoriĉajn jambajn kvintaktojn de Shakespeare; kvankam mi plej ofte uzas sestaktojn. Sed ni neniam forgesu, ke *la pensenhavo pli gravas ol la originala metriko*.

Aliflanke, la versoj de Robert Louis Stevenson, kiu verkis multajn poemojn por infanoj, estas tiel simplaj, ke ili ofte ne bezonas plilongigon, eĉ pro la verstempo. Amfibrakaj metrikoj, laŭ mia trovo, ĝenerale ne bezonas plilongigon.

Mallongaj versoj estas la plej malfacile tradukeblaj. Oni devas esti pli singarda pri kromaj taktoj, kaj plue, la multo da vortoj en ĉiu verso malfaciligas ŝanĝojn de vortordo por alporti la rimvortojn ĝis la versfino.

PRI LA RIMOJ

Du vortoj rimiĝas kiam ili samsonas de kiu ajn *akcentata* vokalo ĝis la fino de la vorto, sed malsame sonas antaŭ tiu vokalo:

GANTo kaj PLANTo rimiĝas; sed GANTo kaj GIGANTo ne rimiĝas, ĉar la sama konsonanto G troviĝas antaŭ la akcentata vokalo.

GANTo kaj eleFANTo rimiĝas; sed ELeFANTa kaj ELeGANTa ne estas perfekta rimo pro la komuna akcentata EL—. Simile, kompeTENTa kaj kontENTa ne estas perfekta rimo pro la komuna T antaŭ la vokalo.

BOMBonUJo kaj TROMbonUJo perfekte rimiĝas de la unua akcentata vokalo.

BONa kaj BELa, MANo kaj KAPo, AMas kaj IRas, *ne* estas rimoj, ĉar la similaj partoj de tiuj vortoj estas *senakcentaj*. La franca korespondanto kiu atentigis min pri tio, ke mi uzis '—as rimon dufoje en la sama poemo,' verŝajne akcentas la lastan silabon anstataŭ la antaŭlasta, ĉar tio estas kredebla franca eraro. Tamen li pravas en tio, ke oni pli prudente evitu troan sinsekvon de *-o*, *-as*, k.t.p., ĉe la versfinoj. Ĉe miaj fruaj poemoj mi ne konstatis tiun principon, kaj tie kaj tie oni trovas serion de o-aj finaĵoj.

Laŭ ĝenerale akceptita regulo, rimoj inter sufiksoj (*monteto—rideto*) estas malbonaj, krom se ankaŭ la radikoj rimiĝas (*monteto—ponteto*). Sed ekzemple *monteto—peto* estas bona rimo. Du sufiksoj povas rimiĝi kun unu radikoj, kondiĉe ke tiu radikoj troviĝu inter la sufiksoj: *monteto—peto—rideto*.

Rimoj inter participoj estas evitindaj: *kantanta—skribanta*. Oni observu la samajn principojn inter participoj kiel inter sufiksoj. Kvankam iu rimskolo uzas 'kvazaŭ-rimojn' (*havi—trafi*; *pompa—tompa*), ŝajnas al mi pli konsilinde verki laŭeble sen ilia helpo.

Ju pli longaj la versoj, des pli proksimaj estu la rimvortoj, por ke la leganto ne forgesu la rimsonon. Tre plaĉa estas la 'interna rimo,' ekzemple:

Post griza kupolo el nuba tavolo
 Sin kaŝas la suno;
 Jam pasis somero kaj sur nia tero
 Ekregas aŭtuno.

(J. H. A. Sens).

Tradukante, oni observu la rimskemon de la originalo. Sed kiam la rimskemo estas neregula en la originalo, ankaŭ en Esperanto oni povas rimi neregule kaj, miaopinie, sendepende de la originalo, kondiĉe ke la ĝenerala efekto restu sama. Kie la rimo rilatas ankaŭ al la senco, ekzemple pro onomatopeo, tie oni kompreneble konservu ĝin. Kiam en neregula rimskemo troviĝas kelkaj senrimaj versoj, almenaŭ la fina verso devus rimiĝi.

Problemoj kaj Solvoj

Pro la malmulto da radikoj en Esperanto la rimado estas treege malfacila. Oni preskaŭ ne povas ne trouzi iujn rimparojn, kaj tio, kompreneble, estas malbona. Por multaj vortoj ne ekzistas rimvortoj; pro tio, kaj pro la ĝenerala malmulto da rimvortoj, iuj verkantoj enkondukas la kvazaŭrimojn kaj neologismojn (trista—Esperantista).

Sed pli fundamenta solvo sidas en vortordo, kiu ne lokas senriman vorton ĉe la versfino. Danke al la akuzativa -n, oni facile ŝanĝas la vortordon en Esperanto. Tiuj, kiuj volas forigi la akuzativon, forgesas ke tio iom rigidigus la vortordon en nia lingvo, kaj multe pliigus por la poeto la jam ekzistantajn malfacilojn.

La serioza verkanto nepre bezonas fidindan rimvortaron, por ke li facile vidu per unu vido ĉiujn radikojn kiuj konvenas al lia celo. Tian libron oni povas aĉeti; alternative, oni povas verki la propran.

Foje oni sukcesas trovi sinonimon por la malfacila vorto. Kvankam inter la radikoj la sinonimoj estas malmultaj, tamen por diversaj radikoj oni povas elpensi kunmetitajn sinonimojn, ekzemple: teruro, timego; arbo, kreskaĵo; domo, loĝejo, konstruaĵo; knabo, infano, junulo; sitelo,

akvujo; k.t.p. La kunmetaĵo ofte havas pli ĝeneralan sencion ol la radiko, sed iufoje ĝi sufiĉas por eviti tedan ripetadon aŭ por helpi la rimon.

Alia solvo foje troviĝas en la 'kvazaŭ-sinonimoj' al kiuj mi jam aludis rilate al la *mal-* vortoj. Per 'kvazaŭ-sinonimoj' mi celas vortojn kiuj ne estas veraj sinonimoj, sed kiuj funkcias kiel sinonimoj en iuj apartaj cirkonstancoj. Ekzemple, anstataŭ *FIERA* oni povus uzi, laŭ la kunteksto: *MEMSTARA popolo*; *AROGANTA mieno*; *VANTAJ vortoj*; *HONORINDA familio*; *SENTEMA junulo*, k.t.p. Oni rimarkas, ke la kvazaŭ-sinonimoj estas multokaze pli trafaj ol la originala vorto *FIERA*. Mi aldonas kelkajn listojn ĉe la fino de la libro, kaj la verkemulo povos elpensi pluajn laŭ bezono. Kompreneble mi kompilis ilin laŭ la diversaj anglaj sencoj de la normaj vortoj. La listoj eble ne validas en ĉiu detalo por ĉiuj lingvoj, sed mi esperas ke ili estas sufiĉe ĝeneralaj por utili kaj por klarigi la rilatan principon.

Alia rimedo por solvi la rimproblemon en Esperanto estas rimado nur ĉe la alternaj versoj: ĉiu dua kaj kvara. Sed ĝenerale tiu rimedo estas uzebla nur por originala verko.

Pri senrima poezio mi jam klarigis ke oni kompensas la rimomankon per ideoriĉo. Sed multaj legantoj ne povas legi senrimajn versojn. La okaza leganto de poezio aŭskultas precipe la sonon—la ritmon kaj la rimojn. La versklerulo, aliflanke, jam preteriris tiun punkton, kaj trovas la plej grandan plezuron en la ideoj, la evoluado de la temo, la lingva boneco, eĉ en klara kaj senornama simpleco.

Alivorte, la senrima poezio estas la poezia formo por la specialisto, ĉar ĝi dependas tute de la ideoj kaj lingva povo—kaj nur tiuj kvalitoj multe interesas la poezikonanton. Sed la okaza leganto ne rimarkas, aŭ ne ĝuste taksas, la trafan kvaliton de la ideoj aŭ de la esprimmaniero; li nur sentas la mankon de la rimo, la sola aspekto de la poezio kiun li komprenas. Ankaŭ ĉe la rimataj poemoj kiujn li

ĝuas li ofte ne rimarkas la ideoriĉon, tro atente aŭskultante la ritmon kaj rimojn. Oni devas *evolui* la kapablon ŝati la rimarkindaĵojn de senrima poezio. La kapablo ne estas denaska, sed edukita. Sekve la sama *genieca* poemo restas ĉiam ĝuinda, ĉar la progresanta edukiĝo de la konstanta poezileganto daŭre ektrovas novajn belaĵojn en la malnova verko.

Mi esperas ke la leganto tiel spertos ekzemple ĉe la sceno el *King John*, en ĉi tiu libro. Se oni esceptas nur la Esperantigon, pri kiu kompreneble mi respondas, tiu konata kaj amata elĉerpaĵo ĉiel ekzemplas la plej altajn kvalitojn de senrima poezio.

Oni foje legas en Esperanto *mallongajn* senrimajn poemojn; sed bona principo estas tio, ke nur longaj poemoj estu senrimaj, ĉar ĝenerale la enhavo de la mallongaj ne sufiĉas por kompensi la rimomankon.

PRI LINGVA BELECO

Vortmuziko

Oni foje kaj prave atentigas pri plua malfacilaĵo en la tradukado de poezia verko, nome la imito de sonoj. En la originalo la poeto instinkte kreas la senton, la 'atmosferon,' de la poemo, kaj subtenas tiun senton tra la poemo ne nur per la elekto de taŭgaj vortoj, sed ankaŭ per lerta ripetado de iuj literaj sonoj; ekzemple, 'u' por malĝojo, ruino, kadukiĝo, k.t.p.; 'e' kaj 'i' por rapideco, alteco, k.t.p. Komparu la vervan sonon de: *Vigla vento de mateno fajfas tra l' fenestro* kun la organeca: *Tra la urbo uragano zumas kiel burdo*. Ĝis kiu grado la tradukanto devus imiti la originalajn literaj sonojn?

Antaŭ du jaroj mi enlistigis la ĉefajn literojn en la Esperantaj vortoj kiuj esprimas sentojn aŭ emociojn. Mi trovis, ekzemple, ke por esprimi *malĝojon* per Esperanto, oni uzas plej ofte la vokalojn U, O, A, kaj la konsonantojn C Ĉ F L M N R S Ŝ V Z (plejparte la daŭrantaj aŭ fluantaj konsonantoj): larmo, laca, soleca, kortuŝa, funebra, mallumo, plori, morti, doloro, mizero, k.t.p. (Ĉe 'mizero'

la konsonantoj, ne la vokaloj, estas konformaj al la skemo). Poste mi esploris la anglajn vortojn kiuj esprimas malĝojon, kaj trovis en ili preskaŭ la samajn sonojn (krom, kompreneble, iujn kiuj apartenas nur al la angla lingvo): *gloom* (elp. glum—malĝojo aŭ mallumo); *funereal* (fjunirial—funebra); *lone* (loŭn—sola); *shadow* (ŝado—ombro); *dark* (malluma); *disaster* (dizasta—katastrofo); *mournful* (mornful—malgaja), k.t.p.

Mi trovis ke, kvankam multaj el la literoj reaperas en diversaj listoj, ĉiu listo entute havas individuan karakteron. Kiam la vokaloj en iu listo estas samaj kiel la vokaloj en alia listo, la konsonantoj estas malsamaj; ili povas esti, ekzemple, eksplodemaj ĉe unu, fluantaj ĉe alia, senvoĉaj ĉe unu, pervoĉaj ĉe alia. Nek la vokaloj nek la konsonantoj tutsole fiksas la senton de la vortoj, sed nur la kombino de tiuj elementoj. Oni rimarku ankaŭ, ke la konsonantoj iom efikas sur la vokalojn: la 'o' en 'ol' estas malpli forta ol la 'o' en 'ombra,' ĉar tiu lasta antaŭstaras du 'pezajn' konsonantojn; simile, la 'o' en 'ombra' estas iomete pli forta ol la 'o' en 'ofta,' ĉar la 'f' kaj 't' estas senvoĉaj konsonantoj.

Mi havas teorion, kiun ĝis nun mi ne tute elprovis, ke la listoj pli-malpli validas por ĉiuj lingvoj. Pri tio, mi bonvenigus *pristuditan* informon, precipe rilate al la slava, ĉina kaj japana lingvoj: per kiuj sonoj oni plej ofte esprimas ekzemple amon, malamon, ĝojon, malĝojon, rapidon, malrapidon, teruron, trankvilon, altecon, brilon, akvofluon, k.t.p.

Ĉiuokaze la supraj ekzemploj el la Esperanta kaj angla lingvoj (kiuj inter si reprezentas diversajn aliajn lingvojn kun komuna vortdiveno) sufiĉas por montri, ke ekzistas multaj vortoj en ĉiu lingvo, kiuj egale esprimas la malĝojon per iuj literoj en la komuna listo; sekve ne necesas ke oni traduku, ekzemple, malĝojan vorton en la originala lingvo per la samaj literoj en Esperanto. Kondiĉe ke la Esperanta vorto enhavu kelkajn literojn el la sama grupo, ĝi sufiĉe subtenas la saman senton. Lerta tradukanto elektas per

instinkto Esperantajn vortojn, kiuj havas muzikan kvaliton egalan al la originala.

Resonado kaj Samliterado

La muzikeco de poemo dependas ne nur de lerta vortelekto. Robert Louis Stevenson en angla verko montris, ke la vortmuziko rezultas el la ripetado aŭ resonado de kelkaj sonoj tra pluraj versoj, kaj, post iom da silento, la eĥado de tiuj sonoj en pli postaj versoj.

Mi citas kelkajn versojn el la poemo *Nordo*, de Ludoviko Tárkony:

1. Vi, fortbrakaj faligantoj de pinarbaroj krutmontaj,
2. firmlandaj fiŝantoj de profundoj tempestandaj,
3. Muskolaj minantoj de fero,
4. feliĉaj filoj de la laboro kaj libero,
5. vi homoj,
6. loĝantoj en puraj, belaj urboj aŭ en solecaj domoj,
7. vi, laboremaj, mildaj miloj:
8. el via koro, ĉi fekunda, varma humo,
9. tra viaj puraj pupiloj
10. la bono kaj amo inundas kun mutaj briloj
11. kiel tra neĝaj noktoj, la fee fosforeska brakumo
12. de la Norda Lumo!

Elstaraj inter la sonefektoj de tiuj versoj estas la ekzemploj de *samliterado*, t.e. de sinsekvaj vortoj kiuj komenciĝas per la sama sono: *fortbrakaj faligantoj, muskolaj minantoj, laboro kaj libero*, k.t.p. Samliterado estas konata rimedo en ĉiu lingvo por atingi vortmuzikon. En Esperanto ĝi estas tre facile farebla—plurfoje ĝi okazas tute hazarde, kiel ĉe la vortoj ‘facile farebla.’ Sekve oni devus sin deteni de troa uzo.

Tamen, samliterado estas nur parto de la tuta resonada skemo, kiun ni nun studos ĉe la supre cititaj versoj.

En la unua verso oni aŭdas precipe la sonon *f*. Tiu sono aŭdiĝas denove en v.2, ĉe la fino de v.3, kaj komence de v.4. En v.5 la *f* fariĝas la pli solida *v*. En v.6 la *f*—*v* sonoj silentas, sed la *v* revigliĝas en v.7, 8 kaj 9, kaj poste silentas. La *f* mallonge eĥas en v.8, kaj denove fortiĝas en v.11.

Oni, povus diri, ke *f* estas la gamnoto de la poemo! Sed aliaj sonoj ripete akordas kun la *f*. La *l* sonas mallaŭte tra la tuta poemo; la *p* de ' pinarbaroj ' en v.1 sonas trifoje en v.2, eĥas en v.6, kaj plenfortiĝas en v.9. La *m* kiu regas la trian verson eĥas en v.5 (homoj), kaj v.6, fortiĝas en v.7, resonas en v.8, kaj eĥas en vj. 10, 11, 12. Oni aŭdas la pezan *b* kiel bason, en v. 1, 4, 6, 7, 10 kaj 11. Ĝi pli aŭdiĝas apud la fino de la poemo, kaj kombinas kun *d* (frue enkondukita) por krei tre fortan finon, kiun helpas ankaŭ la *n* en versoj 8, 10, 11 kaj 12.

Kompreneble, la lerta poeto, verkante, ne tiel analizas sian verkon. Li elektas muzikecajn vortojn per instinkto, kaj gradigas la muzikan skemon laŭ la pensemocioj kiujn li volas esprimi. Sed la kapablo analizi la sonskemon valoras kiam la verkanto hezitas inter du vortoj kiuj egale taŭgas rilate la sencon. Tiu, kiu pli ĝuste konvenas al la sonskemo ĉiam estas la pli elektinda. Aliflanke, kiam iu verso sonas nebona sed la kaŭzo ne estas evidenta, oni ofte trovas ke iu vorto malakordas kun la sonskemo; oni elektas alian vorton kiu estas konforma al la sonskemo, kaj la nebonaĵo malaperas. Ĝenerale, la plej fortaj sonoj okazas ĉe la fino de la poemo, precipe rilate la vokalojn. Kiam finita poemo ne sonas finite, tio povas rezulti el finaj *i kaj e* post serio de *a, o kaj u*. Tio ne diras, ke oni ne finu poemon per *i kaj e*.

En la versoj el *Nordo* la vokaloscemo estas tre interesa. Ĉe la versoj 1, 2, 3, la burdecaj *a, o, u* superas; ĉe la mezaj versoj ili cedas lokon al la pli akraj *i kaj e*, kaj pro kontrasto la *o kaj u* de la finaj versoj des pli soleniĝas.

Onomatopeo

Tio okazas kiam la vortoj imitas la sonojn kiujn ili nomas aŭ priskribas, ekzemple:

Kaj ĉe l' antaŭaĵo la akvo, sub ligna vizaĝo spitema,
Saŭmas, ŝiriĝas kaj ŝmacas kontraŭ kanoto traprema.

(*Vojaĝo de la Maorioj*).

Konsonantoj inter unusilabaĵoj
Kiel kugloj kontraŭ ŝildon interklakas.
 (Malnovaj Lampoj).

Inversigo de la vortordo foje estas tre agrabla:
 Ĉu pereanta estas nun la mondo?
 Ĉu tute ne ekzistas plu ekstero?
La floroj ne, kaj ne la mara ondo?
 (La Papilio, P. T. Justesen).

Per Personigo oni vestas senvivan objekton per homecaj kvalitoj aŭ povoj:

- (a) Estas ja por filo ĝoje
 Ĉe *sinjoro Morto* foje
 Paŝti brutojn de Mortejo.
- (b) 'glavo sangon *soifanta*' (La Espero)
- (c) Al tiu kaj al tia *Paco jam ignoras*
 Ĉar nur al oferemaj homoj *ŝi favoras*.

Similaĵo estas la enkonduko de objekto kiu ne apartenas al la temo, por fari komparon. Tio en Esperanto ofte postulas la uzon de la vortoj 'kiel' aŭ 'kvazaŭ,' aŭ la finliteron 'e.'

Ekzemple:

- (a) Vin rigardis mi, fraŭlino,
kiel knabo novludilon,
 vin aŭskultis mi, fraŭlino,
kiel arbaro printempa
kanton de ora kukolo.
 (Eino Leino—V. Setälä).
- (b) *Leone* li batalis.
- (c) Ha, zumanta, sortoplena sago,
Kvazaŭ vespo zumis ĝi kaj pikis.
 (Hiavata).

(En tiu elĉerpaĵo troviĝas ankaŭ: samliterado, resonado, onomatopeo kaj inversigo),

Metaforo

Kvankam oni ofte uzas la vorton 'metaforo' laŭ ĝenerala senco, por nomi literaturan figuraĵon, ĝi havas ankaŭ pli precizan difinon; ĝi estas esprimo per kiu oni nomas homon k.t.p. per la nomo de io alia al kio li portempe similas, ekzemple: 'Li estas *leono* en la batalo,' 'Li havas la *forton de bovo*,' 'La vento *ploris* inter la arboj.' Kiel ekzemplojn de Metaforo mi citas:

- (a) Vi vidas en *mi tagon, kiu palas*
Post sunsubiro en la okcidento
(*Soneto LXIII*, Shakespeare—Kalocsay).
- (b) Vi, *kolombo inter rabaj akcipitroj*
(*Memore de Zamenhof*).
- (c) ĉar la granda vero
Fendas la kokonon de l' homeca limo.
(*Memore de Zamenhof*).
- (ĉ) La ruinaĵo *dronis* en alta firmamento,
La ŝtormoj *katenitaj* sub ĝia ŝtontegmento
Elblovis muzikon subliman.
(Hugo—Delcourt).
- (d) Svarmo da rufaj agloj kaj vulturoj gigantaj
Kirlflugas tage nokte ĉe l' pordoj *oscedantaj*.
(*Babelo*, Hugo—Delcourt).
- (e) Forte staras *muroj* de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj.
(*La Espero*, Zamenhof).

Ĉe metaforoj, do, oni ne uzas la vortojn *kiel, kvazaŭ*.

Tradukante Esperanten, oni devas esti ĉiam tre singarda rilate al metaforoj, kiuj jen kaj jen estas nekompreneblaj por alilingvanoj. Tamen la metaforo estas belega kaj esenca parto de la poezio. Preskaŭ ĉiu nacia lingvo estas riĉa je metaforoj. Esperanto povus alpreni la plej trafajn el ĉiuj lingvoj, kaj aldoni la proprajn. Ellasante ĉiun metaforon, la tradukanto prezentas al ni nur la *senkarnajn ostojn* de la originalo.

Kiam oni penas traduki el lingvo kiu estas riĉa je unusilaboj, kiel ekzemple la angla, per sama silabonombro en

Esperanto, oni nepre devas forĵeti ion; kaj la forĵetaĵo tro ofte estas trafa detalo, aŭ metaforo. Tion Zamenhof spertis kiam li Esperantigis *Hamlet*. Kvankam oni ne povas ne admiri la kvaliton de la Zamenhofa traduko, la brita poeziamanto tamen domaĝas la perditajn detalojn kaj metaforojn, kiuj estas la fibro de la Shakespeare'a stilo. Mi citas kiel ekzemplon:

Angle: Yet here, Laertes! aboard, aboard for shame!
The wind sits in the shoulder of your sail,
And you are stayed for.

Esperante: Vi ankoraŭ estas tie ĉi, Laertes! Pro honto,
al la ŝipo, al la ŝipo!
La vento sidas ĉe la ŝultro de la velo
Kaj oni vin atendas.

Zamenhof: Vi ankoraŭ
La domon ne forlasis? Al la ŝipo!
La vento blovas helpe al la vojo,
Kaj oni vin atendas.

Kiel poeto kaj kiel velboatamanto mi neniam ĉesos domaĝi la ellason de tiu lasta metaforo en la Esperanta traduko. Ĉu Zamenhof trovis neeble esprimi ĝin en la limo de kvintakta metriko, aŭ ĉu li timis ke alilingvanoj ne komprenos ĝin? Sendube ambaŭ konsideroj influis lin. Tamen, ĉiu klera homo scias, ke la tiutempaj veloj estis plimalpli kvadratformaj, kaj ke la 'ŝultro' de la velo tial devas esti unu el la supraj anguloj. Kompreneble, la vento ne povas 'sidi,' tamen tiu metaforo konvenas al la ideo ke la vento restas en la kavaĵo de la velo, kaj tie kvazaŭ atendas, blovante laŭ konstanta kaj oportuna direkto. Per la Shakespeare'a metaforo oni mense *vidas* la ŝipon kaj ventoplenajn velojn.

Do, kion ni faru por la kontento de la samideanoj? Ĉu ni oferu la metaforojn por konservi la metrikon, aŭ plilongigu la metrikon por konservi la metaforojn? Pri tio mi ne hezitas: plilongigu la metrikon!

PRI LA SENTO

Kiam oni tralegas poemon oni ne nur legas sed ankaŭ *sentas* ke ĝi estas melankolia, gaja, solena, vigla; ke ĝi traktas pri io rapida, alta, funebra, profunda, k.t.p. Oni konscias pri tio antaŭ ol la vortoj mem tion diras. La angloj nomas tion 'atmosfera,' kaj verdire tiu sento ĉirkaŭas kaj saturas la poemon kiel la atmosfera ĉirkaŭas kaj saturas la teron. Iuj verkistoj proponis la neologismon *etoso*, el la greka *ethos*, kiun mia angla vortaro difinas kiel: 'la karakteriza spirito de komunumo k.t.p.' Kondiĉe ke oni povu apliki al poemo kion oni aplikas al komunumo, *etoso* ŝajnas al mi akceptinda vorto; kvankam mi ĉiam supozis ke *etoso* rilatas pli ĝuste al moralaj leĝoj.

La jenaj komencaj vortoj el diversaj poemoj klare transdonas al la leganto la *atmosferon* aŭ *etoson* de la tuta poemo, kvankam oni ankoraŭ ne scias, kion la poemo diros:

Zamenhof!—konato en la hejmo de doloro.

(Solena, eĉ melankolia temo).

Ĝentila, ĉarma tiel ŝi aspektas (Dante Alighieri—J.

(Verva, gaja temo).

Hartley).

Kiel grandega rifo elstara super maro (Hugo—Marcel

(Solena, grandioza temo).

Delcourt).

En la fundo de la valo

(Lucien Thévenin).

(Soleca, kampara temo).

Kadavroj naĝas, lulas sin kaj naĝas (Kovačić—Vanĉik).

(Terura, naŭza temo).

Se iam vin mi perdos, amatino (Moslim Ibn il Walidil

(Amtemo).

Anssari—W. Lippmann).

Kelkaj malnovaj madrigaloj

postrestis sur paperoj flavaj

(Kalocsay).

(Dolĉmemora temo).

Al la lumo direktadu

Paŝon kaj rigardon

(F. Hahn).

(Filozofia temo).

Sendube, tio estas signo de bona poemo, kiam oni fiksas la senton, la atmosferon, per la unuaj versoj. Sed sole tio ne sufiĉas. Oni devas subteni tiun senton tute tra la verko,

aŭ almenaŭ ĝis tiu tempo kiam ŝanĝita temo postulas ŝanĝitan senton.

Oni subtenas la atmosferon de poemo per diversaj rimedoj, ekzemple per trafa elekto de vortoj, per resonado, per ripetado, per onomatopeo, per ofta aludo al detaloj kiuj plifortigas la emocian fonon, per diversaj figuroj, kaj per la metrika longo.

En *Soneto LXIV* de Shakespeare, ekzemple, rimarku la senton de *kadukiĝo*, kiun subtenas ne nur la resonantaj vokaloj *u* kaj *a*, sed ankaŭ la vortoj *antikva*, *disskui*, *perdo*, *forkonsumita*, *ruinon*, *morto*. En *Soneto LXXV* rimarku la kontraston inter versoj 3, 4, 5, kaj versoj 6, 7, 8; kaj inter la vortoj *beleco*, *flora*, *miela spiro de somero*, kaj la vortoj *sieĝon de batantaj tagoj*, *masivaj rokoj*, *feraj*, *gigantaj*, *persistos*.

La ripetado estas konata trajto de la poemo *Hiavata*, kaj ĝi iel subtenas la senton de simpleco kaj naturvivo. Oni trovas ĝin ankaŭ en la etosaj versoj de Lucien Thévenin. Onomatopeon mi jam citis el *La Vojaĝo de la Maorioj*, kaj en tiu poemo la longa amfibraka metriko ruliras kiel la marondoj sub la kanotoj. Aliflanke, la mallongaj versoj de *Dancas Fingroj* (Adamson) trafe subtenas la senton de rapido.

RESUMO

Sumigante per kelkaj frazoj la principojn, kiuj nun gvidas min kiam mi verkas aŭ tradukas la poezion, mi celas jene:

1. Laŭeble eviti ĉion kio iras en la direkto al aparta Esperanta dialekto por la poezio, precipe la elizion kaj nebezonatajn neologismojn.

2. Laŭeble eviti neregulecon ĉe ritmo kaj rimo.

3. Nepre taksi la ideojn super la formo aŭ mekaniko: traduki 'viran' ritmon per parenca 'ina' ritmo, konforme al la ecoj de Esperanto; kaj plilongigi la metrikon kiam tio necesas por traduki la tutan pensenhavon kaj egaligi la verstempon, kondiĉe nur ke la entuta rezulto pensigu pri la originala formo. Tio ne diras, ke oni nepre plilongigu la

metrikon; kaj ĉe kelkaj lingvoj kaj kelkaj ritmoj, kies vortlongo similas al tio de Esperanto, la kromaj taktoj ofte ne estas necesaj.

4. Solvi problemojn ŝanĝante la vortordon, aŭ la vortojn, aŭ per 'kvazaŭ-sinonimoj.'

5. Atenti pri vortmuziko, resonado, lingvaj figuroj, metaforoj kaj 'atmosfera.'

Mi ne konstatis ĉiujn principojn jam de la komenco. Mi eltrovis ilin nur paŝon post paŝo, kaj tial oni foje trovas, ke en miaj pli fruaj verkoj mi ignoris principojn (ekzemple ĉe ritmo) kiujn mi nuntempe observas. Kaj sendube restas principoj ankoraŭ trovotaj. Pro tio mi aldonas sub ĉiu poemo la daton kiam mi verkis ĝin.

Fine mi volas diri ke la poezio estas arto, ne scienco. Plejparte, la principoj pri kiuj mi atentigas la leganton estas gvidiloj, ne leĝoj. Ĉe la poezio ni Esperantistoj—malgraŭ la bonega laboro de Zamenhof, Kalocsay kaj multaj aliaj—ankoraŭ palpas vojon tra frumatena duonlumo. La jam ekzistanta poezio ne estas tute fidinda normo, ĉar multaj trovas ĝin ne ĉiurilate kontentiga. Ni do konservu ĉion kio estas bona en la ĝisnuna tekniko, forĵetu ĉion kio estas nebona, kaj daŭrigu nian vojon fidante al nenio ekster la fundamentaj ecoj de Esperanto mem.

Leigh, 10.x.1949.

**ORIGINALAJ
POEMOJ**

DU MANOJ

Du manojn mi vidas,
Ĉiu bela kaj juna;
Unu tre blanka,
Kaj unu tre bruna;
Unu kun ringoj,
Kaj unu kun ĉenoj—
Kiel elekti
El tiaj katenoj?

Du manojn mi tenas,
Ĉiu firma kaj viva;
La blanka malvarma,
La bruna naiva;
Unu fera,
Kaj unu fidema—
Kiel elekti
Kaj resti sentrema?

Du manojn mi kisas
Scivole, kun ardo;
La blanka respondas
Per akra singardo;
La bruna modeste
El mia sin tiras—
Kaj nun kaj eterne
Mi tiun deziras.

7.12.1943

VENAS LA VENTO

Laŭlonge de tiu monteta konturo
La vico de pinoj en ombra purpuro
Aŭskultas kun zorga atento;
Kaj kiel orgeno, ilia susuro
Avertas la valon per plenuverturo:
" Pretigu, ĉar venas la Vento! "

Ĝi venas kun voĉo fortege sonora
Kaj, dio el nuboj, spirito esplora,
Momenton la Teron surspiras.
Kaj ĉiu kreskaĵo, ĉu arbo ĉu floro,
Tremante kliniĝas, piece fervora,
Ĝis kiam la dio foriras.

12.2.1944.

DU MANOJ

Du manojn mi vidas,
Ĉiu bela kaj juna;
Unu tre blanka,
Kaj unu tre bruna;
Unu kun ringoj,
Kaj unu kun ĉenoj—
Kiel elekti
El tiaj katenoj?

Du manojn mi tenas,
Ĉiu firma kaj viva;
La blanka malvarma,
La bruna naiva;
Unu fera,
Kaj unu fidema—
Kiel elekti
Kaj resti sentrema?

Du manojn mi kisas
Scivole, kun ardo;
La blanka respondas
Per akra singardo;
La bruna modeste
El mia sin tiras—
Kaj nun kaj eterne
Mi tiun deziras.

7.12.1943

VENAS LA VENTO

Laŭlonge de tiu monteta konturo
La vico de pinoj en ombra purpuro
Aŭskultas kun zorga atento;
Kaj kiel orgeno, ilia susuro
Avertas la valon per plenuverturo:
“ Pretigu, ĉar venas la Vento! ”

Ĝi venas kun voĉo fortege sonora
Kaj, dio el nubo, spirito esplora,
Momenton la Teron surspiras.
Kaj ĉiu kreskaĵo, ĉu arba ĉu flora,
Tremante kliniĝas, piece fervora,
Ĝis kiam la dio foriras.

12.2.1944.

KONTRASTO

Jen junulino, pri kies beleco
Ĉiu drinkulo, laŭ sia mokdeco,
Kaj ĉiu soldato post ĉiu batalo,
Tostas avido el plena pokalo;
Al kiu riĉulo kaj princo kaj reĝo,
Kaj ĉiu junulo sen saĝo aŭ leĝo
Celas alplaĉi per ĉia juvelo
Aŭ verŝo de sango en brua duelo.

Ja bela ŝi estas, ĉi tiu virino;
Sur vangoj kaj lipoj jen helkarmezino;
Kaj kiel la nokto pro foraj stelaroj,
Nigre briletas okuloj kaj haroj.
Sed ŝin mi figuras velkinta pro aĝo:
Amara megero kun ĉia domaĝo;
Soleca, senama, malriĉa inaĉo,
La temo de ĉiu malica kunklaĉo . . .

Do vin, amatinon, mi ĝoje revenas
Kaj kontraŭ la koro dankeme vin tenas;
Ĉar viaj okuloj briladas pro amo,
Feliĉo sufiĉas al vi por ornamo.
Honeste kaj simple vi tage laboras,
Kaj kiu vin konas, vin tiu honoras.
Ĉiam pli dolĉa, kaj ĉiam pli bela,
Vi restas, por mi, anĝelino ĉiela.

6.3.1944.

RECIPROKE

Kiam la zefiro dolĉe vagas tra l' arbaro,
La voĉo kiu flustras inter la folioj estas via;
Kiel, dum sunoraj tagoj, mia revo fantazia
Imagas vian ridon en la ridetanta maro.

Kaj kiam nokte ekpluvas
Mallaŭte, avertante pri la ŝtormo,
Mi kredas aŭdi ĉiam
Vian robon, kiu trenetiĝas tra la dormo.

Kaj reciproke, kiam sola antaŭ vi mi staras,
Rideto via estas maro kie mi feliĉe dronas;
Kaj kvazaŭ dolĉe murmuranta vento via voĉo sonas,
Pasia pro la paradizo kiun Amo faras.

Kaj ĉie, kie vi paŝetas,
Pli arde flirtas ĉiu flora rondo,
Ĝis ne plu mi scias,
Ĉu la tuto estas vi, aŭ vi la tuta mondo.

31.10.1944.

(Tiu, kiu tralegis miajn *Principojn*, rimarkos, ke mi komencis la supran poemon per neregula *anapestino*. Tiun ritmon mi tiutempe ne eltrovis kaj ne komprenis; sekve la dua verso, kiu trokee estas tute regula, tamen lamas kiam oni legas ĝin *anapestine*. La punkto ŝajnas al mi grava. La kvara verso estas preskaŭ perfekte *anapestina*).

LA VOJAĜO DE LA MAORIOJ

Al Nov-Zelando

Laŭ la plej fidindaj legendoj de la Maorioj mem (kiuj, manke de skribarto, lernis parkere sian historion), la lerta navigisto *Kupe* unue trovis Nov-Zelandon je proksimume 950 P.K., kaj reiris al la fabla insulo Hawaiki (eble Raratonga), kun interesa rakonto pri bela lando multe pli sude. *Kupe* mortis, du jarcentoj pasis, kaj la popolo preskaŭ forgesis pri lia eltrovaĵo. Tiam ekflagris intertribaj kvereloj; la sango fluis, kaj fine iu *Ngahue*, rememorante pri la lando kiun trovis *Kupe*, aranĝis elmigran de Hawaiki per ok grandaj, duoblaj kanotoj; kredeble mil gehomoj foriris de la hejmlando kaj velveturis tra ŝtormoj kaj aliaj danĝeroj trans dumil mejlojn da maro, sen markartoj aŭ kompasoj. Foje la vento antaŭenblovis ilin per la altaj, teksitaj veloj el kano; foje ili padelis. Estas mirinda atesto pri la lerteco de maoria navigado, ke ĉiuj ok kanotoj atingis Nov-Zelandon.

Ce la postaĵo de ĉiu kanoto staris alta, ĉizita stango; ĉe la antaŭaĵo, 'ligna vizaĝo spitema' kun orientaj okuloj el perlamoto, kaj nekredeble longa kaj insulta lango.

En la tropikaj regionoj, la krepusko daŭras tre mallonge, kaj kompreneble la Maorioj rimarkis la diferencon, kiam ili venis al Nov-Zelando. Iu traduko de la maoria nomo por Nov-Zelando—*Ao-te-a-roa*—estas 'Lando de longa krepusko.' Aliaj tradukoj estas, 'Lando de la longa, blanka nubo' kaj 'Lando de matenruĝo.'

Super la rando de l' maro leviĝas denove la vento,
 Forta spirado de *Rangi*, prapatro de tero kaj gento;
 Dio pro kies ordono la suno turmentas skarlate,
 Aŭ nigra nubaro aperas, el fonto infera vokate . . .
 Kaj antaŭ la dia spirego forsaltas la grandaj kanotoj,
 Kiel de faŭko balena terure forsagas la sprotoj.
 Rapide ruliĝas la ondoj, konante la dian koleron,
 Kaj levas la pezajn kanotojn alte en bruan aeron . . .

Ĉie ni vidas la maron, kaj ĉiam ni tamen soifas.
 Kiom al niaj mortantoj tiom da akvo signifas?
 Vane kantadis sorĉistoj, vane ni petis la diojn;
 Sed tiuj, anstataŭ la pluvon, nur sendis al ni agoniojn.
 Malsupren, malsupren ni siblas, kaj supren altiĝas la
 ondo;

Foriĝas la blua amplekso, ĉirkaŭas nin nova marmondo:
 Mondo el verdaj vidaĵoj, el ombroj purpure minacaj,
 Inter la maraj deklivoj, inter gigantoj malpacaj.
 Kaj ĉe l' antaŭaĵo la akvo, sub ligna vizaĝo spitema,
 Ŝaŭmas, ŝiriĝas kaj ŝmacas kontraŭ kanoto traprema,
 Kaj sternas laŭlonge de l' flankoj sibladon de salaj
 bobeloj,

Formatan laŭ granda lancpinto per iaj sorĉistaj tabeloj.
 Fariĝas ni mem la tenilo—Ĉu bona, ĉu mala aŭguro?
 Ne grave; nur vantas la signoj: sufiĉu la nuna teruro.
 Jam multaj el niaj mortintoj, animoj sen pluaj
 konsternoj,

Forvagas kun maraj feinoj, forgesas en verdaj kavernoj
 Por kiuj la lumo devenas el tiu fontano fajrera
 Kiun kirleto ekvekas, en maro dum nokto somera . . .
 Aliaj, soife frenezaj, la maron venenan englutis
 Kaj tuj kun kaŝitaj koboldoj la rajton ĉeesti disputis.
 Venkite de tiaj demonoj, la homoj en ondojn sin ĵetis—
 El la fidinda kanoto, kiun ni pene kunmetis
 Sur grundo de fora Hawaiki, per arto zorgema kaj sperta,
 El arboj malmolaj formita, laŭ scio provita kaj lerta . . .
 Aliaj, silente kuŝantaj, senvorte kadavroj fariĝis
 Kiam espero elmortis kaj vivo jam tro amarigis.
 Kaj jen iu tia la buŝon malfermas pro ŝajna ekmiro,
 Aŭ kvazaŭ insiste flustriĝus la lasta, kaŝita sopiro.
 Kaj ties okuloj elstaras, sen vido en lumo abunda,
 Kiel okuloj de monstro tirita el maro profunda:
 Okuloj per kiuj li vidis la palmojn kliniĝi pro vento,
 Kaj larmis sekretan ' adiaŭ ' dum ĉiu vespera silento,
 Rigardis la sunon tagmeze, naĝantan en kupra ĉielo,
 Sopiris al nokta trankvilo, kaj ĝia arĝenta mantelo;

Rimarkis la nuban averton, observis la velan ŝveladon,
 Komprenis la signojn de l' dioj, kaj spitis la dian
 paradon;

Kvazaŭ ekflagris subite, aŭdinte dirajon malflatan,
 Aŭ ardis pro forta feliĉo, frontante vizaĝon amatan;
 Okuloj per kiuj tra vivo li gajnis spertecon kaj lernon,
 Okuloj per kiuj en morto li konos solecan eternon . . .
 Kaj sub la ŝrumpinta kovraĵo, sub haŭto velkinta, sen
 karno,

Similas la ripoj maldikaj al domo de kiu la garno
 El pajlo, argilo kaj ligno, laŭgrade nuliĝis pro ŝtormo,
 Kaj sole la nuda fostaro atestas pri pli bela formo.
 La koro finfine dormadas; forflugis la forta animo;
 Silentaj la kantoj kaj fabloj; troviĝas al ĉio la limo;
 Cetere, la laca spirito sopiras al nura ripozo:
 Post vento, trankvilo; post tago la nokto; kaj morto
 post marfuriozo . . .

La povo ellevi la korpojn jam mankas al ni la ceteraj,
 Kaj niaj kadavraĵ kunuloj kontraŭas al pensoj esperaj;
 Do restu laŭvole, mortintoj: rigardu la velon ŝiritan,
 Observu la stangon rompota, la ŝnuron tro streĉe
 tiritan,

La lignon putrintan, la mastan kurbiĝon, la karnan
 malpuron,
 Mordantan malsaton, senfinan soifon, frenezan teruron.
 Rigardu, rigardu, mortintoj!—Atentu pri tiu junulo,
 Kiun plorantan supere, spegulas mortinta okulo.
 Aŭskultu filinan ĝemadon, aŭskultu edzinan
 lamenton! . . .

Tamen la nigraj okuloj montras nur indiferenton.
 Tie kuŝadu, amikoj, ruliĝu de flanko al flanko
 En akvo haladza kaj naŭza, sur ŝlima kanota
 fundplanko;

Kaj kiam la maro maldolĉa ŝancelos la lignan fokenon,
Turniĝu denove, amikoj, por pruvi kadavran senĝenon.
Vi pravas! Pli saĝe, dormadi en pacaj, silentaj
markavoj,

Ol esti murditaj avare, en landoj de niaj praavoj.
Pli bona la lando de Kupe, pli bona la lando de l' sudo—
Sed kie la lando de Kupe, kaj kiom pli longa la ludo?
Do diru al diaj kunuloj, ke iom lacigas la moko,
Ke inter la jamaj mortintoj troviĝas ankoraŭ kuŝlokoj.
Kaj nun la palpebroj peziĝas, pro vento kaj suno kaj
salo,

Kaj blinde sopiras al vido de arbo, sablejo, koralo;
La buŝo sekiĝas dolore, la voĉo nur flustras obtuze,
Kaj inter deliro kaj revo la menso alternas konfuze;
Ĉar nun la sanplena forteco fariĝas malforto infana,
Kaj ĉian iaman homecon forrabis malsato tirana,
Jam ne kiel viroj ni staras, sed kvazaŭ surventraj
lacertoj

Enrampas ombraĵon ĝis nokto, forlasas ĝin kiel
vespertoj.

Jen! Kvankam la ŝtormojn ni timis, almenaŭ ni kaptis
da pluvo,

Ĉar morto kaj vivo troviĝas egale en ĉiu diluvo.
Neniom da akvo ektuŝis de antaŭ tro longe la langon:
Volonte ni murdus amikon, baraktus por trinki la
sangon,

Sed kiu la sangon posedas, kaj taŭgas por tia ofico?
Nur fidi la diojn ni povas, drivante laŭ ties kaprico
Kaj supren-malsupren vagante, perditaj, rezignaj, sen
celo,

Observi la pinton de l' masto kurbiri sub moka ĉielo . . .

Tedas la bluo kaj blanko de tiu ĉi mondo de l' maro;
Kiam denove ni vidos la verdon de granda arbaro?

La brunon de l' arba trunkego, la grundon, la brilan
agrablon

De fuko malseka sub ŝaumo, vomita de l' ondoj sur
sablon?

Arĝenton de altaj filikoj, de ruĝa papago ekbrilon,
Purpuron de foraj montetoj, la nigran, sintordan
angilon?

Nur tro malrapide alvenas la sendoloriga mortado,
Kiel ĉi tie la nokto, post longa krepuska laŭgrado—
Kiel la nova edzino, je kiu la edzo avidas . . .

Edzino . . . Jen! Mia edzino, al kies okuloj ni fidas,
Kiel vundito sin trenas de sub la ŝirmejo ĉe l' mezo,
Atingas la antaŭfiguron, apogas sin al la pavezo . . .
La kapon, malklaran ombraĵon, mi vidas leviĝi kaj fali,
Supren-malsupren; momenton ekhalti; transiri,
spirali . . .

Kiom la vangoj kaviĝas . . . ĉefino . . . sen propra
bieno . . .

Iam ŝi estis belega, kun arda, fiera mieno,
Feliĉa pro siaj infanoj, aminda, juneca kaj homa;
Sed nun, ĉe kadavraj konitoj, ŝi ankaŭ fariĝas fantoma;
La haroj antaŭen flirtadas, kaj kvazaŭ palpantaj minace,
Similas la maranemonon; kaj jen ŝi rektiĝas, kaj lace
Ŝi levas la manon al brovo, kaj fikse la ondojn esploras,
Kiel antaŭe milfoje; sed tion ni ĉiuj ignoras:

Tro ofte la nova espero fariĝis malnova ĉagreno,
Tro ofte la sonĝon de l' nokto frakasis inkuba mateno . . .
La brako leviĝas kaj tremas, montrante al nuba
marrando,

Kaj voĉo amata ekgrakas: "La tero! La fino! LA
LANDO!"

1944.

LA PACO

Al tiu, kiu marŝas kun avida glavo,
Kaj kiel flamspiranta drako, per ekbrilo
Detruas fulme la esperon de jarmilo,
Kaj restarigas la mizeron de la sklavo;
Al tiu, kiu pro malfido aŭ malpravo
Disputas, ĝis el venko venos maltrankvilo,
Kaj fine mortos pacienco kaj humilo,
Petinte nur paneron el la tuta havo;
Al tiu kaj al tia, Paco jam ignoras,
Ĉar nur al homoj oferemaj ŝi favoras,
Neniu gajnos ŝin per voĉo malsincera;
Neniu ligos ŝin al timo senespera.
Per ĉiu sulko ŝi ekzemplas al homaro,
Kunlaborante sur la kampo de najbaro.

25.7.1946.

MONTRIS NUR LA FAJRO

Montris nur la fajro post la pestminaco,
Ke pureco pli valoras, ol kuraco;
Nur la sklavoj ĝuste taksas la liberon:
Kio do instruos homojn pri la paco?

1946.

LA BILDKARTO

El alia lando mi ricevis
 Karton kiu havas
 Strangan bildon, fremdan idiomon.
 Pri vizito tien tuj mi revis . . .
 Senutile! Sed ne gravas . . .
 Mi ne povas diri eĉ la nomon.

Ĉirkaŭ tiu karto mi konstruis,
 Mense, kadron kun kurtenoj;
 Tra fenestro tiel figurita
 Ĉio vivis, kaj mi tiel ĝuis
 La viziton sen la ĝenoj—
 Sperto kontentiga kaj ekscita.

1945.

AL LA MORTINTOJ

Ili estis junaj, kaj de l' vivo
 Vidis nur la malfermitan pordon;
 Antaŭ tiu, malamikan hordon
 Kaj la morton, por alternativo.
 For de ĉiu loga perspektivo
 Ili tuj sin turnis sen fanfaro
 Kaj oferis ĉion al amaro,
 Laŭ antikva virprerogativo.
 Kia nobla revo velkis tie?
 Kia kanto dolĉa kaj spirita?
 Jen, la menso dormas senkonscie;
 Jen, la harpo estas frakasita . . .
 Kiom plu ni pagos pro eraroj?
 Kio restas . . . krom la vantaj jaroj?

30.1.1946.

VORTMANKOJ

Kia vorto povas vibri
 al la stela labirinto,
Aŭ resoni tra la Tempo
 ĝis la plej unua horo?
Kia vorto povas diri
 nian amon al mortinto,
Aŭ elkanti la muzikon
 ĉe la fundo de la koro?

5.2.1947.

PERFIDO

Ĉu vi scias, belulino,
Ke la belo vin insidis?
Ve al mi, al vi la fino!—
Mia amo vin perfidis.

Ĉar de vi mi tro admiris
La belecon de l' vizaĝo,
La edzino ekdeŝiris
Vian bildon de la paĝo!

8.4.1947.

OMBROJ

Multan ombron faras la malgranda lampo,
Proporcie al la luma diferenco.
Kio kuŝas, do, perdita, sur la kampo
Kiun ombras ĉiu trovo de l' Scienco?

6.4.1947.

EKSPERIMENTAJ SPONDEINOJ

Mortpalaj homoj kaj velkflavaj paĝoj,
Maŝhavaj ŝnuroj kaj ŝtonmuraj kaĝoj—

Mutaj atestoj

Pri la hombestoj

Kaj jarcente longvivaj monstraj malsaĝoj.

2.7.1947.

PALA LUNO

Ho Sfero

De homa destino,

Tre ofte dum mia junaĝo

Mi iris image laŭ via lumvojo,

Kaj kredis vin pala pro miaj amplenaj sopiroj.

La jaroj min jam liberigis el tiaj deliroj,

Kaj nun mi nur vidas, kun sama malĝojo,

La timon sur via vizaĝo

Por nia patrino,

La Tero.

3.4.1947.

SIMPATIO

Kiel homo, kiu en tro varma tago
Kaŝe dormas apud la trankvila lago,
Tiel, lacigite de la vivturmento,
Danke apud vi mi sidas en silento.

Vortoj, nura narkotilo por la menso,
Pli konfuzas al la konfuzita penso.
Al animo, lumo de l' animo venas:
Kion mi ne diras, tion vi komprenas.

2.2.1947.

SONETO III

Mi min trovas sur peceto de la tero
Kies nomon mia lando priignoras;
Kaj la landon mem la mondo ne memoras,
De la kosmo siavice nur polvo.
Kaj kompare kun la jam antikva sfero,
Nur malmultajn jarojn ni sur tiu floras;
Kaj ju pli la homan vivon ni esploras,
Des pli ridas la Diablo pro espero.
Tamen, kvankam de la ĉirkaŭanta mondo,
Kaj de l' universo, mi ne multon vidis,
Kvankam sur la ŝaŭmo de la tempa ondo
Mia vivo jam terure forrapidis,
Tute sensignifa estas nun por mi
La tago kiun mi pasigas for de vi.

11.4.1947.

MEMORE DE ZAMENHOF

Zamenhof!—konato en la hejmo de doloro,
Vi, el raso jam delonge disnacia,
Sentis ĉies malfeliĉon en la propra koro,
Kaj sopiris al homaro familia.
En la mondo kiun vortoj, vortoj jam inundis
Per malamo, miskompreno kaj arbitroj,
Vi batalis ĝis la malamikoj Vin elvundis,
Vi, kolombo, inter rabaj akcipitroj.

Korrompите mortis Vi, en mondo al milito
Sin doninta kaj graveda per la semoj
De terura estonteco. Tamen la spirito
Scias, kiel post la perdoj kaj subpremoj
Via mensa ido pli fortiĝas sur la tero—
Kiel, nun elkorpigita, la animo
Strebas al pli vasta regno; ĉar la granda vero
Fendas la kokonon de l' homeca limo.

Kio estas Vero, krom la Universa Leĝo,
Kiun vidas nur popece ĉiu homo,
Same kiel malsanulo en fenestra seĝo
Vidas la ĉirkaŭon de neniua domo?
Tamen Vi la veron tuŝas en la homa menso,
Truegante murojn kiuj interstaras,
Ĉar la vero trovas veron en komuna penso
Kiel akvo akvon, kvankam ĉio baras.

Vane tian veron la tirano penas kaŝi:
 Ju pli oni premas ĝin, des pli ĝi ardas;
 Kiu por detrui veron riskas ĝin alpaŝi,
 Cedas sin al tio, kion li rigardas.
 Tiel ĉe animo Via: ĉiu homangoro,
 Ĉiu timo, ĉiu manko aŭ sopiro,
 Tuj malfermas al Vi pordon en la homa koro—
 Kaj Vi vekas la esperon en martiro.

Jen! de Via genieco la centmil fajreroj
 Falis, kaj flagretis sur diversaj lokoj.
 Iuj sufokiĝis en malpuraj atmosferoj,
 Iuj estingiĝis sur la nudaj rokoj.
 Tamen laŭ la nevidataj vojoj rampebrulos,
 Kuniĝonte, la flametoj de l' espero—
 Ĝis la finbriladon eĉ la steloj respugulos,
 Por konservi Vian lumon sur la tero.

6.7.1947.

SINGULTANTE

Vi kiu scias, kiom mi
 Protestis kontraŭ elizi'
 Sendube miras pri poem'
 De mia plum' kun tia em'.

Ne kredu, mia bonamik',
 Ke temas tiu ĉi lirik'
 Pri ŝanĝ' al mia opini'
 Rilate al la elizi'.

Ne! Mia poezia naŭz'
 Rezultas el esplora paŭz'
 Por ke, laŭ l' elizia kult',
 Mi provu skandi per singult'.

10.11.1947.

ALFABETO

Jen A por la Arbo, giganto el ligno,
 kaj B por la Barbo de aĝo kaj digno;
 Jen C por la Ciro sur ŝuo kaj boto,
 kaj Ĉ por Ĉarniro, la porda pivoto;
 Jen D por Didelfo, la fruktomanganto,
 kaj E por la Elfo kaj eĉ Elefanto;
 Jen F por la Fluto kaj Fortepiano,
 kaj G por la Guto falanta de l' krano;
 Jen Ĝ por Ĝardeno, ĝojiga kaj bela,
 kaj H por Hieno, sovaĝa, kruela;
 Jen Ĥ por Ĥorano, kantanta ĝis eĥo,
 kaj I por Infano, ploranta pro peko;
 Jen J por Jonkvilo kun verda kolono,
 kaj Ĵ por Ĵetilo ŝargita per ŝtono;
 Jen K por la Kando per kiu ni festas,
 kaj L por la Lando en kiu ni estas;
 Jen M por la Mulo, obstina, incita,
 kaj N por la Nulo de ludo perdita;
 Jen O por Ombrelo, dum pluva vetero,
 kaj P por Paŝtelo kaj propra papero;
 Jen R por la Reĝo kun krono el oro,
 kaj S por la Seĝo post taga laboro;
 Jen Ŝ por la Ŝnuro de ŝipo kaj velo,
 kaj T por la Turo de granda kastelo;
 Jen U por Ulekso, sed ĝin ni ne laŭdas,
 kaj Ŭ en indekso neniam ni aŭdas;
 Jen V por Vertebro, la homa spinero,
 kaj Z por la Zebro, kaj fina litero.

6.6.1949.

RONDOLUDO

Per mia okulo mi vidas
 Objekton al kiu vin gvidas:
 Litero B!

RIMLUDO

Sinjoro Bo kaj frato Do
 Dormadis en oazo,
 Kaj songis pri Fraŭlino I
 Kaj ŝia ruĝa nazo.

Sinjoro Bo kaj frato Do
 Dormadis sub la steloj,
 Kaj songis pri Fraŭlino I
 Kaj ŝiaj du pudeloj.

Sinjoro Bo kaj frato Do
 Dormadis . . .
 Kaj songis pri Fraŭlino I
 Kaj . . .

Sinjoro Bo kaj frato Do,
 Havante bonajn sentojn,
 Demandis ĉu Fraŭlino U
 Retrovis siajn dentojn.
 k.t.p.

KALKULA LUDO

Unu, du—	Ses, sep—
Diru ĉu—	Ok naŭ dek—
Tri kvar kvin—	Jen mi estas—
Vi vidas min?	Kuru—ek!

9.8.1949.

NOKTA PAPILIO

Vidu, kompatinda naivulo
 Kiu al la lumo tro sopiris—
 Viflugilon perdis en la brulo
 De la flamo kiu vin altiris.

Pli prudente estus, ke profundon
 De malhela ombro vi toleru,
 Ol ke via belo spertu vundon,
 Kaj vi mem pri ĉio malesperu.

31.7.1949.

PRO AMIKO

Dion danku pro amiko
 Kies amo kuraĝigas—
 Kies bona opinio
 En privato kaj publiko
 Al pravigo vin instigas.

—Kies alfidindaj vortoj,
 Kies nepra bonhumoro,
 Kies tuta simpatio,
 Estas ĉiam novaj fortoj
 En la vivo kaj laboro.

1.8.49.

SUNSUBIRO

Glorkrono el oro jam falis
Sur maron, kaj montan deklivon,
Kaj sunsubiranta magio
Min tuŝas, kaj sorĉas la vivon.

Nun kie la nuboj kaj pluvo,
La vento veninte hajlbove?
La tagon nur ĵus foririntan
Mi volus travivi denove.

La lumo en tiu ĉielo
Rebrilas tra ankaŭ la horoj,
Kaj tiel la tuta taglongo
Vestiĝas per belaj koloroj.

2.8.1949.

LA VENTO

El servuto en la Oriento
Oni liberigas vin, ho vento,
Kaj subite, dum la mirsilento,
Vi ekfuĝas sage—
Murmurante al purpuraj maroj,
El mistikaj runrepertuaroj,
Sorĉminacojn pri venĝontaj faroj,
Nokte kiel tage.

Super blankaj ŝaŭmoj vi ululas,
Ĉirkaŭ kavernfaŭkoj vi cirkulas,
Ĉe la tomboj la mortintojn lulas,
Mem fantomo blova.
Kion vi intencas, vi ne diras;
Oni aŭdas vin kaj oni miras:
Jen vi estas, kiu jam foriras,
Pro afero nova.

4.8.1949.

RENKONTO

Ĉu vi eble partoprenas,
 kiam mi renkontas vin korrave,
 tiun ŝokon de finita serĉo, kaj momente
 kredas, ke nenio krom aero vin subtenas?
 Aŭ—ĉu vi indiferente
 juĝas min—kaj tiel prave!—
 malspritulo, kies trorigardo jam vin ĝenas?

7.8.1949.

AL S.H.N.

Malgraŭ lingva kaj distanca barieroj,
 Viaj kampofloroj kaj leteroj
 Trans la maron daŭre venas;
 Kaj la floroj kaj la parfumitaj paĝoj
 Forĝas ĉenon inter du pejzaĝoj,
 Kaj al ambaŭ apartenas.

Sed neniam tiuj floroj, elegante
 Sur hungara kampo burĝonante,
 Pri la sorto eĉ suspektis,
 Ke la belon, kiu tie evoluos,
 Mi en Nov-Zelando fine ĝuos,
 Ĉar bukedon vi kolektis.

Vi anime montras vin en ĉiu floro,
 Ankaŭ tie pulsas via koro,
 Spite la disigajn marojn;
 Kaj konfirmon tian vi letere donas,
 Ke pli bone ĉiel vin mi konas,
 Ol mi konas la najbarojn.

9.8.1949.

MALNOVA PIPO

Mi ne scias, kia arbo en Eŭropo
Por la ĝuo de la homoj fine cedis
Vian belaroman lignon, mia pipo!
Tie nepre la odoro de la rozo
Kunmiksiĝis kun la spiro de violoj
Kaj fariĝis peza preskaŭ ĝis videblo,
Tiel ke folioj sur la patra trunko
Pendis en petale parfumita sveno . . .
Vi malnova estas, nigra ĉe la rando,
Aĝmatura, kaj cikatriĝinta; tamen
Vi neniam perdis la antaŭan ĉarmon,
Kaj al digno nun aldonas sentimenton.
Kia trankviliĝo estas, rigardadi,
Kiam en amorfaj ombroj via fumo,
Preskaŭ pala substancigo de la pensoj,
Ŝanceliĝe flosas supren tra l'aero
En la altan dormsilenton; aŭ kirliras
Per ŝvebantaj rondoj, kiel laca menso
Kiu donas sin senrege al memoroj,
Rondiradas, kaj finiĝas per nenio . . .
Rememoroj pri la longpasinta tempo
De ankoraŭ juna kaj feliĉa vivo:
Pri vizaĝo kies belo jam pliiĝas,
Revidite tra nebulo de la jaroj;
Pri la eĥo de malfortiĝinta voĉo,
Flustro en la koridoroj de la Tempo;
Pri la amo kiun—tiel!—mi forgesis;
Aŭ pri tiuj horoj de sunora lumo,
Kiam ondojn de la multkolora maro
Nia blanka velboato kline ŝiris,
Ĝoje forjetante la ŝmacitan ŝaŭmon,
Dum glitfluga mevo super nia masto
Alte gardis nin, anĝelo de la suno.

Travivaĵoj reviviĝas kaj remortas:
 La rivera helo kaj la monta neĝo,
 La senfina vojo, la izola arbo,
 La soldata kanto, la pieda ritmo—
 Ho magia povo, ho aminda sorĉo!
 Mi ne fidas al estonto nekonata;
 Tamen vi, amiko kara kaj konstanta,
 La esperon donos ĝis ne plu mi revos:
 Tiam mi min ligos kun animo via,
 Kaj retrovos kion nun mi nur memoras.

6.9.1949.

MALLUMO

Malluma la mondo, kaj en la mallumo
 La steloj sin kaŝis per nuboj de fumo,
 Demonoj de fajro la urbojn detruis,
 Kaj ruĝaj pro sango riveroj ekfluis;
 Kolero aŭdiĝis per krio kaj vorto,
 Kaj ĉie haladzis odoro de morto,
 En brua mallumo.

La suno sin levis, kaj per ĝia klaro
 Vidiĝis entute la monda amaro;
 La fruaj radioj ektuŝis blufleme
 La ŝtalajn glavpintojn uzitajn malame;
 Kaj ĉirkaŭ la cindroj ankoraŭ ardantaj,
 Kadavroj fariĝis amasoj gigantaj.
 La homoj rigardis kun ega mizero
 Viktimojn de tiu dumnokta kolero,
 Kaj vidis la korpojn de filo kaj frato,
 Amiko, najbaro, kaj bona konato,
 Por kiuj la fino, la vivoplenumo,
 Alvenis senglore per kugla alzumo.
 Kaj de l' malamikoj nenio postrestis,
 Nenio pri ties ekzisto atestis . . .
 Verdire, la malamikaro *ne estis*,
 Sed nur la mallumo.

22.7.1949.

LA AERO

Ĉe l' praavoj la aero
Estis ĉiutagafero:
Kiu havis, vivon portis:
Kiu perdis, tiu mortis.
Al la ŝipo, al la muelilo,
Foje ĝi necesis,
Sed se nur ĝi restis en trankvilo,
Oni ĝin forgesis.

Poste, niaj antaŭuloj
Lernis pri la molekuloj,
Pri karbono, oksigeno;
Kaj por sia plua ĝeno,
Trovis ankaŭ la mikrobdanĝeron.
Tiel tiu gravas,
Ke la homoj mortas, ĉu aeron
Ili havas, aŭ ne havas.

Sed ni mem la finon faras:
Antaŭ mikrofono staras,
Pri komercaj varoj blekas—
Kantas, ludas, bebon vekas,
Pro konvinko, ke la mondpubliko
Nepre nin aplaudas.
Ĉiam, ĉie, en l' aero
Daŭre vibras la etero
Pro samtempaj voĉoj kaj muziko . . .
Dion danku, tion ni ne aŭdas!

11.8.1949.

REALO

Nun, nur nun, realo estas, en la penso
 Ke mi vidas vin, ke vin mi tuŝas:
 La estonto estas nur fiktiva,
 La pasinto jam en la memoro kuŝas;
 Sole la nuntempo estas viva—
 La ceteraj nur la figuraĵoj de la menso.

Vi asertis, ke la vivo kaj realo
 Daŭros kiel daŭras ĉiu vero.
 Tamen via voĉo jam silentas . . .
 Vi forestas . . . ĉio ŝajnas nun ĥimero:
 Ĉu mi songis, ke ni argumentas?—
 Nur momenton nia nuno restas aktuala.

7.8.1949.

ETERNA MARO

Kiom da jarmiloj, ho eterna Maro,
 Aŭdis sur ĉi tiu senresponda bordo
 Vian kordoloran kaj senfinan ĝemon,
 Kiel de Spirito kiu pro antikva
 Kaj dieca krimo, devas senripoze
 Bati la limigojn de malgranda tero,
 Kaj suferi senparolan malesperon?
 Via voĉo plendas per mortinta lingvo,
 Kies vortojn la pasantaj jaroj frotis
 Kaj glatigis ĝis signifon ili perdis;
 Via diro de la homoj al la homoj
 Trans barilojn de la Tempo kaj la Spaco,
 Jam fariĝis ĉie nura ĝemspirado.
 Eĉ la blankaj sabloj de ĉi tiu bordo
 Viajn larmojn en silento ignoradis,
 Dum gigantaj arboj kreskis ĝis maturo,
 Eĥis vian sopiradon, kaj polviĝis,
 Kvazaŭ dumiljara vivo eĉ ne estis.

Kompatinda Homo, nova kaj penema,
Ŝanceliĝas sur la piramida pinto
De la jaroj, vin rigardas kaj esploras,
Kaj pro via eterneco longe miras.
—Mallumiĝas; sed en plej profunda nokto
Vi ankoraŭ elmurmuras vian plendon
Kiel la fantomon de tereca sono,
Kaj lamentas povojn de antaŭaj tagoj:
Tiam nur en vi troviĝis ĉia vivo,
Kaj vi estris ĉion sub ĉiela limo,
Sen rivalo kontraŭ via juna gloro;
Tiam super vi la malproksima suno
Verŝis kaskadege sian varman lumon,
Kaj arĝenton vian strekis per oreco,
Ĝis la brila maramplekso plibeligis
La ĉielon kiel novnaskita stelo.
Trankviliĝu, ho kaptito grandioza;
Kvietigu la koleron, kaj atendu:
Tago eble venos, nun tro malproksima
Por kalkulo per la tuta homa scio,
Kiam iu konvulsio de la tero
Vin denove kaj senlime liberigos.
Tiam via furiozo subpremita
Revibrigos vian mutigitan voĉon;
Kaj vi ridos ĝojegante pri la forto,
Kaj vin diboĉigos fine kaj freneze,
Vin venĝante kontraŭ la sternita tero
Per tumulto de ondado kaj inundo.
Tiam fremda vivo en teruro mortos,
Kaj la tuta mirindaĵo de la homoj,
La laboro de nekalkuleblaj jaroj,
Estos por vi nur sonĝeto malagrabra,
Dum vi kuŝos en silento nerompata,
Kaj triumfos pri eterna izoleco.

2.9.1949.

LA MALJUNULINO

(Simpla Rakonto)

Ĉirkaŭita de la burĝonantaj floroj,
 Sub ĉielo blua kaj somera suno,
 Dormas la maljunulino en la seĝo.
 Blankaj estas ŝiaj haroj, kaj senvivaj;
 Laŭ la milda vento ili lace flirtas
 Kiel ĉifonaĵoj sur la bruna vango.
 En la seka haŭto du profundaj sulkoj
 Ligas la angulojn de la firma buŝo
 Al la nazoflankoj; kaj aliaj strias
 Ŝian frunton onde, laŭ la nigraj brovoj.
 La okuloj enkaviĝas en ombraĵo,
 Kaj sub ili la palpebroj estas pezaj . . .
 Mi silentis, sed la junedzino diris:
 “*Bela, bela estis ŝi dum la junaĝo.*”
 Ree mi rigardis; vere, povus esti:
 La vizaĝo havas belformitajn ostojn.
 Mi figuras ŝin ankoraŭ junfraŭlino,
 Kun okuloj brunaj kaj hararo nigra,
 Gaja kaj feliĉa lumo en la domo,
 Dorlotato de la dandoj ĉe la balo,
 Konsilanto kaj amiko kun infanoj,
 Ĉiam helpantino ĉe la domlaboro,
 Vigla pro nelacigebla energio;
 Sin turnanta al la varmo de la vivo,
 Ĉaste atendanta ununuran amon,
 Certa pri fidela edzo, bela domo,
 Sekureco, kaj feliĉa familio . . .
 “*Frue kaj senhave mortis ŝia edzo.*”
 Kie fine do la grava sekureco?

Mi imagis la mizeran, solan ĉambron,
La kudrilon rapidantan por la vivo,
La malsatajn infanetojn, la laciĝon,
La senfinan serĉon por la vivrimedoj,
Por laboro, por ripozo, por kuraĝo . . .
Vidis la unuajn sulkojn sur la vangoj,
La arĝentan strekon en la nigraj haroj;
Aŭdis la konsolajn vortojn al etuloj,
La vesperan preĝon apud puraj litoj,
Zumon de kudradmaŝino ĝis malfrue,
La sekretan ploron dum sendormaj noktoj;
Mi divenis la kaŝiron al la ponto,
Kaj la penson: ĉion fini; la konstaton;
Ankaŭ ne la morto nutros la infanojn;
Kaj reiron al konstanta cerbumado
Pri nutraĵo, vestoj, flikoj kaj eduko . . .
*“La amikoj pruntedonis al ŝi monon
Por ke ŝi establu specon de butikon.”*
La amikoj—tiuj ordinaraj homoj,
Kiuj konas nin sed nin ankoraŭ amas,
Kaj kritikis nin per rekta malaprobo
Kiam ni misfaras aŭ malbone diras;
Kiuj penas kaj laboras ĉiutage
Ĉe la ordinaraj taskoj de la vivo,
Kaj, se malfeliĉo trafas nin, elverŝas
Tutan sian havon inter niajn manojn,
Ne pensante pri redono kun procento,
Nek pri nia danko—sed pro la malgajo
Kiu nin trafante, trafas ankaŭ ilin . . .
Do, esperon novan naskas la butikon
—Pura, bela, brila, kun diversaj vestoj
El la manoj de la nova posedanto,
Kun ludiloj kaj bombonoj por infanoj,
Alumetoj kaj tabako por la viroj,
Pipoj kaj paperoj, pingloj kaj parfumoj . . .
Ree la maŝino zumas dum la nokto,
Vigle, vibre; kaj kantzumas la patrino;

Ankaŭ ridas kaj babilas la infanoj:
 Kiu povas malesperi en kunesto
 De kuraĝa forto? Do, prosperas ĉio.
 La klientoj venas, kaj denove venas,
 Babiladas, kaj fariĝas bonamikoj;
 Oni la komencan monon jam repagas,
 Malgraŭ la protestoj de la oferintoj;
 Baldaŭ la infanoj, nun maturiĝantaj,
 Gastigadas la amikojn, kaj la hejmo
 Sonas kaj resonas per vespera rido,
 Per kantado kaj muziko; kaj tra ĉio
 Etendiĝas la batalforĝita amo.
“Kelkajn jarojn poste, la pliaĝaj filoj,
“Kun honoro postlasinte altlernejon,
“En oficojn bonsalajrajn metis sin,
“Kaj la patrino tuj aĉetis tiun domon.”
 Jen, ŝi venkis ĉion, kaj sekura estas;
 Jen la mirindaĵo de patrino forto.
 Se blankiĝis la hararo pro la lukto,
 Se sulkiĝis ŝia frunto pro laboro,
 Tio jam ne gravas, ĉar de ĉiu flanko
 Amo ŝin torente kaj lavange trafas,
 De infanoj, de amikoj, de konatoj.
 Kie ajn ŝi estas, ĉiu estas gaja;
 Antaŭ ŝi, sekretaj ĝenoj malaperas;
 Kiu petas ŝian helpon ĉiam ĝin ricevas;
 Reveninto post multjara forestado
 Ŝin ankoraŭ rememoras kaj vizitas;
 Tutan vivon ŝi pasigis por aliaj:
 Nun la mondo ŝuldas al ŝi rekompenco.
“Militante, la du junaj filoj mortis.”
 Jen la rekompenco, jen la monda danko.
 Kiam ŝia forto preskaŭ eluziĝis,
 Kiam restas nur la fino de la vivo,
 Kiam konsumiĝis belo kaj laboro,
 Por ke la junuloj, lertaj kaj amemaj,
 Rekte staru, kiel respektindaj viroj,

Oni senkompate prenas la plej karajn
Kaj postlasas al ŝi eĉ ne la esperon.
Restas nun nenia celo krom kuraĝo,
Kaj neniu iam vidas ŝiajn larmojn,
Kiuj fontas kiel sango en la gorgo.
Oni vidas tion, ke ŝi maljuniĝas,
Ke la viglo mankas, ke en la okuloj
Io mortis, ke ŝi marŝas ŝanceliĝe;
Foje, kiam ŝi supozas esti sola,
Oni aŭdas la profundan ekspiradon . . .

Mi rigardis kaŝe mian junedzinon,
La patrinon de la karaj du infanoj;
Kaj momenton, stranga trompo de la lumo
Iel blankbriligis ŝiajn blondajn harojn,
Kaj branĉetoj ombre strekis ŝiajn vangojn,
Tiel ke mi vidis ŝin maljunulino.
Kaj mi premis ŝian firman manon, por ke
Ŝi divenu mian antaŭvidan amon.

25.10.1949.

HOMO MIRINDA, HOMO MIZERA

O Homo mirinda—
 Jen vi, kies forta animo,
 Kaŝite per blindaj okuloj,
 Rifuzas fariĝi viktimo
 Al pensoj subpremaj—
 Kaj brilas tra siaj nebuloj
 Ĉe fingroj sentemaj.
 O Homo mirinda—
 Jen vi, kiu ĉirkaŭenbrakis,
 Pentrante, la mondan spektaklon . . .
 Ĝis oni la manojn forhakis,
 Kaj pentran rimedon.
 Kaj nun vi elfaras miraklon,
 Uzante piedon.
 O Homo mirinda—
 Jen vi, kiu manke de kruro
 Promenas kaj flugas kaj naĝas,
 Kaj kreskas des pli en staturo,
 Ju pli vi kuraĝas.—
 Jen vi, kiu voje al morto
 Ekhaltas dum kara momento,
 Kaj helpas kunulon per vorto,
 En ombro de l' fina Silento—
 O Homo mirinda!

Kaj kion pri vi,
 O Homo mizera?—
 Pri vi, kies sanaj okuloj,
 Dum vi kun amikoj kunsidas,
 Respondas al lumaj stimuloj,
 Kaj saĝon ne vidas?—

Pri vi, kies du fortaj manoj
 Ne scias kultivi la grundon
 Por doni al kunhomaranoj
 Rikoltan abundon?
 O Homo mizera—
 Jen vi, kies cerbo cinika,
 Anstataŭ elserĉi la pacon,
 Serpentas en nodo komplika
 Por sibli minacon;—
 Kaj vi, kies paro da kruroj
 Firmpreme posedas la teron:
 Vi kuras pro vantaj teruroj
 En veran danĝeron.

O Homo mizera—
 Mizera vi estas, pro tio:
 Ke malgraŭ perfektaj oreloj,
 Per kiuj la voĉo de Dio
 Instigas al pli altaj celoj—
 Kaj malgraŭ la povo de l' lango
 Per kiu el stato nur bruta
 Vi venis al alta homrango—
 Kaj kvankam ĉe gentaj paroloj
 Kompreno fariĝis entuta—
 Vi restas ĉe fremdaj popoloj
 Kaj surda kaj muta!

La saĝo nin trafos perforte:
 Ni lernos; sed nur duonmorte.

18.11.50.

AVERTO POST KVERELO

Ne kredi nun al mia koro,
 Estus ĉion, mi avertas, nei!
 Saĝe, kara, diras la memoro,
 Ĝuste kion kredi kaj obei.

25.3.1951.

DONU AL MI TEMPON

Donu al mi tempon, ĉionpova Dio,
 Por la revon de l' juneco rememori;
 Por inspiri min per freŝa energio,
 Por elpensi kaj labori—
 Aŭ, perdinte ĉiun fidon, novan por ricevi;
 Por la revon realigi, kaj denove revii.

Donu al mi tempon, ĉionpova Dio,
 Por la virtojn de la homoj elproklami;
 Por ĝiskore koni min, sen iluzio;
 Por la malamikon ami.
 Antaŭ tiu pordo kiu kaŝas la eternon,
 Tempon al mi donu—por lumigi la lucernon.

26.11.50.

ANTAŬA AMATINO

Vi amis la sunlumon kaj la varmon,
 Sed glacia grundo kaŝas vian ĉarmon:
 Ĉu vi tion sentas?
 Mi amis vin, kaj nun senluma sorto
 Premas min, glacia kiel morto,
 Kaj turmentas.

Se vi ankoraŭ vivus, kara, kara,
 Ĉu do malpli vanta kaj amara
 Mia vivo estus?
 Ho ve, mi kredas ke la homa menso
 Nur sen povo de imaga penso
 En trankvilo restus!

10.5.51.

SENDEFENDAJ MANOJ

(Frue en la historio de Nova Zelando, iu guberniestra edikto instigis de la maorioj tre elokventan proteston. La konata misiisto G. A. Selwyn—Selūin—poste uzis tiun proteston por riproĉi la maoriojn kiuj murdis junan knabon. En la poemo Selwyn sidas apud kunvena fajro kun la maorioj, kaj rakontas jene):

“ Iu viro songis, kaj al tiu ŝajnis,
Ke li sidas apud granda fajro, gasto
De la triboviroj. Tiuj koleriĝas,
Ĉar guberniestro, antaŭ kelkaj tagoj,
Ilin malpermesis porti la pafilojn.
Dum la triboviroj tion diskutadas,
Jen aperas antaŭ ili en la flamoj
La figuro de fortika juna ĉefo,
Nobla maorio, lerta batalanto.
Tiu en la songo siajn brakojn levas,
Kaj etendas siajn manojn al la viro
Kiu songas; kaj al tiu li parolas:

“ ‘Ho Guberniestro, el ĉi tiuj manoj
Vi forprenis la pafilon! Tamen sciu,
Ke ĉe ni la moro estas ja pli justa:
Ĉar, se malamiko ne armilon havus,
Ni al li armilon donus, por certigi,
Ke la venko estu ĉiel honoriga:
Ho Guberniestro, *ĉu vi do ne hontas*
Pri ĉi tiuj, miaj sendefendaj manoj?”

“ Kaj la maorioj ĉirkaŭ la fajrego
Tiujn bravajn vortojn de la nobla ĉefo
Laŭte aplaŭdante, gloras kaj ehigas.
Kaj la flamoj pli altiĝas, kaj la nuboj
Koloriĝas kiel sango; ĝis en brilo
Ekflagranta la ĉefulo malaperas.

Sed kriege disvastiĝas lia diro:

“*Ho Guberniestro, ĉu vi do ne hontas
Pri ĉi tiuj, miaj sendefendaj manoj?*”

“Kaj la viro sonĝis, ke post kelka tempo
En la fajro jam vidiĝas nova formo,
La figuro de junknaba blankhaŭtulo:
Tre malforta kaj tre juna li aspektas;
La vizaĝon, palan pro subita morto,
Naŭze ŝmirmakulis lia propra sango.
Al la maorioj flustre li parolas:

“Kontraŭ min vi venis kaŝe en la nokto,
Kontraŭ min multnombre vi kuraĝe venis,
Kaj per hakilegoj min ĝismorte batis.”

Malrapide li etendas siajn manojn
Kaj al tiuj silentuloj li demandas:

“*Ho fortikaj viroj, ĉu vi do ne hontas
Pri ĉi tiuj, miaj sendefendaj manoj?*”

Poste malaperis ankaŭ tiu knabo,
Kaj la viro kiu sonĝis, revekiĝis.”

Oni finis la rakonton, kaj atendis.
Sed la aŭskultintoj ĉirkaŭ sia fajro
Longe silentadis, antaŭ ol demandi:
“Kion do signifas tiu stranga sonĝo?”
Tamen laŭmiene ili ja komprenis;
Kaj stariĝis unuope kaj foriris.

26.4.1952.

NUDA VERO

Ĉiun veron, kiel ĉe infano,
Ĉarme la poeto vestas.
Ĉiu verso estas vortolano,
Kiu sur la menso restas
Glata kiel ganto sur la mano.

26.3.1951.

LA PIONIROJ

Kun nova espero kaj koro kuraĝa,
Sur grundo silenta en lando sovaĝa,
La noveveninto de ie trans maro
Forhakis vivspacon en densa arbaro.
Muskola ĉe brako, fortika ĉe kruro,
Li plantis la semojn de fina sekuro,
Kaj en la dometo el krudaj tabuloj
Li loĝis feliĉe kun geaj karuloj.
Najbarojn li tamen malofte vidadis,
Ĉar, kvankam aliaj la landon invadis,
Distancoj tro grandaj dislokis la domojn,
Kaj nur samceleco kunligis la homojn.
Per memfidaj manoj kaj daŭra kontrolo,
Per vigla pensado kaj verva privolo,
Li gajnis sufiĉe por junfamilio,
Kaj pri la cetero li fidis al Dio.
Do, kiam somere la fajro alzumis,
Kaj semojn kaj herbon kaj bestojn konsumis,
Kaj kiam en vintro torenta diluvo
Inundis la teron sub pezo de pluvo,
Neniam li paŭzis, neniam priploris,
Sed de la komenco denove laboris.
Kaj nekonatuloj salutis amike,
Kaj haltis por helpi, sindone, efike . . .
Grandegaj civitoj la homojn nuligas:
Izola kunago korvarmon instigas.

Jen, eĉ en soleco troviĝas kontento:
Se multaj la homoj, malmulta la sento.
Do ĝoju vi nun, kiuj nun pioniras:
Realon ne perdu dum revoj vin tiras.

24.8.53.

MALNOVAJ LAMPOJ

(Tezo Metrika)

MALNOVAJ LAMPOJ

(Tezo Metrika)

I.

TRADUKONTE

“La vivesenco de rimata traduko troviĝas en tio, ke bona poemo ne fariĝu malbona poemo. La sola vera motivo por la traduko de poezio en alian lingvon estas por doti alian nacion, kiom eble, per unu plua belaĵo. Ĉar la poezio ne estas preciza scienco, laŭlitereca tradukado estas tute flanka al tiu celo. Mi diras laŭ litereca—ne fidela, kio neniel estas la sama afero. Kiam oni povas kombini laŭliterecon kun tio, kio estas la ĉefa kondiĉo por la sukceso, la tradukanto estas bonŝanca, kaj li devas plejeble peni ilin kunigi; kiam li povas atingi al tia celo nur per parafrazo, tio estas lia sola vojo . . .

“La tasko de la tradukanto . . . postulas iom da sindeteno. Ofte li volonte utiligus ian apartan graciaĵon de la propraj idiomoj kaj epoko, se nur li mem estrus sian volon; ofte iu kadenco estus al li uzebla, krom pro la strukturo de la originalo—iu strukturo uzebla, krom pro la originala kadenco; ofte li devas malpliigi la ekbeliĝon de strofo por alpreni iun rimon kiu akordas, kaj li vidas la poeton feliĉe malŝpara pro vortabundo, kie li mem havas nur mizeran provizon. Jen li volas malŝati la materialon por la muziko, jen la muzikon por la materialo; tamen ne! li devas trakti egale pri ambaŭ. Kaj kelkfoje difekteto en la verko agacas lin, kaj ege li volas forigi ĝin, kaj fari por la poeto tion, kion ties epoko malpermesis al li; tamen ne!—tio ne troviĝas en la kontrakto!

(Dante Gabriel Rossetti, konata angla poeto, 1828-1882, en la antaŭparolo de *Unuaj Italaj Poetoj*).

Iam kun fraŭlino ne de la Stelanoj,
 Mi diskutis la poemojn nialingvajn,
 Kaj mi plendis, ke la tradukitaj versoj
 Ofte min malkontentigas pro tordiĝo
 De la frazoj, elizio, kaj sklaveca
 Imitado de l' originala formo.

“Kompreneble!” kriis ŝi (kaj ne komprenis!)

“Via lingvo estas tute laŭscienca:

“Kaj per tia idiomo, vortpreciza

“Kaj sensenta, ia poezio estas

“Nepre ekster la ebleco. Ĉiu vorto

“En nacia lingvo portas kun ĝi aron

“De duonsignifoj kaj nuancoj, kiujn

“Oni ne tradukas; kaj la poezio

“Fontas el la feinejo de l' pensombroj.”

“Tamen vi malĝuste taksas nian lingvon,”

Mi protestis. “Laŭscienca, jes! Sensenta—

“Tute ne! Mi plendas ne pri neebleco

“De la tradukado—nur pri la metodo,

“Kiu tro kripligas nian Esperanton.”

La fraŭlino kape dubis: “La nuancoj . . .”

“Iugrade, amikino, vi ja pravas

“Pri nuancoj; tamen vi forgesas, ĉu ne,

“Ke ideoj ankaŭ havas kromnuancojn?—

“Kaj ke Esperanto traktas pri ideoj

“Pli ol vortoj? Jen ekzemplo: Per ‘fantomo’

“Oni traktas ne pri vorto, sed koncepto

“Kiun ĉiu raso konas—ĉirkaŭ kiun

“Ĉiu raso jam almetis la nuancojn,

“Kiel ajn ĝi nomas ĝin en sia lingvo.”

Ree la fraŭlino dube kapon skuis:

“La konceptoj povas esti mem malsamaj.

“La demokrateco de la okcidento

“Fremda estas al la orienta menso.”

“Tamen ambaŭ sentas same pri la vorto!”

Tie ni forlasis la diskuton, ŝi

Dubante, mi des pli ankoraŭ konvinkite.
 Ĉu ne mi tralegis kun simpatiemo
 La poemojn de verkistoj alilandaj?
 Ĉu ne el diversaj landoj mi ricevis
 Pruvon, ke legantojn miaj versoj trafis?
 Kvazaŭ per miraklo, nia lingvo rompas
 Ĉian malfacilon inter la nacioj.
 Dum la homoj teorias, ni praktikas,
 Kaj la mankoj kiujn ili antaŭvidas,
 Montras sin 'fantomoj.'

* * *

Kial ni tradukas?

Mi de la knabeco sentis, ke la vortoj
 Estas kvazaŭ kugloj el alia cerbo—
 Kvazaŭ lumradioj, aŭ elektraĵoj tremoj,
 Kiuj pereigas la malĝustan kredon,
 Montras la belecon, aŭ stimulas penson.
 Kiu amas lingvon estas jam poeto:
 Kiu amas du, fariĝos tradukanto.
 Jen, en nia lingvo juna, purvokala,
 Kia manko de la tradukitaj verkoj!
 Kia nesufiĉo de la poezio
 Kiu tro abundas en aliaj lingvoj!
 Konsentite, ke, sur tiu nova maro,
 Jam troviĝas iuj bravaj argonaŭtoj,
 Kiuj inter nekonataj danĝerejoj
 Kun kuraĝo direktadas siajn ŝipojn.
 Tien ili portas vivon kaj trezoron,
 Kaj postlasas avertilojn por aliaj.

Sed por ni, averto estas nur logilo,
 Kaj pensante pri la preskaŭ virga lingvo,
 Ni komprenas, kion sentis Keats, legante
 La unuan fojon, la Ĉapmanan *Homer*:
 "Jen, mi sentis kiel stel-observemuloj
 "Pri planedo nova sur la noktbieno;
 "Aŭ Kortezo, kiam vidis la okuloj

“*Sur la Pacifikon—kaj per mirmieno*
 “*Ĉiu homo mutdemandis al kunuloj*
 “*Silentantaj super monta Darieno.*”

(Mi ignoras la eraron historian:
 Tradukanto estas nur alia voĉo
 De l' poeto, kaj ĝustigi aŭ klarigi
 Ian tekston li ne devas, eĉ ne rajtas—
 Kvazaŭ la poeto estus neklerulo,
 Kaj legantoj malinteligantaj homoj
 Komprenantaj nur poemojn por infanoj).
 Lerte tradukitaj versoj alsimilas
 Belulinon, kiu portas novan robon
 Kaj ŝajnigas laŭkutima la novaĵon
 Per inece kalkulitaj malatentoj.
 Laŭ la vortoj de l' poeto Robert Herrick:

Dolĉa malordeco ĉe la vestoj
Trafas kiel koketecaj gestoj—
Tolmuslino gaja kaj ekscita
Lerte sur la ŝultrojn surjetita—
Liga laĉo, kiu tro obstina
Flirtas ĉe l' frontaĵo karmezina—
Konfuzita fluo de rubandoj
Nezorgita ĉe manumaj randoj—
Faldo—alloganta vidokupo—
En tumulte susuranta jupo—
Ŝuo, kies kapricema nodo
Tamen estas laŭ ĝentila modo—
Tiuj pli min sorĉas, ol la arto
Tro preciza, kaj en ĉiu parto.

Do, simile ĉe la tradukitaj versoj:
 La originala penso restas sama,
 Eĉ la atmosfero de l' originalo;
 Se la robo estas nova, kaj malkaŝas,
 Tie-tie, trajtojn de la novmodisto—
 Jen detalojn en inversigita ordo,
 Jen malsaman tamen trafan sonimiton,

Jen hazardan ripetadon de literoj—
 Eble tio povos gajni admirantojn
 Kiuj ne rimarkis la antaŭan ĉarmon.

* * *

Kiel vortserĉanto en la leksikono
 Forlogiĝas per aliaj vortotrovoj,
 Tiel mi, vagante sur la vasta kampo
 De la angla poezio, perdas min;
 Kaj inter tiom da belaĵoj ne povante
 Kontraŭstari la allogon de la multaj
 Flankaleoj, mian celon mi forgesas.
 Poezio kunkombinas la florecon
 De la pensoj kun muziko de la vortoj,
 Kvazaŭ en ĝardeno sonus simfonio.
 Kiajn orkestranojn tie ni aŭskultas!
 Ties melodiojn mi ne ĝuste ŝatis,
 Antaŭ ol mi penis ilin interpreti.

* * *

Kiel Aladino antaŭ la kaverno
 Staras mi, fidante al magia vorto,
 Kaj spirito kiu en malnova lampo
 Loĝis tra jarcentoj, tamen tuj sin montros
 Kiam per ioma peno mi lin vokos.
 Multaj estas la kavernoj de l' saĝeco:
 Do, elportu la antikvajn lumigilojn,
 Kaj forviŝu nun la polvon de la jaroj!
 Tiam ni retrovos la perditan brilon,
 Kaj sorĉistoj gvidos nin al novaj riĉoj.

II.

TRADUKANTE

*“ Ĉiom de la ĉina poezio estas rimhava, kaj oni antaŭ-
 supozas, ke ĉiu ĉina literaturisto estas poeto. Ĉar la verkado
 de poemoj jam daŭris almenaŭ 3,000 jarojn, kaj ĉar la honoro
 postulas, ke la familio de aŭtoro publikigu ĉiujn ties verkojn
 post lia morto, la kvanto de la ĉina poezio estas tute ne-*

imagebla.—*Children's Encyclopedia.*

“*Kaj tial, antaŭ ĉio, mi diras al vi serioze kaj aŭtoritate (mi scias, ke tiurilate mi pravas): vi devas fari kutimon atentege rigardi la vortojn, kaj vin certigi pri ilia signifo, silabon post silabo—eĉ literon post litero. La tuta diferenco inter la edukiteco kaj la needukiteco (rilate al ĝia intelekta aspekto), troviĝas en tiu precizemo.*”—*Ruskin.*

“*La (persa) poeto plej konata de legantoj de la angla lingvo estas Omar Khayyam, kies pesimisman Rubajaron Edward FitzGerald parafrasis en la tempo de la reĝino Victoria, kun tia muzikeca melankolio, ke en sia angla robo ĝi pli ĉarmis, ol la persa originalo, kaj fariĝis angla klasiko.*”—*Children's Encyclopedia.*

“*La beleco de formo en ia literatura verko neeviteble perdiĝas pro traduko, kvankam ĝi povas esti iom anstataŭata aŭ imitata en lerta traduko; sed la beleco kaj forto de ideoj devus esti facile konserveblaj, tiel ekzemple, ke oni povas diri, ke la genieco de FitzGerald entute esprimis la belaĵojn de la verskvaroj de Omar Khayyam.*”—*Prof. E. G. Browne, Cambridge, en Literatura Historio de Persujo.*

“*FitzGerald alprenis la solan metrikon kiu taŭgas por verskvaroj (t.e. anglalingve—La Aŭtoro) . . . po dek silaboj en ĉiu verso. Iom da metrika konformeco ekzistas inter la metriko de la originalo kaj tiu de la traduko, kaj kvankam la akordo tiurilate ne estas perfekta, almenaŭ ĝi pensigas pri la originalo. Aleksandriaj versoj estus eĉ pli taŭgaj, kaj . . . germanaj tradukintoj de la Rubaiyat de Omar jam uzis ilin; sed . . . tiu metriko ne konvenas al la angla lingvo.*”—*El la Enkonduko de Syed Abdul Majid al La Rubaiyat de Hafiz.*

(*Do, nek la anglaj nek la germanaj tradukintoj sklavece imitis la formon de la persa originalo, sed ŝanĝis ĝin konforme al la bezonoj de siaj lingvoj. Tiun liberon ankaŭ ni Esperantistoj rajtas alpreni. Pasante, la persa ‘rubajo’ ne estas verskvaro, sed versparo kun interna rimo en la unua verso; tamen en la eŭropaj lingvoj tiaj versoj estus tro longaj. Refoje ni ŝanĝis la originalan formon!—La Aŭtoro.*)

Preskaŭ ĉiom de la angla poezio
 Marŝas laŭ la takto de la jamba ritmo,
 Kaj kvintaktaj estas la plejmultaj versoj.
 Konsonantoj inter unusilabaĵoj
 Kiel kugloj kontraŭ ŝildojn interklakas.
 Male, Esperanto estas ina lingvo,
 Milda, dolĉa, flua, kun vokalaj finoj
 Kiuj kreas spacon inter la radikoj—
 Lingvo taŭga por la amo kaj la paco.
 Kiel geedzigi tiajn malsamulojn?
 Ĉu do kontraŭ la ineco ni perfortu,
 Ŝanĝu ĝian sekson, kaj el belulino
 Kreu nur duonaseksan, ĝiban monstron,
 Kiun eĉ la geamintoj ne rekonos?
 Ĉu vi dubas, ke la jamboj ja perfortas?
 Skandu, do, per jamboj, versojn el *Hamleto*,
 Kaj rimarku la disrompon de la vortoj:

“*Ne PREN/u PRUNT/e KAJ/ ne PRUNT/e
 DON/u . . .*”

Poste, skandu per trokeoj, kaj komparu:

“*Ne/ PRENu/ PRUNTe/ KAJ ne/ PRUNTe/
 DONu . . .*”

Kiu do makulas nian Esperanton
 Per apostrofitaj jamboj, nur similas
 Al koloniano el malvarma lando,
 Kiu sur tropika tero vestas sin
 Ankoraŭ varme kiel ĉe l' patrujo—
 Kaj retenas ĉiam la reirbileton!

* * *

Anglalingve, ĉiu unusilabaĵo
 Povas esti vivoplena kiel ovo;
 Esperante, senakcentaj finvokaloj
 Oleumas la fluadon de la vortoj,
 Sed komprenon pli ol esprimadon helpas.
 Sekve, sama verslongeco Esperante

Ne esprimas la originalan penson,
 Tamen sonas kaj aspektas malpli longa:
 Pegasus, ekgalopante, elseligas
 La rajdanton. Sed samtempe ambaŭ mankojn
 Ni forigas, aldonante pluajn taktojn
 Laŭ bezono de la esprimotaj pensoj.
 Kaj, se jamboj tradukitaj per trokeoj
 Perdas iom da digneco pro la ritmo,
 Tiu kroma takto kiel brido agas,
 Kaj redonas la klasikan majestecon.
 Nur por la samideano oni verkas;
 Tiu la originalon ne komprenas,
 Ne sin ĝenas pri originala formo,
 Sed postulas nur, ke la traduko estu
 Plaĉa, flua, komprenebla kaj fidela.
 Ĉio, kio interrompas la tralegon,
 Ĉu neregulaĵo, ĉu neologismo,
 Elizio, aŭ la kunpremita frazo,
 Estas per la plua peno evitinda . . .

* * *

Por ke ni konservu—kial, mi ne scias—
 Iun fremdan econ de gepatra lingvo,
 Ni tro ofte murdis la pulsantan vivon,
 Kaj mumion faris el la nuda korpo.
 Ni do kun fiero liberigu nin
 El la postuloj de la nacilandaj stiloj:
 Malgracie marŝas tiu, kiu premas
 Policanpiedon en princinan ŝuon.

* * *

Pli la tradukanto gajnas, ol legantoj:
 Kvankam iun verkon ofte mi tralegis,
 Ne antaŭe mi haltigis min por pensi:
 “Kion ĝuste tiu frazo volas diri?”
 Nun mi elkonstatas ĝian trafan povon;
 Vortbeleco eklumigas mian cerbon
 Kiel fulmo montras noktomezan floron.

Ĉiam poste, tiu vorto estos mia,
 Tiu bela frazo inter miaj riĉoj . . .
Sed vidu, la mateno en purpura vesto
Marŝas oriente sur la monta roso . . .
 Kio estas realeco? La pejzaĝo
 El solida tero, estas efemera
 Kiel tiu horo kiam ni ĝin vidas;
 Sed la bela figuraĵo de la menso
 Daŭras, aktuala tra la tuta vivo.
 La malĝojo tiel premas sur la koron,
 Ke la suferanto, nur duonkonscia,
 Trovas sin sen larmoj en nebula mondo:
 Tamen poste, tra legante la doloron
 Elpensitan en la cerbo de poeto,
 Li resentas kion li ne povis diri,
 Kaj esploras nun pro nura fantazio.

* * *

Nur dum tradukado sentis mi la forton
 De la du tremigaj versoj en *Hamleto*:
Tomboj kuŝis forlasite, kaj kadavroj en kiteloj
Pepis kaj buŝoste babilaciis sur la romaj stratoj.
 Elnaskinte tiun bildon, nepre Shakespeare
 Enlitiĝis kun la hirtiĝantaj haroj!
 Kia perdo, kiam pro metrikaj limoj,
 Zamenhof tradukis jene tiujn versojn:
Mortintoj sin ellevis el la tomboj
Kaj promenadis tra la urbaj stratoj.

* * *

Eble en la tuta Sonetaro, Shakespeare
 Ne superis la belecon de la versoj: (*Son. CXXXII*)
Kaj verdire, nek la suno de l' mateno
Al la griza vango de la oriento
Pli konvenas—nek la stelo je alveno
De vespero, al la ombra okcidento—
Ol al vi la funebrantaj du okuloj.

* * *

Kiu perdis la amatojn sentas vera
 La soneton de Elizabeto Browning:
*Sciu: korangoro estas senpasia;
 Nur la nekredantoj pri la malespero
 Kiel pri malĝojo, nokte tra l' aero
 Krias kaj riproĉas al la trono Dia.
 Ĉe l' animo, dezerteco emocia
 Kuŝas nud-silenta kiel ĉe la tero,
 Sub paliga helo kaj okul-severo
 De ĉiela Tuto. Pro Mortinto via,
 Korprofunda homo, mute, kvazaŭ morte,
 Montru la malĝojon—Jen, la monumenta
 Statuego devas stari kaj sopiri,
 Ĝis en polvon diserigis ĝi senforte.
 Palpu: se marmoro seka kaj sensenta
 Plori povus, ankaŭ povus ĝi foriri.*

* * *

Tri semajnojn loĝis mi kun la Muziko,
 Tradukante eble la plej belan verkon
 En la angla lingvo: Keats: *Al la Aŭtuno:*
*ĝis abeloj kredos, ke la jaro
 De sunvarmaj tagoj ne finiĝos; ĉar nektaro
 De somero superfluas en gluecaj ĉeloj.*

*Kiu Vin ne vidis ofte inter Viaj varoj?
 Kiu ajn vagante serĉas, kelkfoje trovas
 Vin revanta sur greneja planko, kun la haroj
 Levetataj kiam la kribranta vento blovas;
 Aŭ en parte rikoltita sulko, plendormanta
 Pro la fumo de papavoj . . .*

* * *

Ĉu ne ĉiu vera arto sin apogas
 Sur elekton de detaloj forgesitaj
 De la ordinara homo—kiuj, tamen,
 Geniece esprimitaj, lin devigas
 Rememori la tutajon per la parto?

Jen, detalo estas ono de la Vero,
 Kaj la Vero estas absoluta tuto,
 Gemo kiu foje kuŝas nevidata
 En la mallumeco de la homa menso;
 Kaj, post longa noktumado, vortradio
 Lumas sur faceton, kaj la homo tuj
 Rekonas tion, kio estas en li mem,
 Kaj krias el instinkta scio: Jen la Vero!

III.

TRADUKINTE

“*Bonege estas, diri tion, kion la mondo neniam forgesos.*”

“*Eĉ poeziamantaj kritikoj grave eraris de tempo al tempo, rifuzante la nomon poezion al versoj kiuj hazarde ne plaĉis al ili en tiu momento.*”—*Children’s Encyclopedia.*

“*Kioma grado da merito devas difini la Plej Bonan? Ke poemo indu je la genieco de la verkinto—ke ĝi atingu perfektecon konforman al la celo—ke oni postulu poluron proporcion al mallongeco—ke pasio, koloro kaj originaleco ne kompensas pri gravaj mankoj ĉe klareco, unueco aŭ vereco—ke kelke da bonaj versoj ne estigas bonan poemon—ke la vulgara taksado utilas pli trafe kiel gvidilo, ol kiel kompasoj—antaŭ ĉio, ke oni serĉu bonegecon en la tuto, prefere ol en la partoj—tiujn kaj aliajn normojn oni ĉiam konstante observis.*”—*F. T. Palgrave en Preface to Golden Treasury.*

Mi vekigis kvazaŭ el sorĉita revo
 Kie homoj, bildoj, vortoj kaj muziko
 Kunmiksiĝis—kaj konstatis nevolonte,
 Ke la tradukado estas nun finita.
 Mi loĝadis kelkajn horojn ĉe la steloj,
 Kaj ankoraŭ portas de l’ arĝenta polvo;

Mi aŭskultis longe la eternajn voĉojn,
 Kaj iliajn eĥojn aŭdas en la koro.
 Vero, paco kaj beleco tie regis,
 Akordiĝo kiel inter la anĝeloj;
 Ununura homa emocio mankis,
 Ĉar malamo pereigas la animon.

* * *

Ĉu mi verkis ion vere honorindan?
 Tion mi ne scias. Eble mi reportis
 Nur malgrandan eron de la granda fajro,
 Nur malklaran eĥon de la klara voĉo,
 Nur memoron de muziko nun silenta . . .
 Mi almenaŭ repensigos nian mondon
 Pri la nomoj de mortintoj, kies vortoj
 Unuigis per magio la belecon
 Kun la vero; vortoj kiuj postvivados
 La tumulton de la militantaj jaroj,
 Kaj ankoraŭ nin konsolos kaj mirigos,
 Resonante el la Tempo kaj la Tombo.

* * *

La memoro de la nepensema homo
 Kiel la krepusko, nur mallonge daŭras.
 Interesas lin la aktuala saĝo,
 Laŭte parolata de aŭdataj voĉoj.
 Ke aliaj jam travivis lian vivon,
 Solvis liajn vivproblemojn kaj foriris,
 Jam ne gravas: ili kuŝas sub la grundo.

*Blazonoj de l' altrango, kaj la pompo de la povo,
 La gajnoj per la belo, per la riĉo kaj aplombo—
 Egale ili venas al neevitebla trovo:*

La vojo al la gloro nur kondukas al la tombo.

Povas esti, ke la tradukanto trovos,
 Traserĉante la trezorojn de la lingvo,
 Iujn malŝatitajn riĉojn de poeto
 Kies povo antaŭiris la komprenon
 De la tiamuloj, kaj frapadis vane,

Ĉar tro frue, sur la necedantan pardon:
Ja multaj la juveloj kies trankvilema lumo
Radias en kavernoj ĉe la oceana fundo;
Ja multaj la kreskaĵoj kies floroj kaj parfumo
Perdiĝas senutile super dezerteca grundo.
 Sed per tiuj versoj el la *Elegio*,
 Gray pliĝuste celis la multmil gehomojn
 Kiuj, kvankam nekleruloj, pro talento
 Efektiva sed neniam esprimebla,
 Sentas en la brusto fortan emociion
 Kiam ili vidas veron kaj belecon.
 Tiuj estas ankaŭ inter la poetoj,
 Kvankam el iliaj miroplenaj mensoj
 Venas eĉ ne unu vorto, kaj luktante
 Kontraŭ io sufokanta, ili staras
 Mutaj, en silento de vivanta morto.

* * *

Se en via koro lumas poezio,
 Se en la oreloj sonas la muziko,
 Se en via plumo estas tiu povo
 Kiu donas la belecon por beleco
 Kaj la veron por la vero; se vi volas
 Verki kaj reverki, ĝis la klara lingvo,
 Simpla kaj ineca kiel ĉe la prozo,
 Fluos en la menson verva kiel vino—
 Se al tio, jes!—vin petas la Hieraŭ
 Nepre ligi ĝin kun nia vasta Morgaŭ . . .
 Ni la tradukantoj turnas la ŝlosilon
 En la pordo de la monda trezorejo,
 La magian vorton fine ellerninte
 De la majstra magiisto. Niaj manoj
 Tenas la malnovajn lampojn, kies lumo,
 Retrovita, montras, kvazaŭ fumspirito,
 La kaŝitajn gemojn de antaŭaj homoj;
 Kaj ju pli multnombre ni disdonos ilin—
 Jen, des pli da riĉoj restos por ni mem.

9.8.1947.

TRADUKITAJ POEMOJ

KANTOJ DE L' PATRINO
(Songs My Mother Taught Me)

(Als Die Alte Mutter)

Kiam la patrino
 Ĉarmis min per kanto,
 Fluis sur la vangoj
 Larmoj de l' kantanto.

Kiam al infanoj
 Ofte pro memoro
 Mi simile kantas,
 Fluas larmoj—el mia koro.

18.9.1943.

(Por Infanoj)

SOMERA ENLITIGO
(Robert Louis Stevenson)

En vintro vekas min la stelo,
 Aŭ flava lumo de kandelo.
 Somere, tute mala ago,
 Mi enlitiĝas dum la tago.

Mi kuŝas kiam la paseroj
 Ankoraŭ pepas en hederoj,
 Kaj plenaĝulaj piedplatoj
 Ankoraŭ sonas sur la stratoj.

Kaj ĉu ne bedaŭrinde estas,
 Ke kvankam ĉio hela restas,
 Kaj kvankam ludi mi deziras,
 Al la lito jen mi iras?

1944?

(Por Infanoj)

MIA OMBRO

(Robert Louis Stevenson)

Mi havas etan ombron, kiu ĉien min kunvenas,
 Kaj kiel ĝi utilas, mi tute ne komprenas.
 Al mi ĝi tre similas, de la plando ĝis la verto,
 Kaj en liton antaŭsaltas min per miregiga lerto.

Kaj kio estas stranga, ĝi kreskas ja senbride,
 Ne kiel ni aliaj, ĉiam malrapide,
 Sed jen ĝi ekaltigas, laŭ timiga maniero,
 Kaj jen ĝi ekforvelkas ĝis la tuta malapero.

Neniel ajn ĝi scias, kun infanoj kiel ludi;
 Ĝi scias nur min trompi, kaj ridinde sin altrudi.
 Ĝi tiel min kunestas, ke ĝi timas, mi divenas!
 Mi hontus trudi min al Varnjo*, kiel tiu min altenas.

Iufojon, frumatene, antaŭ sundeĵoro,
 Mi vestis min, kaj roson vidis, sur ĉiu dolĉa floro;
 Sed tiu eta ombro, kiel aĉa songkaptito,
 Rifuzis min kuniri, kaj dormadis en la lito.

1944?

**Vartistino*; aŭ legu: *Panjo*.

(Por Infanoj)

PLUVO

(Robert Louis Stevenson)

La pluvo falas ĉie ĉi,
 Sur kampon kaj arbaron—
 Kaj sur ombrelojn tie ĉi,
 Sur ŝipojn kaj sur maron.

1944?

(*Eksperimenta Traduko*)

MORTO DE ARTURO

(Alfred, Lordo Tennyson)

Tra la tago, bruo de batalo tondris
 Ĉe la montoj apud la dumvintra maro;
 Ĝis en Lyonesse la anoj de la Tablo
 Unuope mortis ĉirkaŭ sia Reĝo;
 Kaj pro la profunda vundo de Arturo,
 Lin eklevis tiam nobla Bédivér—
 Sir Bediver, la lasta el la kavaliroj,—
 Kaj lin portis en apudan preĝejeton,
 Rompitan altarejon kun rompita kruco,
 Sur malhela kolo de senfrukta grundo.
 Iuflanke, jen la maro, ĉe l' alia,
 Vasta akvo; kaj la luno estis plena.

Tiam al Sir Bediver Arturo diris:

“ Sekve el hodiaŭ, tute diserigis
 La plej brava rondo en la mondmemoro,
 De konataj kavaliroj. Tiel dormas
 Tiuj, kiujn mi amadis. Kaj mi kredas,
 Ke neniam ajn, en la estonta tempo,
 Ni nin ravos per rakontoj kavaliraj
 Kiel ni antaŭe faris, promenante
 En la Camelotaj haloj kaj ĝardenoj.
 Mi pereas fare de popolo mia,
 Kvankam Merlin ĵuris, ke mi venos ree
 Por denove regi. Estu kio estos;
 Tiel grave tra la kasko oni frapis,
 Ke, sen helpo, mi ne vivos ĝis mateno.
 Prenu do Ekskalibur, la glavon kiu
 Estis mia fieraĵo; ja vi scias,
 Kiel en somera tagomezo, brako

Levis sin el sino de ĉi tiu lago,
Blankvestita en riĉega silko, stranga
Kaj mirinda, kun la glavo—kiel mi
Alremis kaj alprenis ĝin kaj reĝe portis;
Kie ajn pri miaj faroj oni kantos
Postatempe, ankaŭ tion oni diros.
Sed prokrastu ne: Ekskaliburon prenu,
En la lagomezon nun forĵetu ĝin.
Kion vi rimarkos, diru tuj al mi.”

Al li respondis tiam brava Bediver:
“ Ne decas, Reĝa Moŝto, tiel vin forlasi,
Sola kaj senhelpa, kun trakaska tranĉo.
Eĉ etaĵo povus malutili al vundito.
Tamen mi obeos tute vian volon;
Kion mi rimarkos, tuj al vi mi diros.”

Parolinte, el la sankta ruinaĵo
Li elpaŝis, en lunlumon sur tombejo
Kie kuŝas ostoj de antikvaj homoj,
Kie trans antaŭajn kavalirojn kantis
Ŝaŭma kaj malvarma vento. Li, irinte
Laŭ zigzagaj vojoj, preter pintaj rokoj,
Venis al la brila lagoebenaĵo.

Ekskalibur la glavon tie li eltiris;
Supre, vintra luno, heligante jupon
De la longa nuboj, montris sin kaj brilis
Akre pro la frosto, sur la glavtenilon,
Kies tuta longo ardis kaj trembrilis
Pro fajreroj diamantaj, miriado
De topazolomoj, kaj pro zirkonaĵo
De la plej subtila juvelarto. Longe
Li rigardis, kaj l' okuloj konfuziĝis
Dum li staris tiel-tiel hezitante,
Tuj ĵetonta; fine ŝajnis pli prudente
Ekskaliburon kaŝi tie en la junkoj
Kiuj sekaj kaj rigidaj ĉirkaŭfajfis.
Malrapide li reiris al la Reĝo.

Arturo Reĝo diris al Sir Bediver,
 “Ĉu vi plenumis la de mi donitan devon?
 Kion vidis vi, aŭ kion aŭdis?” Kaj
 Sir Bediver respondis, “Ondojn en la junkoj
 Aŭdis mi; kaj ondojn kontraŭ la krutaĵo.”
 Arturo Reĝo, pala kaj malforta, kriis,
 “Vi perfidis viajn nomon kaj naturon,
 Ne honeste respondante kiel decas
 Al fidinda, kaj al nobla kavaliro:
 Certa signo nepre sekvus, aŭ per mano
 Aŭ per voĉo, aŭ moviĝo en la lago.
 Hontigaĵo estas, ke mensogas viroj.
 Tamen, mi ordonas vin, tuj nun reiru,
 Kiel vi volema kaj amata estas,
 Faru kion mi deziras, kaj revenu.”

Duafojon tiam iris Bediver
 Trans la terokolon, kaj paŝadis
 Apud tiu akvo, pense kalkulante
 Roskovritajn ŝtonojn; sed vidante ree
 La mirigan glavtenilon, tiel strange
 Gravuritan, li kun manofrapo kriis,
 “Se mi ja forjetus tiun glavon, nepre
 Io altvalora, rimarkinda, tiam
 Mankus je eterno al la mondo; io,
 Kio povus plaĉi al tre multaj homoj.
 Kia bono sekvus, se mi farus tion?
 Kiom gravus, se mi malobeus?—tamen
 La obeo estas bazo de l' regado.
 Ĉu obei reĝon, do, se li ordonas
 Agon kiu ja efikos kontraŭ li?
 La Reĝo nun malsanas, kaj ne ĝuste taksas
 Sian faron. Kion do pri mia lordo
 Konos la estonto, krom la vanta spiro
 Kaj la onidira dubo? Sed, se iu
 En la trezorejo de potencaj reĝoj
 Gardus tiun, ĝi montriĝus ĉe turniroj:

‘Ekskalibur, la glavo de Arturo Reĝo,
 Verko de la Junulino de la Lago;
 Jarojn naŭ, sidante en la profundejo
 Sur kaŝitaj montetbazoj, ŝi laboris.’
 Tion ia maljunulo povus diri
 Postatempe, antaŭ respektema mondo.
 Tamen nun perdiĝus gloro kaj honoro.”

Tiel pro koncepto sia konfuzita,
 Duafojon li Ekskaliburon kaŝis,
 Kaj reiris malrapide al la Reĝo.
 Kaj Arturo per profundaj spiroj diris:
 “Kion do vi vidis, kion aŭdis vi?”
 Kaj Bediver respondis, “Kontraŭ la krutaĵo
 Ondoĵ ŝmacis, kaj plaŭdetis ĉe la junkoj.”

Arturo Reĝo kolerege jen ekkriis:
 “Ho, mizera, nefidinda kaj kruela,
 Perfidema kaj malkavalira! Ve!
 Aŭtoritaton la mortanta reĝo perdas
 Kun la povo de l’ okuloj kiuj ĉiam
 Rompis kontraŭvolon. Vin mi fine konas.
 Vi, el ĉiuj kavaliroj lastrestanto,
 Kiu devus ĉies rolojn unuigi,
 Pro la glavtenilo volas min perfidi,
 Ĉu avida por la oro, aŭ ĉar vi
 Sopiras knabinecan ravenon de l’ okuloj.
 Tamen, ĉar dufoje oni povas cedi,
 Kaj sukcesi triaprove, vin forigu;
 Se Ekskaliburon vi ne ĵetos nun,
 Mi levos min kaj vin mortigos propramane.”

Tiam ekstariĝis Bediver, kaj kuris,
 Kaj malpeze desaltinte terfaldajojn,
 Iris en la junkarejon, kaj la glavon
 Prenis, rondesvingis kaj ĵetegis ĝin.
 La granda klingo fulmis en beleco luna,
 Rondflagrante; kaj ĵetite arke, flugis

Kiel lumrubando de mateno norda
 Vidita kie moviĝantaj glacimasoj
 Interfrapas nokte en la norda maro.
 Tiel ardis, do, Ekskalibur, kaj falis;
 Sed ĝi ne la akvon tuŝis, kiam brako
 Blankvestita en riĉega silko, stranga
 Kaj mirinda, prenis ĝin, trifoje svingis,
 Kaj subtiris ĝin malsupren en la lagon.
 Vigle iris la alia al la Reĝo.

Arturo, per pli malfacilaj spiroj, diris:
 "La okuloj montras plenumitan devon.
 Diru klare: kion aŭdis vi, aŭ vidis?"
 Brave nobla Bediver respondon faris:
 "Reĝa Moŝto, mi fermtenis la okulojn,
 Ke la gemoj ne blindigu mian celon,
 Ĉar neniam mi jam vidis, kaj ne vidos
 Tie ĉi aŭ aliloke, ĝis la morto,
 Kvankam mi travivus vivojn de tri homoj,
 Tian miraklaĵon, kia tiu glavo.
 Tiam ambaŭmane mi rondsvingis kaj
 Ĵetegis ĝin; sed ree rigardante, vidis
 Brakon, blanke kaj mistike envestitan,
 Kiu kaptis la tenilon, ĝin trifoje
 Rondsvingis, kaj subtiris sub la akvon."

Kaj Arturo, spasme parolante, diris:
 "Proksimiĝas mia morto; nun mi iru.
 Donu viajn ŝultrojn por surpreni min,
 Kaj portu min al tiu bordo; sed mi timas,
 Ke la vundo malvarmiĝis, kaj mi mortos."
 Li, dirante tion, sin duone levis
 Malrapide, kun doloro, kaj duone
 Sin apogis sur la brakon, rigardante
 Sopireme, el okuloj plenaj, bluaj,
 Kvazaŭbilde. Lin Sir Bediver komplete
 Vidis tra la larmoj, kaj ne trovis vortojn,

Tiam surgenu metis trans la ŝultrojn
La malviglajn manojn, zorge levis lin
Kaj stariĝinte, portis lin tra la tombejo.

Sed la Reĝo laŭte spiris dum la marŝo,
Kiel iu, kiu sentas la inkubon
Sur la lito, en silenta domo; tiel
Ĝemis kaj murmuris ĉe l' orelo: "Vigle!
Jam tro longe mi atendis, kaj mi mortos."
Tamen la alia trans malebenaĵojn
Rapidiris, investata en spirajo,
Sur la frostigita tero aspektante
Pli ol home granda; post li, jen la maro,
Kaj antaŭe, krio. Pensoj pelis lin.
Brutintis la armaĵoj en la frostaj kavoj
Kaj abismoj; ĉie dekstre kaj maldekstre
La krutaĵo nigre-nuda sonoregis
Ĉirkaŭ li, ĉante laŭte ĉiun frapon
De armitaj kalkanumoj sur la rokon.
Kaj subite jen! ebena lago, kaj
La longaj mirindaĵoj de la vintra luno.

Tiam, ili sube vidis, ke alvenas
Reĝboato, tra la tuta longo nigra
Kaj funebra; kaj pliposte ekkonscii
Pri ferdekoj kiuj portas densan aron
De majestaj formoj, nigre stolvestitaj
Kun kapuĉoj nigraj, kiel sonĝe—apud
Tiuj, jen Reĝinoj tri, kun oraj kronoj—
Kaj de tiuj sonis krio tremiranta
Ĝis la vibretantaj steloj, kaj lamento
Dolorega, kvazaŭ unuvoĉa, kiel
Vento kiu fajfas nokte en dezerta lando
De la mondkreiĝo nuda kaj senhoma.

Murmuris do Arturo: “En la reĝboaton
 Metu min.” Kaj tien ili iris. Jen,
 Sin levis tri Reĝinoj, kaj la Reĝon prenis.
 Ili ploris; ŝi el ĉiuj la plej alta
 Kaj plej bela, alsinigis lian kapon
 Kaj malligis la rompitan kaskon, frotis
 Liajn manojn, diris lian nomon, laŭte
 Plendis kaj amare larmis super frunto
 Blanka kaj de sango transstriita, kiel
 Sur velkintan lunon trafas matenstrio
 Ruĝe el la freŝnaskata oriento;
 Kaj la krurarmaĵoj, kaj la ŝultrarmaĵoj,
 Makulitaj estis pro batalo; kaj
 La brilaj, delikataj bukloj—ŝajnigantaj,
 Ke la frunto estas leviĝanta suno
 Alte de la trono—sekaj pro la polvo,
 Pinte koaglintaj, kaj libere pendaj,
 Kunmiksiĝis kun lipharoj kavaliraj.
 Do, kolono frakasita li sterniĝis,
 Tiu Reĝo kiu, kun eninga lanco,
 Sprone-ĝis-plumare stelo de turniroj,
 Ĉe l’ areno Camelot antaŭe rajdis,
 Admirata de virinoj kaj de reĝoj.

Tiam laŭte kriis brava Bediver,
 “Arturo mia lordo, kien nun mi iros?
 Kie kaŝos miajn frunton kaj okulojn?
 Mortis jam la veraj kaj antaŭaj tempoj,
 Kiam ĉiu tago portis noblan eblon,
 Kaj ĉiu eblo vokis noblan kavaliron.
 Tiaj ne okazis jam de kiam Lumo
 Gvidis la Saĝulojn kun la mirhdonaco.
 Nun disiĝis tute tiu Ronda Tablo,
 Kiu respegulis la potencan mondon;
 Kaj la lasta, mi foriros sen kunuloj,
 Tagoj senlumiĝos kaj la jaroj pasos
 Inter novaj homoj, nekonataj mensoj.”

Arturo penrespondis el la reĝboato:
 “La antaŭa moro cedas al la nova,
 Kaj la celon Dio trafas multavoje,
 Por ke unu bona moro ne koruptu.
 Vi konsolu vin, ĉar tion mi ne povas.
 Vivon mi travivis; kion do mi faris,
 Dio mem purigu! Tamen, se neniam
 Vi revidus min, por la animo preĝu:
 Pli da celoj plenumiĝas per la preĝo,
 Ol la mondo eĉ imagas. Por mi, tial,
 Voĉon kiel fonton levu tage-nokte,
 Ĉar la homo ne superas al la ŝafo
 Kiu nutras blindan vivon en la cerbo,
 Se, konante Dion, li ne preĝas por si,
 Kaj por tiuj, kiuj nomas lin amiko.
 Tiel oraj ĉenoj ligas la homaron
 Ĉirkaŭ la piedoj de ĉiea Dio.

Sed adiaŭ. Malproksimen mi foriros
 Kun ĉi tiuj—se mi efektive iros—
 (Jen, la dubo ombras tute mian menson)—
 Al insula valo en Aviliono,
 Kie eĉ neniam hajlas, pluvos, neĝas,
 Nek la vento blovas laŭte; ĝi troviĝas
 Riĉpaŝteja, bela kaj feliĉa pro
 La fruktarbaroj, laŭboj kaj somera maro,
 Kie mi sanigos mian gravan vundon.”

Tiel diris li, kaj la boato flosis
 Vele kaj remile de la bordo, kiel
 La plenbrusta cigno kiu, jam mortonta,
 Flute kantas, kaj skuante purajn plumojn,
 Enakviĝas per la nigraj palmpiedoj.
 Longe staris Bediver, rememorante,
 Ĝis la ŝipo faris kontraŭ matenuĝo
 Nigran punkton, kaj la lamentado mortis.

26.2.1946.

(*Ekspérimenta traduko*)

INFANAĜO DE HIAVATA

(H. W. Longfellow)

Ĉe la bordo de la Giĉe-Gumi,
 Ĉe la brila kaj Marega Akvo,
 Staris la vigvamo de Nokomis,
 De la lunfilino, de Nokomis,
 Malantaŭe ŝvebis la arbaro,
 La mallumaj kaj la nigraj pinoj,
 Ŝvebis la abioj fruktoplenaj;
 Kaj antaŭe ondis hela akvo,
 Ondis klara kaj sunora akvo,
 Ondis brile la Marega Akvo.
 Tie do Nokomis la maljuna,
 Vartis la infanon Hiavata,
 Lulis lin en lito el tilio
 Dolĉa pro la musko kaj la junkoj,
 Kunligita per la cervtendenoj;
 Kvietigis lian plendoploron,
 Diris, "Nuda Urso kaptos vin!"
 Kaj endormige lulis lin, kantante
 "Eŭa-jea! mia noktuetto!
 Kiu do lumigas la vigvamon,
 Per okuloj jen lumigas ĝin?
 Eŭa-jea, mia noktuetto!"

Multon do instruis lin Nokomis
 Pri la brilaj steloj de l' ĉielo,
 Montris al li Iŝku-da, kometon,
 Iŝku-da kun fajr-rubandaj haroj;
 Montris Morto-dancon de spiritoj,
 Viroj kun birdplumoj kaj hakiloj,
 Norde en distanco ekflagrantaj
 Dum la frostaj noktoj de la vintro;

Montris blankan vojon sur ĉielo,
 Vojon de l' fantomoj kaj de l' ombroj
 Transirantan rekte la ĉielon,
 Densan pro fantomoj: kaj la ombroj.

Ĉe la pordo en somervesperoj
 Sidis la malgranda Hiavata,
 Aŭdis la flustradon en la pinoj,
 Aŭdis la plaŭdetojn de la akvo,
 Sonojn de muziko kaj de miro:
 "Mine-ŭaŭa!" diris la pinaro,
 "Mudŭej-aŭŝka!" diris la akvego;
 Vidis la fulgoron, Ŭa-ŭa-tejsi,
 Traffirtantan la krepuskan ombron,
 Per trembrilo de kandelo sia
 Lumigante arbojn kaj densejojn;
 Kaj li kantis la infanan kanton
 Al li instruitan de Nokomis:
 "Ŭa-ŭa-tejsi, eta lumiganto,
 Insekteto kun la blanka fajro,
 Dancanteto kun la blanka fajro,
 Gvidu min per via kandeleteto
 Antaŭ ol mi dorme enlitiĝos,
 Antaŭ ol palpebrojn mi kunfermos!"

Vidis lunon el la akvo flosi,
 Treme, ronde el la akvo flosi,
 Surajn ombrojn kaj makulojn vidis,
 Flustris, "Kio estas, jen, Nokomis?"
 Kaj Nokomis dolĉe alrespondis:
 "Iam, kolerega triboviro
 Prenis la avinon kaj ŝin ĵetis
 Sur ĉielon je la noktomezo;
 Tute ĝis la luno ŝin li ĵetis;
 Ŝian korpon, do, vi vidas tie."

Vidis belan arkon en ĉielo,
 En la oriento, ĉielarkon:
 Flustris, "Kio estas, jen, Nokomis?"

Kaj Nokomis dolĉe alrespondis:

“Florĉielon jen vi vidas tie.

Ĉiu floro de la sovaĝejo,

Kaj lilio ĉiu de la stepo,

Kiam ili tie ĉi pereas,

Sur ĉielo supra, poste floras.”

Kiam li noktuon aŭdis nokte,

Krie ululantan ĉe l' arbaro,

“Kio estas?” li terure kriis;

“Kio estas?” diris li, “Nokomis?”

Kaj Nokomis dolĉe alrespondis:

“Estas nur noktuo kaj ideto

Parolantaj en la propra lingvo,

Riproĉantaj ĉiu la alian.”

Tiam la malgranda Hiavata

Lernis de la birdoj ties lingvojn,

Lernis ĉies nomon kaj sekretojn,

Kiel la kastoro faras domon,

Kie la sciuro kaŝas glanojn,

Kiel cervo rapidege kuras,

Kial la kuniklo tiom timas;

Kunparolis ilin renkontiĝe,

Nomis ilin ‘Hiavata-fratoj.’

Kaj Iagu, fanfaronemulo,

Li la tre miriga rakontisto,

Li la vojaĝinto parolema,

Li la vivamiko de Nokomis,

Tranĉis li por Hiavata arkon.

Tranĉis ĝin el branĉo de frakceno,

Tranĉis el la kverko-branĉo sagojn,

Plumis kaj silikpintigis ilin,

Kaj el cervofelo faris ŝnuron.

Tiam diris li al Hiavata:

“Iru, mia kara, en arbaron,

Kie ruĝaj cervoj enariĝas,

Kapreolon do mortigu por ni,

Bravan cervon kun kornaro trafu!”

Rekte en arbaron senprokraste
Tute sola iris Hiavata,
Kun fiero pro la sagpafarko;
Kaj la birdoj supre ĉirkaŭkantis,
“ Ne nin pafu, Hiavata! ”
Kantis Ope-ĉi, la rubekolo,
“ Ne nin pafu, Hiavata! ”
Supren sur la kverkon tuj apudan
Saltis Aĝidaŭmo la sciuro,
Tien-reen inter la branĉaro
Tusis kaj babilis de la kverko,
Ridis, kaj rediris inter ridoj,
“ Ne min pafu, Hiavata! ”

Kaj kuniklo foren de l' vojeto
Flankensaltis kaj de malproksime
Rekte sur la koksoj sidiĝante
Iom time, iom petoleme,
Diris al la juna ĉasiranto,
“ Ne min pafu, Hiavata! ”

Sed li ne atentis, kaj ne aŭdis,
Ĉar li pensis pri la ruĝaj cervoj:
Ade li rigardis ties spuron,
Kiu lin kondukis al rivero;
Al la transirejo ĉe l' rivero,
Kvazaŭ dormiranto marŝis li.
En alnaro tie sin kaŝinte,
Li atendis ĝis la cervoj venis,
Ĝis li vidis du kornarojn tie,
Du okulojn tra la kreskaĵaro,
Du naztruojn flari kontraŭvente;
Kaj la cervo venis laŭ la vojo,
Lume makulite inter ombroj;
Kaj en li la koro ekscitiĝis,
Tremis kiel la folioj supre,
Kiel la betulfolioj tremis
Dum la cervo venis laŭ la vojo.

Tiam sur genuon leviĝinte,
 Hiavata cele sagon tiris:
 Nek branĉeton lia faro movis,
 Nek folio flirtis aŭ susuris,
 Sed la vigla kapreolo aŭdis,
 Batis per la kvar piedoj kune,
 Levis unu hufon kaj aŭskultis,
 Saltis renkontiĝe al la sago;
 Ha, zumanta, sortoplena sago,
 Kvazaŭ vespo zumis ĝi kaj pikis!
 Jen la cervo kuŝis sub la arboj
 Apud la rivera transirejo;
 Jam ne batis la timema koro,
 Sed la koro jen de Hiavata
 Ege pulsas, kriis kaj triumfis
 Kiam li la cervon portis hejmen,
 Kaj Iagu kaj Nokomis kune
 Lin salutis kaj aplaŭdis lin.

Kaj Nokomis el la cervofelo
 Faris por la knabo virmantelon,
 Kaj Nokomis el la cervokarno
 Honorigis lin per kunfesteno.
 Ĉiuj homoj venis sin regali,
 Ĉiuj gastoj laŭdis Hiavata,
 Nomis lin Korforta, Son-ge-taha!
 Nomis lin Korbrava, Man-go-tejsi!

28.2.1946.

AŬTUNO

(John Keats)

Sezono de nebuloj kaj de mola fruktopleno!
 Kara intumulo de l' maturiĝanta suno,
 Kun li konspirante, kiel ŝarĝi ĝis la beno
 Murajn vinberujojn per la fruktoj de l' aŭtuno;
 Kiel muskajn arbojn ĉie klini per pomaro;
 Kiel ĉiun frukton maturigi ĝis la koro,—
 Pliŝveligi la kukurbon, doni al avejoj
 Dolĉan kernon; burĝonigi per malfrua floro
 Novkreskaĵon, ĝis abeloj kredos, ke la jaro
 De sunvarmaj tagoj ne finiĝos; ĉar nektaro
 De somero superfluas en gluecaj ĉeloj.

Kiu Vin ne vidis ofte inter Viaj varoj?
 Kiu ajn vagante serĉas, kelkafoje trovas
 Vin revanta sur greneja planko, kun la haroj
 Levetataj kiam la kribranta vento blovas;
 Aŭ en parte rikoltita sulko, plendormanta
 Pro la fumoj de papavoj, dum la falĉileto
 Lasas la falĉaĵon kaj la envolvitajn florojn;
 Iafoje rikoltiste paŝas Vi, tenanta
 Firma la ŝarĝitan kapon, super rivereto;
 Aŭ ĉe cidrigilo pacience, en kvieto,
 Finan gutfaladon Vi rigardas, tutajn horojn.

Kie estas nun la kantoj de l' printempo—kie?
 Jam ne gravas; ĉe Vi ankaŭ, la muziko sonas,
 Kiam la krepuskaj nuboj floras lumradie,
 Kaj la stoploplenaj kampoj rozkoloron donas;
 Tiam en lamenta ĥoro la kuletoj ploras
 Inter la riveraj saliketoj, ira-vena
 Svarm-ondado, laŭ la variema ventopelo;
 Kaj de montaj akvoj la ŝafidoj bleke ĥoras;
 Griloj ĉirpas; kaj per voĉo alta kaj serena,
 Rubekolo fajfas en ĝardeno dombiena,
 Kaj hirundoj ariĝantaj pepas de l' ĉielo.

25.4.1946.

DIANEMO

(Robert Herrick)

Ne fieru, se okulĝemeloj
 Brilas, mia kara, kiel steloj;
 Ne fieru pri kaptita koro,
 Kiam via restas sen doloro;
 Ne fieru pri la luksa tento
 De la haroj al amplena vento:
 Vidu! tiu ĉi rubena globo
 Kiu pendas de l' orela lobo,
 Daŭre brila kaj juvelo restos,
 Kiam via belo jam malestos...

6.7.1946.

SONETO LXIV

(William Shakespeare)

Kiam mi vidas, kiel Tempo fordetruiŝ
 La fieran riĉon de antikva raso—
 Kiel iam altan turon ĝi disskuis,
 Kaj sklavigis kupron al la tempopaso;
 Kiam mi vidas, kiel daŭre la ondaro
 Gajnas avantaĝon sur la borda grundo,
 Kaj la firma tero ĉerpas el la maro
 Abundon kun da perdo, perdon kun abundo;
 Kiam tian ŝanĝon mi en stato vidas,
 Aŭ staton mem forkonsumita en ruinon,
 Mi meditas, ke la jaroj nin insidas—
 Ke la Tempo prenus mian amatinon.
 Tiu penso, kiel morto, nepre ploras,
 Tion jam perdonte, kio plej valoras.

3.6.1946.

SONETO LXV

(William Shakespeare)

Ĉar kupro, ŝtono, tero kaj la maro cedas
Nepre al potenco de malgaja morto,
Kiel kontraŭ tiu la Beleco pledos,
Kies povo estas nur de flora forto?
Kiel la miela spiro de somero
Sieĝon de batantaj tagoj elrezistos,
Kiam eĉ masivaj rokoj, kaj la fero
De gigantaj pordoj, fine ne persistos?
Ho terura meditaĵo! Kie kaŝi
Al la Tempo ties karan ĉefjuvelon?
Kiu malebligos al li pluenpaŝi,
Aŭ reprenos tiun perfortitan belon?
Neniu! krom se, per miraklo, mia amo
En la nigra inko brilus kiel flamo.

4.6.1946.

SONETO CXXXII

(William Shakespeare)

Viaj okuloj, kompatante min, konante
La turmenton mian, kaj la propran koron,
Nigre vestis sin, ameme funebrante,
Kaj rigardas dolĉe mian amdoloron.
Kaj verdire, nek la suno de l' mateno
Al la griza vango de la oriento
Pli konvenas, nek la stelo je alveno
De vespero, al la ombra okcidento,
Ol al vi la funebrantaj du okuloj.
Ho, ke min funebru ankaŭ via koro,
Por ke, kiel la beligaj funebruloj,
Ĉiu parto vin konvenu en priploro!
Tiam la belecon nigra mi deklarus,
Kaj per tiu normo ĉiun mi komparus.

3.2.1947.

LA AGLO

(Alfred Lord Tennyson)

Alkroĉata sur krutaja rando,
 Sunapuda en soleca lando—
 Aglo, meze de lazura grando
 Sube ondas maro senmurmura;
 Ĝi rigardas—kaj de l' monto tura
 Falas, fulmo-fajra kaj terura!

29.7.1946.

LUCASTA

(Kolonelo Lovelace)

Ne min juĝu, Kara, tro severa,
 Se de viaj revmedito,
 Ĉasta brusto, menso senkolera,
 Mi foriros al milito.

Vere, nova amo jam min tenas:
 La unua en batalon;
 Kaj pro plia fido mi alprenas
 Glavon, ŝildon kaj ĉevalon.

Tamen, Kara, vi pardonos min
 La pekon kontraŭ via koro:
 Mi ne povus tiel ami vin,
 Sen plia amo al honoro.

9.8.1946.

LA LUNO

(Percy Bysshe Shelley)

Ĉu vi estas pala pro enuo,
 Ĉar grimpinte, nur tervidon vi akiras?—
 Ĉar pro via fremda evoluo,
 Inter nekonataj steloj vi vagiras—
 Kaj vin turnas, ve-okulon de l' ĉielo,
 Ne trovante ion inda je fidelo?

12.12.1947.

NE KOMPRENATE

(Thomas Bracken—N-Z)

Ne komprenate! Niaj vivoj pli disiras,
 Dum rampante la sezonoj nin kunportas
 Tra la jaroj; ni scivolas—kaj ni miras!—
 Kial Vivo estas Vivo; kaj ni mortas

Ne komprenataj.

Ne komprenate! Ĉiam, el la vivimpresoj,
 La malverajn ni pli amas ĉiujare,
 Ĝis la virto ŝajnas kiel la eksceso;—
 Tiel homoj floras kaj forvelkas are—

Ne komprenataj.

Ne komprenate! Gnoj sen anima vido
 Fuŝmezuras per iletoj la gigantojn;
 La veneno de mensogoj kaj mokrido
 Ifoje tenas eĉ la mondvidantojn

Ne komprenataj.

Ne komprenate! Fontojn de sekreta sento
 Kiuj kuŝas sub la pompo kaj parado
 Ni ignoras; kaj pro nia memkontento
 La najbaroj ofte staras sub juĝado

Ne komprenataj.

Ne komprenate! Bagateloj nin influas:
 Ŝajna malatento, diro senpripensa,
 Vivodaŭran amikecon ekdetruas,
 Kaj l' animon trafas per malsano mensa

Ne komprenata.

Ne komprenate! Kiom da plorantaj koroj
 Pro sopiro al kunsento nun suferas!
 En solecaj brustoj, kiom da doloroj!
 Kiom de l' plej noblaj mensoj malaperas

Ne komprenataj.

Ho Dio, se la homoj nur pli klare vidus,
 Aŭ pli milde juĝus, manke de kompreno;
 Se la homoj ĉiu la aliajn fidus,
 Ili trovus sin des pli sub Via beno—

Kaj komprenataj.

4.11.1947.

KIAM BELULINO

(Oliver Goldsmith)

Kiam belulino cedas al la tento
 Kaj ektrovas, ke la viroj nur perfidas,—
 Kia sorĉo ŝin konsolas dum la pentto?
 Kia artifiko al puriĝo gvidas?

Por ŝin kaŝi, kiu sin permesis peki,
 Por la mondon trompi pri la honta sorto,
 Por en vira brusto konsciencon vekti,
 La rimedo estas sole—ŝia morto.

12.12.1947.

KANTO DE ARIEL

(Shakespeare en *The Tempest*)

Sub kvin klaftoj via patro restas:
 La ostaro jam koralosema;
 Perloj en la okulkavoj estas;
 Ĉiu korp parto forvelkema
 Aliiĝas pro marŝanĝo ia
 Al maraĵo luksa kaj magia.
 Lin niksinoj mortlamentas ĥore:
 Jen! mi aŭdas ilin—
 Klin! Klan! Sonore!

12.12.1947.

MIN NE AMU

(Anonima Poeto)

Min ne amu pro gracio mia,
 Pro mieno plaĉe simpatia,
 Nek pro eksterajo eleganta,
 Nek pro mia koro nun konstanta—
 Tiuj foriĝinte eble povos
 Inter ni malamon flegi;
 Veran vidon de virino tenu:
 Amu min, sed kial, ne komprenu—
 Tiel kaŭzon vi ankoraŭ trovos,
 Ĝis la morto min amegi.

3.12.1947.

LA PARDONEMO

(Portia en Merchant of Venice, IV, 1, 184)

(William Shakespeare)

Ne deviga estas la inklino al pardono;
 Ĝi gutfalas kvazaŭ dolĉa pluvo el ĉielo
 Sur la suban lokon; ĝi dufoje benas: tiun
 Kiu montras ĝin kaj tiun, kiu ĝin ricevas;
 Plej ĝi estas forta en fortuloj; al monarĥo
 Surtronanta, ĝi konvenas pli ol ties krono;
 Sceptro montras la mezuron de surtera povo,
 La atribuaĵo de soleno kaj majesto,
 Kaj en tio sidas la timado al la reĝoj;
 Sed la pardonemo staras super scepra forto,
 Ĝi entronigita estas en la reĝaj koroj,
 Kaj de Dio mem ĝi montras sin atribuaĵo;
 Do, la tera povo plej similas al la Dia,
 Kiam pardonemo gvidas juĝon.

14.12.1947.

ELĈERPAĴOJ EL LA ODO:
 SIGNOJ DE LA SENMORTECO
 EL REMEMOROJ PRI LA FRUA INFANAĜO

(William Wordsworth)

- (1) Iam ŝajnis al mi kvazaŭ nia tero,
 Ĉiu oftvidaĵo, ĉiu arbo,
 Kampo, kaj rivero,
 Sub ĉiela lumofarbo
 Vestis sin per sonĝe bela karaktero.
 Sed nenio kiel tiam sama restis:—
 Kien ajn mi ĉirkaŭvage
 Iras, nokte-tage,
 Mi nenion trovas kiel ĝi antaŭe estis.
- (10) La ĉielarko venas kaj foriras,
 Kaj la rozo en beleco spiras;
 La ravita luno plenrigardas,
 Kiam la nubejo estas nuda;
 Akvo sub la stela lumo ardas,
 Hela kaj ĉielapuda;
 La sunbrilo estas ĝoja regenero;—
 Sed por mi, kaj malgraŭ tio ĉi,—
 Forpasis ia mirindeco de la tero.
- (59) La naskiĝo estas nur forgeso post ekdormo;
 La kreskanta Vivostelo, la Animo,
 Jam elmortis en alia formo
 Kaj revenas de la malproksimo.
 Nek en forgesemo tuta,
 Nek en nudo absoluta,
 Sed kun aŭra belo kiun ni posttrenas
 De la Dia Patro ni alvenas:
 La Ĉielo nin ĉirkaŭas dum la infanaĝo!

- (176) Kvankam la brileco tiel forta tiam
 El la vido malaperis nun por ĉiam,
 Kvankam ne revenos tiuj horoj
 De mirindo ĉe la herbo, kaj de ravo ĉe la floroj,
 Ni ne plendos, sed plivole trovos
 Forton kie ajn ni poste povos:
 En la praestinta simpatio
 Kiu daŭros ĉiam kaj en ĉio;
 En la trankviligaj pensinspiroj
 De la homaj pekoj kaj deziroj;
 En la fido kiu vidas tra la morton;
 En la jaroj klerigitaj de filozofio.
- (197) Nuboj apud la malleviĝanta suno
 Sobre koloriĝas ĉirkaŭ la okulon
 Kiu vidas en la homo mortemulon;
 Jam aliajn venkopalmojn donis la Fortuno.
 Danke al la homa, vivondona koro,
 Dank' al ties amo kaj sentemvarmoj,
 Miaj pensoj eĉ pri tute simpla floro
 Ofte kuŝas tro profunde por la larmoj.

3.8.48 kaj Marton 1951.

ARTHUR KAJ HUBERT

(El "REĜO JOHANO," Akto IV)
 ("King John" de William Shakespeare)

SCENO 1: Northampton. Ĉambro en la Kastelo. Eniras
 Hubert (diru: *Hjubert*) kaj du helpantoj.

Hub. Elvarmigu la feraĵojn; kaj vin kaŝu
 Post tapeto; kiam mi piede frapos
 Sur la grundplataĵon, vin antaŭenĵetu
 Kaj la knabon kiu estos kun mi, ligu
 Al la seĝo. For, kaj zorge observadu.

1a. Help. Via rajto nur subtenu tian agon!

Hub. Skrupulaĉoj! vi ne timu: al la tasko.
(*Eliras helpantoj*).
 Knabo—tien ĉi! mi volas ion diri.
(*Eniras Arthur*).

Arth. Bonan tagon, Hubert.

Hub. Kaj al vi, princeto.

Arth. Tiometa princo, kun tioma rajto
 Esti tiom plia princo! . . . Vi malĝojas.

Hub. Efektive, mi pli gaja estis.

Arth.

Vidu!

Ŝajnas ke nur mi malĝojas pravigeble:
 Tamen mi memoras, kiel en Francujo
 La junfraŭloj funebradis fantazie,
 Tute pro kaprico. KREDU: se mi estus
 Nur libera, kvankam mi prizorgus ŝafojn,
 Mi kondukus gaje tra la tuta tago;
 Kaj mi tiel farus nun, krom pro suspekto,
 Ke la onklo pluon kontraŭ mi komplotas.
 Min li timas, kaj mi timas lin. Ĉar Geoffrey*
 Min naskigis, ĉu pro tio mi kulpiĝu?
 Nepre ne! kaj mi elkore volus esti
 Via filo, por ke vi min amu, Hubert.

* (*diru: Gefri*)

- Hub. (*flanken*) Tiu ĉi senruza babilado vekos
 La kompaton kiu en mi nun mortigis:
 Tial mi ekagu, kaj la faron finu.
- Arth. Ĉu malsana, Hubert? Vi aspektas pale:
 Nu, volonte mi vin trovus malsaneta,
 Por ke apud vi mi sidu tra la nokto:
 Certe mi pli amas vin, ol vi min amas.
- Hub. (*flanken*) Liaj vortoj enpenetras mian bruston.
 Legu, juna Arthur. (Li montras paperfolion).
- (*flanken*) Jen, la stulta guto
 Elpuŝanta la obstinan torturemon!
 Mi rapidu, aŭ defalos la firmeco
 El okuloj miaj, per virinaj larmoj.
 Ĉu vi ĝin ne legis? ĉu ne klara, do?
- Arth. Tro klara, Hubert, por rezulto tiel fia.
 Ĉu vi forbruligu miajn du okulojn?
- Hub. Juna knabo, jes.
- Arth. Vi tion faros?
- Hub. Nepre.
- Arth. Ĉu sensenta? Kiam vi nur kapdoloris,
 Mi bandaĝis vian frunton per poŝtuko,—
 La plej bona, manfarita de princino,—
 Kaj neniam petis, ke vi ĝin redonu;
 Kaj je noktomezo tenis vian kapon,
 Kaj simile la minutojn por la horo,
 Jen kaj jen zorgrompis la lacigan tempon,
 Demandante: 'Kio mankas?' 'Kie ĝenas?'
 'Kian bonamaĵon mi elfaru por vi?'
 Pluraj plebofiloj kuŝas senmoviĝe,
 Kaj neniam al vi dirus aman vorton:
 Vi en via flegservuto havis princon.
 Ne, vi povas juĝi mian amon ruza,
 Kaj ĝin nomi artifiko, se vi volas.
 Se al Dio plaĉas, ke vi min torturu,
 Nu do, tiel estu. Ĉu vi forbruligos
 Tiujn ĉi okulojn, kiuj eĉ neniam
 Vin riproĉis, nek riproĉos vin?

- Hub. Mi juris;
Kaj per ruĝa fero mi elmetu ilin.
- Arth. Ha, nur iu en la nuna ferepoko
Tion farus! La feraĵo mem, ruĝvarma
Apud la okuloj, trinkus miajn larmojn
Kaj estingus tiun fajran ofendegon
Eĉ en la montraĵo de la senkulpeco;
Ne, pro rusto poste ĝi forkonsumiĝus,
Ĉar ĝi fajrminacis al mi la okulojn.
Ĉu vi pli obstinas, ol forĝita fero?
Se anĝelo antaŭvenus por min diri
'Viajn du okulojn Hubert forbruligos,'
Mi ne kredus ĝin; nur vian langon, Hubert.
- Hub. (*piedfrapas*) Venu. (*Reeniras la du helpantoj, kun ŝnuro, feraĵoj, k.t.p.*)
Faru vian devon.
- Arth. Savu min,
O Hubert, savu min! Elmetas la okulojn
Eĉ rigardo de ĉi tiuj sangamantoj.
- Hub. Donu la feraĵon. Ligu lin ĉi tien.
- Arth. Ho ve! kial tiel brue kaj perforte?
Mi ne luktos. Mi starados kiel ŝtono.
Pro ĉielo, Hubert, ne min lasu ligi!
Ne, min aŭdu, Hubert: tiujn ĉi forsendu,
Kaj mi nepre sidos ĉiel senmoviĝa;
Mi ne min detiros, mi ne vorton diros,
Nek rigardos la feraĵon kun kolero.
Nur forpelu tiujn virojn, kaj kioma
Estu la turmento, mi pardonos vin.
- Hub. Foriru al interno. Lasu nin kunkunaj.
- 1a. Help. Plej volonte mi forestos tian faron.
- Arth. Ve! amikon mi verŝajne forriproĉis.
Lia severeco kaŝas mildan koron:
Li revenu, por ke lia kompatemo
Nasku vian.

Hub. Nu do, knabo. Vin preparu.

Arth. Sen alia eblo?

Hub. Nur okulojn perdi.

Arth. Dio! ke en viaj estu eĉ polvo, Sablereto, kulo, aŭ vaganta haro, Kio ajn, por ĝeni tiun karan senton; Do, sub la doloro de l' etaĵo tie, Ŝajnus abomena via fiintenco.

Hub. Kion vi promesis, via lango neas.

Arth. Hubert, la elokventaĵoj de du langoj Ne sufiĉe pledus paron de okuloj. Lasu diri mian langon, Hubert, lasu; Aŭ eltranĉu mian langon, se vi volas, Se per tio mi konservu la okulojn. Savu ilin!—kvankam nur por vin rigardi: Jen! verdire, la feraĵo malvarmiĝis Kaj ne vundus min.

Hub. Mi povas ĝin varmigi.

Arth. Vere, ne; la fajro mortis pro malĝojo, Ĉar, kreita por komforto, ĝi uziĝos Por nemeritita celo: vidu mem: Malico ne troviĝas en ĉi tiu karbo; Ĉielspiro jam estingis ĝian ardon, Kaj priĵetis ĝin per cindroj de la pento.

Hub. Sed mi povas spire ĝin reveki, knabo.

Arth. Se vi tion faros, ĝi nur honte ardos Kaj ruĝiĝos antaŭ viaj agoj, Hubert: Ne, ĝi eble ŝprucos en okulojn viajn,— Kiel hundo devigata al atako Mordas al la mastro kiu ĝin incitas. Ĉio, kion kontraŭ min vi devos uzi, Neas la oficon: nur en vi malestas La kompato de la fajro kaj la fero, Kies senkompato ĉiuj bone konas.

- Hub. Vidu, do, por vivi. Viajn du okulojn
Por la tuta reĝa riĉo mi ne tuŝos:
Tamen knabo, mi ja ĵuris kaj intencis
Per feraĵo jena ilin forbruligi.
- Arth. Ho! vi nun montriĝas Hubert; ĉiam ĵuse
Vi vin maskis.
- Hub. Do, nenion plu. Adiaŭ.
Via onklo devas kredi, ke vi mortis;
Mi satigos la spionojn per falsaĵoj:
Kaj vi dormu nun senduba kaj sekura:
Hubert por la tuta riĉo de la mondo
Ne difektos vin.
- Arth. Ho, mi dankegas, Hubert.
- Hub. Nu, nenion plu! Silentu, kaj proksime
Min ensekvu. Nun pro vi mi multon riskas.
(Ili eliras).
30.8.1949.

KVAZAŬ-SINONIMOJ

Mi nomas *kvazaŭ-sinonimoj* tiujn vortojn kiuj, en apartaj kuntekstoj, povas portempe funkcii kiel sinonimoj. Ili utilas por solvi problemojn ĉe ritmo kaj rimo, kaj iafoje por eviti vortojn per *mal-*. Ofte ili estas pli precizaj kaj pli trafaj, ol la vortoj kiujn ili anstataŭas, ĉar ili kombinas, ekzemple, kaŭzon kaj rezulton.

Sed oni rimarku: ili *ne* estas veraj sinonimoj. Ekzemple, sub AMI troviĝas KUTIMI. Neniu supozas, ke tiuj vortoj tutsame signifas; sed kiam homo asertas, ke li '*kutimas* dormi post manĝo,' tio pli-malpli diras, ĉu ne, ke li '*amas* dormi post manĝo.' Sub MALFERMI troviĝas LEVI kaj PUŜI. Kiam oni *levas* fenestron, aŭ *puŝas* pordon, oni *malfermas* ilin. Oni devas tre atente pripensi la signifon de vorto en la listoj, antaŭ ol uzi ĝin.

Mi ne pretendas, ke la listoj estas kompletaj, kaj mi publikigas ilin nur por montri al la legantoj la principojn laŭ kiuj mi kolektis ilin. Povas esti, ke pro la diversaj sencoj de naciaj vortoj, la listoj ne entute validas por ĉiuj lingvoj; sed la verkemuloj facile alĝustigos ilin laŭ siaj bezonoj, kaj elpensos pluajn.

La kapvortojn mi ordigis alfabete, laŭ la komencaj literoj. La listojn mi dividis en sublistojn laŭ la silabonombro, por faciligi la ritmotrovon. La listvortojn mi ordigis alfabete *laŭ la akcentata vokalo*, por faciligi la rimitrovon.

Generale mi ne konsideris la gramatikajn finaĵojn. Ĉar la silabonombro gravas rilate al ritmo, mi kredas, ke nuraj vortradikoj ne estus kontentigaj. Mi aldonis al ĉiu radiko sufiĉe oftan finaĵon, kiun la uzonto ŝanĝos laŭbezone.

AFLIKTO

veo
ĝemo
premo
plendo
pento

domaĝo
bedaŭro
korpremo
ĉagreno
lamento
turmento
sufero
mizero
aflikto
malĝojo
angoro
priploro

malfeliĉo
korangoro
kordoloro

AMI

ŝmaci
plaĉi
flagri
taksi
ami
flami
frandi
kara
ardi
sati
ŝati

laŭdi
ravi
beni
fidi
miri
distri
voli
sorĉi
ĝui
kulto
afabla
agrabla
fianĉo
aplaŭdi
ekstazo
amegi
respekti
pretendi
konsenti
kunsenti
preferi
Venero
envii
dediĉi
avidi
edifi
ĝentila
estimi
kutimi
deliri
admiri
sopiri
deziri
eksciti
aprobi
adori

Amoro
favoro
fervora
dorloti
stimuli
jaluzi

interesi
simpatii
emocii
ebriiĝi
valorigi
erotika
bonegulo
amindumi

samideana
entuziasma

ASPEKTI

strabi
ŝajni
vigla
montri
grimaci
minaci
mieno
prezenti
ŝajnigi
vidigi
montriĝi
simili

spektaklo

evidenta

BELA

paca
 plaĉa
 gaja
 pala
 flama
 gamo
 danda
 kanto
 kara
 klara
 ĉarma
 garni
 ĉasta
 glata
 ŝaŭmi
 rava
 fea
 deca
 bela
 hela
 elfa
 gemo
 revi
 pia
 brila
 bildo
 milda
 simpla
 virta
 nobla

mola
 dolĉa
 pompa
 bona
 ora

flora
 luksa
 luma
 pura

agrabla
 miraĝo
 sovaĝo
 miraklo
 spektaklo
 ornami
 flagranta
 flamanta
 feeca
 dieca
 oreca
 florea
 anĝela
 ebena
 serena
 solena
 arĝenta
 aero
 libera
 fiero
 etero
 majesta
 kvieta
 gracia
 radia
 trankvila
 anima
 aminda
 mirinda
 kisinda
 spirita
 alloga

impona
 blazono
 odoro
 koloro
 sonoro
 parfumo
 triumfo
 volupto
 mirindaĵo
 diafana
 radianta
 eleganta
 ĉielarko
 delikata
 mirindeco
 ĉieleca
 anĝeleca
 speguleca
 feineca
 etereca
 superega
 efemera
 fantazia
 iluzia
 admirinda
 honorinda
 eŭfemismo
 polurita
 aŭreolo
 multkolora
 grandioza

iluminata
 nemateria
 diapazono
 kalejdoskopo

eksterordinara

ETENDIGI

trafi
gajni
kapti
streĉi
preni
teni
venki
sterni
ĵeti
iri
vomi
tordi

ampleksi
alveni
etendi
impresi
efiki sur
atingi
imponi
influi

longiĝi ĝis
mezuriĝi
havi longon

FIERA

danda
vanta
brava
bela
riĉa
inda
nobla
pompa
luksa

parada
bonfama
memstara
aparta
konata
belega
fiera
majesta
honesta
memfida
impona
senhonta

eleganta
aroganta
sinamanta
malhumila
estiminda
honorinda
grandioza

fanfaron-ema
sinmontrema
impertinenta

GRANDA

alta
larĝa
vasta
grava
ega
plena
peza
troa
ogra
longa
monstra

forta
multa
tuta

spektakla
giganta
treega
ampleksa
potenca
majesta
fortika
masiva
impona
kolosa
abunda
profunda

superega
eksternorma
grandioza
maksimuma

eksterordinara

KONSERVI

ŝpari
gardi
kaŝi
daŭri
havi
savi
pekli
teni
festi
resti

skribi	LIBERA	flagri
ligi	larĝa	fajro
ŝirmi	vasta	pala
	plena	flamo
	kvita	lampo
-adi		klara
trakti	laŭplaĉa	ardi
konstante	senpaga	gaso
obei	sovaĝa	hela
posedi	vakanta	stelo
kolekti	malsklava	-eta
reteni	senŝarĝa	brili
subteni	seneco	blonda
observi	senĝena	torĉo
enskribi	libera	bruli
instigi	senpeza	fulmo
marini	ferio	lumo
obstini	eliĝi	luno
inspiri	seniĝi	suno
insisti	eksiĝi	lustro
persisti	senlima	
registri	lasita	lumeco
inciti	laŭvola	lumego
eviti	senborda	
kontroli	senzorga	
enŝlosi		
prizorgi	senkondiĉa	elektro
stimuli	senŝuldigi	kandelo
plenumi	senlimiga	lucerno
	ne-mal-deviga	lanterno
		lumeto
koncentr-iĝi		radio
mumiigi	forpermesita	lumigi
malfruigi		
	LUMO	
	tago	eklumigi
malliber-igi		lumigilo

MALALTA

fali
valo
talpo
rampi
planko
baso
bazo
plebo
premi
tero
suba
kruda
stumpo
fundo
grundo

degrada
kanajlo
malsana
mallaŭta
maldeca
pieda
depremi
subpremi
ebena
infera
embrio
subiĝi
radiko
humila
falinta
nadiro
malnobla
fripono
malforta

subulo
malmulta
nemulta
profunda
malsupra

triviala
fundamenta
rudimenta
degenera
malsupera
nesufiĉa
elĉerpigi
eluzigi
malĝentila
minimumo
forkonsumi

MALAMI

spleno
minaci
malami
akreco
repeli
turmenti
koleri
malico
kulpigo
obstino

abomeni
maltoleri
malestimi
persekuti

malamikeco
antipatio
malsimpatia

(Vidu ankaŭ
sub AMI)

MALBELA

strabi
aĉa
kalva
raŭka
naŭza
feĉa
ĝiba
vila
kripla
ogra
monstra
kruda
bufa
putra

diabla
agaci
grimaci
minaci
haladzo
bruteca
infera
groteska
simia

taŭzita
diboĉi
malloga
koboldo

demono
fripono
stertora
senorda
kaduka
veruko
malluksa

malornama
paviana
dekadenco
degenero

orangutanga
maleleganta
maldelikata

(Vidu ankaŭ
sub BELA)

MALBONA

(Stato)

aĉa
falsa
ranca
taŭzi
grava
sepsa
pesta
putra

agaca
malplaĉa
profana
veneni
tremiga

timiga
ruina
inkubo
kaduka
malpura
terura
malagraba
abomen(ind)a
antipatia
malutila

(Vidu ankaŭ
sub MALBELA)

MALBONA

(Konduto,
Ĝenerala)

aĉa
falsa
grava
teda
peka
ĝena
splena
pseŭda
fia
krima
misa
trompa
honta
fuŝa

agaca
minaca
degrada
plago

kanajla
profana
malĉasta
maltaŭga
maldeca
malhelpa
klaĉema
blasfema
ĉagreni
ofendi
turmenti
megero
freneza
malpia
pario
malica
perfidi
insidi
tremiga
timiga
pediko
malinda
hontinda
malvirta
senvirta
malnobla
diboĉa
fripona
malnova
enui
insulta
korupti
malpura
terura

malagraba
insultega

malfidela
 mensogema
 voluptema
 abomena
 malkonveni
 dekadenca
 degenera
 malhonesta
 kalumnia
 indigniga
 koleriga
 malutila
 malfidinda
 malhonora
 prostitui

maldelikata
 antipatia
 maloportuna

(Vidu ankaŭ
 sub MALBELA)

MALDIKA

falsa
 vanta
 ŝaŭma
 kava
 fea
 elfa
 svelta
 filma
 nuda
 fumo
 haŭto
 punto

vualo
 senkarna
 malsana
 putranta
 mallarĝa
 malgrasa
 malvasta
 malgrava
 fumeca
 haŭteca
 osteca
 lameno
 maldensa
 aera
 malpeza
 gracia
 folio
 ruina
 velkinta
 ŝrumpinta
 malfirma
 tavolo
 vaporo
 malforta
 kaduka

diafana
 delikata
 travidebla
 nebuleca
 fantomeca
 fadeneca
 papereca
 vaporeca
 tavololeta
 malsolida
 malfortika

harsimila

skelet(o)simila

MALDOLĈA

aĉa
 raŭka
 ek-
 seka
 veka
 vigla
 grinci
 forta
 brua
 kruda
 murdi

agaci
 grimaci
 minaci
 sovaĝa
 kanajla
 amara
 bruteca
 bruega
 kruela
 ne-mal-klera
 kolera
 severa
 malfreŝa
 malneto
 velkiga
 peniga
 ŝrumpiga
 mortiga
 malmilda

malhoma
stertora
perforta
detrua
tumulta
abrupta
murdema

malagrabla
odoraĉi
nehumana
aroganta
malhomeca
sensentema
malserena
senkomprena
energia
pereiga
malĝentila

maleleganta
maldelikata

MALFACILA

daŭra
premi

malcedi
severa
rigida
subiga
laciga
peniga
implika
komplika
malmilda
malsimpla

obstina
rezisti
maldolĉa
rigora

malhumana
embarasa
nesolvebla
malcedema
cerbumiga
suferiga
laboriga
doloriga
labirinta

MALFERMI

vaki
tranĉi
klara
largâ
vasta
plena
fendi
sterni
levi
svingi
tiri
rompi
fondi
montri
flori
fosi
trui
nuda
luma
turni
puŝi

establi
malpaki
vakanta
malkaŝi
ampleksi
komenci
libera
honesta
dividi
rondigi
malligi
starigi
disigi
instigi
vekiĝi
publika
malfiksi
senlima
ĉuinda
malvindi
inciti
malbloki
malvolvi
malŝtopi
senborda
malkovri
komuna

disponebla
subĉiela
nekaŝema
evidenta
malsekreta
apartig
komenciĝi
diskutinda

pioniri
neblokita
nefermita
inaŭguri

iniciati
neokupata

MALFORTA

laca
aĝa
akva
pala
vanta
fea
elfa
peka
eta
milda
simpla
mola
dolĉa
kulpa
stulta
juna
fuŝa

malsana
neklara
mankanta
putranta
komata
maldaŭra
rompebla
akveca
difekto

nehela
falema
amemo
aera
inerta
senverva
malvigla
maldika
ruina
malfirma

senvola
bezoni
kaduka
nebula
indulga

diafana
delikata
papereca
efemera
degenera
malsevera
letargia
malsolida
malfortika
malfidinda
senmuskola

ŝanceliĝanta
nedecidema
mal(sen)energia

MALGAJA

ŝarĝa
larma
grava

vea
ĝemi
prema
plendi
penti
peza
plori
kulpa
stulta

malgaja
bedaŭri
funebra
soleca
plendema
pentema
plorema
lamenta
mizera
pario
envia
indigni
sopiri
malĝojo
priplori
kortuŝa
ĵaluza

tragedia
nostalgia
malfeliĉa
bedaŭrinda
kompatinda
konsternita
konfuzita
kordoloro

MALGLATA

fajli
skrapi
knari
raspi
grati
raŭka
grinci
froti
brua
kruda
sulka

malglata
malplata
sulkhava

malebena
sulkoplena
ne glitas

maldelikata
maleleganta
nerabotita
nepolurita

MALGRANDA

fraja
ŝpari
fea
peco
eka
ĉelo
elfa
velki
semo

era
eta
ida
ona
joto
nulo
pulo
ŝrumpi
juna
punkto
pupo
guto

infana
malgranda
malvasta
malgrava
pigmea
netrea
polvera
frakcia
porcia
embria
nadiro
koboldo
ne(mal)multa

bagatelo
makuleto
iometa
mikroskopa
miniskula
minimuma

miniatura

MALINDULGA

premi

malcedi
kruela
sensenta
severa
laciga
peniga
malmilda
obstina
rezisti
arbitra
maldolĉa
rigora
senkora

malhumana
senkompata
malcedema
suforiga
laboriga
doloriga

maltolerema

MALJUNA

laca
aĝa
saĝa
jaro
barbo
ava
flava
velki
sperta

onklo
sulko

malsana
velkanta
multjara
barbhava
kadavro
malvigla
avina
velkinta
ŝrumpinta
malfirma
mortonta
malforta
kaduka
matura

(Vidu ankaŭ sub
MALFORTA)

MALLAŬTA

paca
kveri
milda
simpla
dolĉa
flua
suba
zumi
surda
flustri
muta
regata
serena
silenta

kvieta
trankvila
naiva
subvoĉa
indulgi
susuri
obtuza

tolerema
pacience

MALLONGA

tranĉi
parto
baldaŭ
eka
era
eta
tuja
ĵusa

malalta
malgranda
mankanta
maldaŭra
momenta
foresti
malplia
porcio
ne(mal)sufiĉa
rapida (k.t.p.)
subita
preciza
koncize
lakona
bezoni

miopa
apuda
malmulta
abrupta

kolerema
efemera
iometa
elĉerpiĝi
nestreĉita
limigita
interrompi
efemera
incitiĝema
neetendita

MALLUMA

peĉo
negro
plena
sveni
densa
penti
ĉerko
merlo
peza
nigra
nimba
blinda
inko
ciro
griza
nokto
tombo
ombra
ŝtorma

korvo	senluma	marmora
nubo	senluna	obtuza
stulta	sensuna	
bruna	profunda	frakasi
	malpura	
malgaja	purpura	diamanto
malpala	rubuso	nemordebla
malblanka	krepuska	nerompebla
malklara		malcedema
gagato	fumoplena	inkrustita
funebra	senespera	
fulgeca	estingita	MALMULTE
malhela	malfermita	DA
prunelo	violkolora	iaj
senstela		kelkaj
solena	ebone nigra	kvanto
fumplena	gagate nigra	malpli
lamenti		du-tri
infera	MALMOLA	iuj
kamero	ŝtalo	solaj
interno	fero	provizo
kaverno	firma	malofta
sekreta	vitro	izolaj
kaseto	roko	iom da
senvida	ŝtono	malmultaj
indiga	forta	
malbrila		iomete
mortinta	metala	nesufiĉa
grafito	agata	unuopaj
kovrita	-eca	malabunda
kaŝita	rigida	
ebono	solida	preskaŭ neniu
malblonda	siliko	individuoj
pluvonta	fortika	
nebula	rezisti	MALNOVA
	hardita	praa
		kara

flava	MALPEZA	malplena
putra	gaja	aera
	vaki	libera
arĥaja	vana	eta
tiama	vanta	koketa
amata	ŝaŭma	senpeza
antaŭa	kava	gracia
praava	fea	kaprica
velkflava	ŝvebi	maldika
pratempa	seka	facila
komenca	elfa	rafini
malfreŝa	svelta	zefiro
mucida	ŝerca	spirito
kliniĝi	lerta	diboĉa
antikva	verva	petola
ruina		frivola
velkinta	vigla	fantoma
ŝrumpinta	trili	lanugo
pasinta	milda	indulga
uzita	simpla	malmulta
kaduka	firti	diafana
matura	sprita	delikata
	ĝoja	senenhava
disfalanta	floka	nebuleca
dekomenca	dolĉa	papereca
malmoderna	fiosi	vaporeca
pecetiĝi	flua	nefidela
arĥaika	nuda	efemera
elĉerpita	flugi	nesevera
forĝesita		interesa
eluzita	imaga	tavoleta
malnovmoda	malgranda	papilio
ekstermoda	pasanta	fantazio
	malgrava	malsolida
	fumeca	malfortika
iniciati	anĝela	malserioza
antaŭhistoria	naĝema	

MAL-
PROKSIMA

alta
transa
lasta
fina
longa
fora
multe
punkto

distanco
transmare
tiea
lastvica
ĝis tie

fremdalande
aliloke
horizonto
malapuda

MALRAPIDA

laca
ada
vadi
tajdo
rampi
paŝo
raŭpo
daŭra
ŝvebi
teda
ĝena
pena
treni

peza
revi
longa
kovi
guto

laŭgrada
limako
rampanta
prokrasti
komata
dormema
eterna
inerta
malverva
malvigla
nevola
lakona
malfrua

nevolanta
malakceli
mal . . . ema
hezitema
letargia
ŝanceliĝi
intermiti

paŝon post paŝo
seninteresa
paralizita
iom post iom

MALSUPREN

tra
laŭ

de
ĝis

fali
bazen (-on)
rekte

teren (-on)
tie (n)
suben
funden (-on)
grunden (-on)
de-
malalten
pieden
depremi
subpremi
depreni
faligi
falinta
surgrunda(k.t.p.)
alfunde (k.t.p.)
malsupren

defaligi
alfundigi
surterigi
subakviĝi
defalinta

(Vidu ankaŭ sub
PROFUNDA)

MAL-
TRANKVILA

raŭka
ŝaŭma

veki
vento
verva
vigla
onda
ŝtorma
forta
blova
brua
sulko

sovaĝa
bolanta
amara
malplata
ĉirkaŭa
bruega
kruela
ĝenema
ondplena
kolera
severa
laciga
peniga
kirliĝa
malmilda
sulkita
stertora
maldorma
perforta
detrua
tumulta
abrupta

malagrabla
uragano
aroganta

kirliĝanta
agitata
malebena
ondplena
sulkoplenta
malserena
malkvieta
energia
pereiga
malĝentila
maltrankvila
senripoza
maleleganta
maldelikata

(Vidu ankaŭ sub
TRANKVILA)

MALVARMA

hajlo
arkta
neĝa
vintra
frosta
prujno
antarkta
sensenta
glacia
tremiga
frostiĝi

MALVERA

ŝajna
falsa
kontraŭ
kvazaŭ

pseŭda
trompa

grimaco
falsaĵo
eraro
kontraŭa
kvazaŭa
fi-
malfidi
perfidi
ŝajniga
hontinda
mis-
mensoga
malĝusta
fuŝ-

malfidela
malhonesta
aperigi
malfidinda

MARO

sablo
lago
tajdo
akvo
ŝaŭmo
ondo
bordo
fluo
ŝpruco

bluaĵo
ondaro

amplekso
ebeno
surŝipe
marmondo

oceano

MATURA

saĝa
granda
taŭga
flava
ŝveli
plena
preta
nigra
ruĝa
bruna

plenaĝa
ŝvelinta

depreninda
rikoltinda

MILITISTO

ano
viro

tribano
hordano
jonglano
soldato
tribviro
ĉasisto
murdonto

lanculo
sagulo

batalanto
rabiranto
indiĝeno
mortigisto
sovaĝulo
hakilulo
bastonulo

MOLA

kaĉo
lana
ŝima
ŝlima
pluŝo
putra

cedema
ruina
malfirma
malforta
kaduka

pereema

(Kaj vidu sub
MALMOLA)

MONTETO

digo
pinto
monto

altaĵo
krutaĵo
amaso
deklivo

terremparo
altaĵeto
promontoro

MORTIGI

pafi
manĝi
piki
ŝiri
pisti
buĉi
murdi

rab-
masakri
mortbati
mortpremi
veneni
ekstermi
pendigi
dronigi
disigi
estingi
trapiki
disŝiri
sufoki
detru

entombigi
pereigi
anĝeligi

senkapigi
martirigi
kadavrigi
silentigi
senvivigi

NOKTO

steloj
ombro
luno

vespero
noktiĝo
malfrue
mallumo
krepusko

(Vidu ankaŭ sub
MALLUMA)

OBJEKTO

ĝi

aĵo
fakto
eco
celo
temo
ĝeno
ero
io
tio
kio
ĉio
ilo
tiu

ŝtofo
umo
punkto
tuto

substanco
okazo
subjekto
afero
pri-
nenio
neniu
po unu
unu

okazaĵo
argumento
materio
unuope

materialo

OKULO

nazo
vido
brovo
frunto

vizaĝo
palpebro
vidmembro
pupiko
iriso

okulumoj

PAROLI

klaĉi
laŭdi
nei
legi/preĝi
bleki
ĝemi
beni
plendi
penti
pepi
peti
krii
sibli
diri
lispi
citi
voki
plori
ĉui
muĝi
grumbli
grunti
ĵuri
flustri

oraklo
deklami
rikani
demandi
deklari
kartavi
prelegi
konjekti
blasfemi
diveni

komenti	pordo	sekreta
aserti	pordejo	ruzema
protesti	kradpordo	pasia
mencii	dratpordo	insida
prediki	svingpordo	radika
kritiki	krucpordo	nadiro
babili	turnpordo	abisma
konsili		kaŝita
esprimi	enirejo	ĝiskora
sopiri	glitbarilo	fervora
riproĉi		patosa
mensogi	bruthaltigilo	ĝisfunda
paroli		senfunda
proponi	PROFUNDA	tamburo
anonci	ŝakto	abrupta
respondi	planka	
rakonti	ŝarĝa	fundamenta
raporti	larma	rudimenta
instrui	basa	artifika
aludi	baza	
ululi	vea	neelĉerpebla
insulti	ĝema	
murmuri	prema	PROKSIMA
balbuti	plena	tra
refuti	peza	trans
disputi	tomba	ĉe
argumenti	sondi	sub
kalumnii	kora	kun
komuniki	plori	sur
telefoni	funda	
korespondi	puto	flanke
oratoro	kruta	transa
	ruza	apud
PORD(EG)O		ekster
krado	malpala	jena
klapo	sincera	densa
	kaverno	

preskaŭ
inter
ĉirkaŭ
loka
kontraŭ
kuna
super

malspaca
egala
ĉemana
ĉeflanke
tuŝanta
najbara
ĉirkaŭa
kontraŭa
tuŝebla
simila
intima
surloka
mallonga
miopa
apuda

apenaŭa
ĉi-tiea
atingebla

RAPIDA

sago
pafi
trafi
salti
spasma
eka
peli

verva
vigla
svingi
vipi
frua
ŝpruci
tuja
fulmo
kuri
urĝa
baldaŭa
ekspedi
akceli
agema
ekspresa
raketo
instigi
paniki
subita
inciti
stimuli
impulsa

tarantelo
klopodema
kolerema
senpripensa
energia
senhezita

senkonsidere

RIGARDI

strabi
skandi
legi

serĉi
vidi
blinda
fronti
montri
studi

grimaci
minaci
imago
spektaklo
rimarki
direkti
mieno
atendi
atenti
prezenti
percepti
traserĉi
observi
ŝajnigi
vidiĝi
montriĝi
simili
viziti
miopa
esplori
okuli
figuri

panoramo
ekzameni
evidenta
perspektivo
sin turni al
okulumi

SENEMOCIA

flegma

senama

malvarma

sensenta

fiera

aroganta

senkompata

nesentema

sindetena

senpasia

senfervora

malamikema

indiferenta

senemocia

senfantazia

senentuziasma

neniel influata

SONORI

trafi

eĥi

pepi

vibri

tinti

ĉirpi

soni

tono

noto

skui

brui

zumi

audiĝi

sonigi

tintigi

sonoregi

telefoni

multesona

SPIRITO

eco

menso

sento

cerbo

vervo

spiro

vivo

ombro

morto

fumo

serafo

kadavro

anĝelo

esenco

animo

spirito

mortinto

nehomo

fantomo

demono

persono

inkubo

kerubo

tombulo

aperaĵo

vaporaj(ul)o

elkorpulo

TAGIĜO

tago

frue

lumŝanĝo

frumateno

tagalveno

tagkomenco

kokokrio

sunleviĝo

eklumiĝo

noktofino

matenruĝo

noktoforiro

la pala (griza)

horo

unua lumo

TAGMEZO

lunĉo

siesto

zenito

dek dua

sunzenito

TRANKVILA

paca

klara

glata
hela
brila
milda
sobra
dorma
luma

dormanta
senŝaŭma

ebena
senĝena
solena
serena
silenta
senventa
kvieta
glacia
malvigla
sensona

senzorga
senblova
senmova
traluma

ripozanta
travidebla
spegulema

neagitata